

# LITERATURA MONDO



HARANGYI JENŐ

REDAKTA KOMITATO: JULIO BAGHY, PAULO BALKÁNYI, KARLO BODÓ,  
KOLOMANO DE KALOCSAY, P. DE LENGYEL, DR° V. TÓTH, P. VARSÁNYI

FEBRUARO 1925



IV. JARO 2. NO.

ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST, EÖTVÖS-U. 3.

# AL LA LEGANTOJ

Antaŭ ĉio ni ĝoje salutas la fakton ke en Hungarujo la nombro de la venditaj ekzempleroj atingis la ciferon 100, do preskaŭ la kvaronon de la ekzempleroj venditaj en la tuta mondo. Vi vidas, ke la revuo ne estas farata speciale por hungaroj, ankaŭ la riĉeco en nia lando ne estas tia ke oni ne povus paroli pri vera mizero. Sed propagandon, kompreneble, ni povas fari pli facile kaj efike en nia proksimo ol en aliaj landoj.

Ĉi tio estas nia konsolo. Se en Hungarujo ni havas cent abonantojn, do, proporcie, en la tuta mondo ni devus havi *minimume* 2000. La nuna nombro vere ŝajnas malbona sonĝo, ĝi estas ia terura malkompreno, nekomprenebla strangajo, sed io, pri kio oni nepre *povas helpi*.

Kaj oni *devas helpi*. Eĉ en la plej malriĉa lando povas oferi la abonsumon ĉiu *grupo*, ĉiu *societo*, aŭ du-tri esperantistoj *kune*. Kaj neniu diru ke la revuo ne plaĉas al li. Konstante donaci ni ja ne povas, nun la esperantistaro havas kaj havos tian literaturan revuon, kian li proksimume elmeritas per sia subteno. Oni do prokrastu iom la severan kritikon, abonu, kunlaboru, propagandu, atendante ĝis ni havos la *nepre haveblajn* dumil abonantojn. Kaj *tiam* oni kritiku, se oni trovos ion kritikeblan.

Ĝis tiam ni laboros laŭeble; kaj paciencu ni miros pri la ciferoj de l' ĉi suba tabelo kaj pri tio, ke povas troviĝi konscia kaj entuziasma esperantisto, por kiu ne estas grava kor-afero ke en Esperantujo ekzistu inda literatura revuo.

LA REDAKTA KOMITATO.

## NOMBRO DE ABONANTOJ LAŬ LANDOJ

Aŭstrio: . . . 4 (20)	Danujo: . . . . . 2	Hispanujo: . . . 30	Latvujo: . . . 6 (4)	Polujo: . . . 17 (4)
Aŭstralio: . . . . 2	Estonujo: . . 9 (10)	Hungarujo: . 39 (70)	Litovujo: . . . . 13	Rusujo: . . . . . 1
Belgujo: . . . . . 1	Finnlando: . . 1 (3)	Italujo: . . . . . 7	Meksikujo: . . . —	Rumanujo: . . . (5)
Britujo: . . . 13 (8)	Francujo: . . 13 (7)	Japanujo: . . . . 7	Nederlando: . . 1 (4)	Svedujo: . . . . . 4
Bulgarujo: . . . 18	Germanujo: . . 11 (8)	Jugoslavio: . . 2 (40)	Norvegujo: . . . 2	Svisujo: . . . . . 8
Ĉeĥoslovakio: 3 (38)	Hindujo: . . . . . 1	Kosta-Riko: . . . 1	Persujo: . . . . . 1	Usono: . . . . . 5
Ĉinujo: . . . . . —				Sume: . . 222 (222)

PARENTEZE: OPE VENDITAJ

ANONCOJ:  
MALGRANDAJ:  
PO DU ESPRESOJ LA PREZO DE UNU  
NUMERO:

1 PAĜO  
1,200.000. H. KR.

1/2 PAĜO  
600.000. H. KR.

K. T. P.

INTERNACIA MEDICINA

REVUO REDAKTEJO KAJ ADMINISTRADO  
BUDAPEST VI, TERÉZ-RÖRÉT 4

OFICIALA ORGANO DE T. E. K. A.

Esperantistaj kuracistoj nepre abonu ĝin!

FILATELISTOJ!  
POŝTMARKKOMERCISTOJ!

Ĉiaspacajn poŝtmarkojn, precipe hungarajn ni donos interŝange kontraŭ poŝta aŭ grandkvanta senĉajo. Sendu nur sendifektajn, purajn (uzitajn aŭ neuzitajn) poŝtmarkojn.

HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO  
Budapest, VI., Eötvös-utca 3. (Hungarlando)

! GESAMIDEANOJ !

Helpu min al eksterlanda porekzista vojaĝo  
per aĉeto de miaj

GRAVURAĴOJ  DESEGNAĴOJ

Prezo: 5-7 svlsaj Ir. po peco

PAULO VARSÁNYI

Kunlaboranto de L. M.

Budapest VI, Nagymező-utca 30

# M A L J U N U L O

BOHDAN LEPKYJ

— Pardonu, pastra moŝto!

— Kio okazis?

— Al malsanulo. la homo atendas...

— Al malsanulo, al malsanulo — ripetis la pastro, frotante siajn dormemajn okulojn.

— Li iru al la preĝeja servisto, per ke tiu malfermu la preĝejon kaj ĉion necesan preparu!

La servistino fermis la pordon kaj estis aŭdeble, ke en la kuirejo ŝi ripetis la pastrajn vortojn.

La pastro turnis sin en la lito kaj levis la malsuprenfalintan litkovrilon.

— Al malsanulo. Ha, kion fari! Mia devo iri. Kaj ĉi tie tiel bone dormi...

Neniam la sonĝo ŝajnas tiel bongusta, kiel se oni malhelpas nin dormi...

Dolĉe rekovris palpebroj la dormemajn okulojn, la penso pri la malsanulo rememorigis sonorilojn kaj dum la impreso de ilia obtuza, malproksima sonorado, la pastro ekdormis denove.

— Mi petas vian moŝton, pastra moŝto!

— Kio okazis?

— La servisto jam foriris preĝejon. Li atendas.

— Atendas? Diru ke mi jam iras.

Post mallonga horo iris el la preĝejo du personoj survoje al la vilaĝo. Ili dronadis en la maro de blanka nebulo kaj preskaŭ ne vidis unu la alian, tiel ke la pasantoj genufleksadis nur laŭ la sonorileto, kiel decas genufleksi, se pastro iras kun Sinjoro Dio.

Ekstere estis aŭtuna frosteto; la vilaĝo, kvazaŭ pasto en pastujo, kirlita koto, glaciĝis kaj brilis per malpuraj kristaloj. Sub la piedoj ĝi rompiĝis kaj ete krakadis. La pastro eksentis malvarmon kaj rapidis, ankaŭ la servisto rapidis kaj post ĉiu tria-kvara paŝo sonorigis. Tiamaniere trapasinte longegan vojjon, ili haltis post la lernejo, apud la puto.

— Jen, tie ĉi! — aŭdiĝis la servisto.

— Ĉi tie? — respondis la pastro kaj malfermis pordon. Mirigis lin, ke en la korto estis tute silente.

Neniu venis ilin saluti, ne ĉeestis najbaroj, familioj kaj vilaĝaj gekuracistoj.

— Ĉu, eble ne ĉi tie? ekdemandis la pastro la serviston.

— Ne, akurate tie ĉi, la maljuna Grinculo malsanas. Mi ja scias.

— Nu, se jes, do ni iru! — Kaj ili eniris la kabanon. En la kabano mallaŭto. Eĉ ne unu homo serviston.

— Ne, akurate tie ĉi, la maljuna Grinculo malsanas. Mi ja scias.

— Nu, se jes, do ni iru! — Kaj ili eniris la kabanon. En la kabano mallaŭto. Eĉ ne unu homo. Nur la litaĵo estas malkovrita, sed malsanulo forestas.

— Hej, ĉu estas iu? — ekkriis la servisto, enrigardante en kuirejon, provizejon kaj gastaĉambron. Neniu respondis, nur la kokoj aŭdiĝis en la mansardo.

— Nenion fari. Ni atendu... — li sidigis sur benkon kaj atendis.

Intertempe ekbrilis la suno kaj la nebulo supreniĝis ĝis la tegmentoj. Ili sidas kaj atendas, subite ekstere ili ekaŭdas ian krion: Acjŭ! Acjŭ!

Ili eliris sur la sojlon. Maljuna avo, nudpieda, taŭzhara, postkuris la nutratajn porkojn kaj klopodis perforte ilin konvinki, aŭ emigi, eniri en porkejon. Sed la nutratoj kvazaŭ primokis la senforton kaj malletertecon de la maljunulo, kuradis tra la tuta korto kaj ŝajne forte emis viziti la ĝardenon, kiu estis barita per malalta barilo kaj pordeto el branĉetaro.

— Acjŭ! Acjŭ! — kriis la maljunulo, balancante la malgrasajn piedojn, — al la porkejo!

La pastro rigardis momenton, sed poste ekkoleris. — Kaj kion do vi pensas! Vi min alvokas, ellitigas, ne sciate kial kaj por kio! Kiu ĉe vi malsanas?

La maljunulo ekrigardis la pastron kaj jesis per la kapo.

— Jes, ĉi mi, pardonu pastra moŝto, ĉi mi mortas.

Por la pastro estis jam tro multe.

— Kio!... ĉu vi ŝercas kun mi, aŭ kio? Li mortas kaj la porkojn tra la tuta korto li postkuras!

— Kaj kion fari, pardonu pastra moŝto? Se ili forkuris, estas necese ilin enpeli. Acjŭ! Alie ili enirus la ĝardenon, aŭ al najbaro. Acjŭ!

Kiu scias, kiom longe estus daŭrinta tiu veturado, se ne estas la servisto. Li metis la sonorilon kaj la ruĝan lanternon sur la sojlon, kaj mem komencis helpi al la maljunulo.

La porkoj, ekvidinte tian gravan helpon, tuj eniris la porkejon.

La maljunulo, ankoraŭ foje insultinte ilin, fermis la pordeton per karpena paliseto.

Nun li fine aliris la pastron kaj kisis lian manon.

— Via pastra moŝto, bonvolu esti pardonema kaj ne koleru min! Sed ordinare, ili eliris, do necesas ilin enpeli.

La pastro moliĝis. Koleri li ne povis, ĉar li havis koron bonan kaj al la homoj favoran, kaj fine, pro kio koleri?

— Mi ne koleras, — li respondis indulgeme — sed ĉiuokaze, min lacigi, senbezone, estas ne honeste. Vi ja sufiĉe sanas, por dimanĉe veni mem en la preĝejon por konfeso.

— Ho Dio mia! Kiamaniere dimanĉe! Tute ne! Jen, Dio scias, ĉu mi ĝisvivos tagmezon. Mi nur perforte vin atendas. Pro Dio, perforte!

— Bone, — perforte — ekpensis la pastro enirante la kabanon... La maljunulo foriris en kamereton por preni puran vestaĵon. Post momento li aperis pure kaj kombite. La pasiro ne rapidis. Ne sentis tion necesa. Li volis iom babilu kun la maljunulo, kiu, estante mortmalsana, ankoraŭ postkuradas la porkojn en la korto.

— Kaj ĉu de longe vi jam malsanas? — demandis la pastro sidigante ĉe la tablo.

— Ho, de longe, de longe. Ŝajne nenio al mi doloras, sed la forto ien perdiĝis. Mi ĝin jam tute ne sentas en la ostoj. Kaj en la brusto ial tre malvarmas. Nepre morto.

— Nu, kaj kial neniu ĉeestas hejme? Vi sidas sola kiel ermito? Eĉ la sanulon enuigas la soleco, ne parolante pri malsanulo.

— Mi ja ne estas sola, mi petas la pastran moŝton, ĉe mi estas la infanoj, bonaj, tre bonaj infanoj. Peko estus se mi plendus.

— Bonaj, sed ili ne zorgas pri maljunulo.

— Zorgas, pastra moŝto, ili zorgas. Eĉ multe ili zorgas! Hodiaŭ neniu volis foriri el la kabano. Ĉirkaŭis ili min kaj ploras. Sed mi diras: Kial plori? Iru ĉu al propraj aferoj. Min ne gardu, ĉar neniu min ŝtelos, kaj se necesos al mi morti, mi ja mortos ankaŭ

sen vi. Vi Hriĉjo, mi diras al la pli aĝa filo, iru sur Zmijnon. Kampo pretigita. Jam de longe decas semi. Kaj se venus la enterigo — denova prokrasto, kaj jen frostetoj jam alvenas. Kaj vi, mi diras al la filino, iru al la urbo kaj aĉetu ĉion bezonatan. Vi ja scias ke, se io okazus, ĉe ĉi tieaj judoj ĝi estas duoble pli multekosta. La bofilino mi sendis en alian vilaĝon por sciigi la familianojn kaj la bofilo alvenigis vian moŝton kaj poste devis viziti la ĉarpentiston. Tiamaniere mi kuŝas sola, kiam mi aŭdas, la porkoj eliris. Necesas ilin revenigi. Mi leviĝis kaj iel, dank al Dio, mi revenigis ilin. Kaj la pastra moŝto ne koleru je mi, ĉar mi vere malsanas. Tre malsanas.

Li kisis denove la manon de la pastro kaj certigadis sian malsanon.

— Nu, kiel, ĉu ne malagrablas al vi solece? — demandis la pastro.

— Kaj ĉu vi ne timas? — aldonis la servisto siaflanke.

— Kial timi? Neniu mi mortigis, al neniu mi mallongigis la vivon, ne ŝtelis. Travivis mi la mian kaj

decas forigi. Simile al laboristo. Finas li la laboron kaj foriras. Kaj ĉu ne tempo jam al mi? Jam verdire duan monaton mi malŝparas la sanktan panon. La forto ien forkuris kaj mi nenion povas labori, sed senpage formangadi la panon de l' infanoj iel ne decas. Ne eniras en gorgon. Jen, dank al Dio, fino. Kion timi? La infanojn mi edukis, doton prizorgis, saĝon instruis, kaj kio plua necesas? Nenial por mi timi...

— Ni povas komenci, — diris la pastro kortuŝita per la vortoj de la aĝulo.

— Ni komencu en Dia nomo, — respondis la maljunulo kaj krucosignis trifoje.

\*

Ĵus venis la pastro hejmen kaj prepariĝis matenmanĝi, kiam de la sonorilejo aŭdiĝis sonorilo: bam, bam, bam!

La maljuna Grinculo mortis.

Tritiko semita, porkaro en porkejo, la filino post momento revenos — li povis morti trankvile.

*El la ukraina: O. Kuzjma.*

## V I K T I M O J

ROMANO EL LA VIVO DE SIBERIAJ MILITKAPTITOJ

JULIO BAGHY

### TRIA ĈAPITRO.

La freŝa aero mordetis la vangojn de Johano. Li rapidis tra la senhomaj stratoj de la barakurbo. La grandaj fenestroj, kovritaj per dika glacio, ŝajnis senanime rigardi lin. Li preterpasis ilin.

Li turnis sin en alian straton. Vico de barakoj kun larĝe malfermitaj pordoj borderis la vojon ambaŭflanke. Ili ŝajnis oscedantaj kriptoj, kiuj atendas viktimojn. Li preterpasis ilin.

De malproksime vidigis la stacidomo, antaŭ kiu ĵus ekmovigis vagonaro al okcidento. Post ok tagoj ĝi estos en Petrograd.

Antaŭ li, sur la vojo, proksimiĝis longa vico de militkaptitoj, portantaj dikajn arbotrunkojn sur siaj ŝultroj. Renkontante ilin oni salutis lin kun afablaj ekkrioj.

— Bonan matenon, sinjoro Bardy! Ĉu al provo?

— Saluton! Kiam estos la premiero de la nova teatraĵo?

— Ĉu oni povas jam ricevi biletojn?

Li penis respondi mallonge al ĉiu demandanto. Estis kelkaj, kiuj haltis por momento, babilis kun la populara viro, kiu donis tiom da belegaj, eĉ ne forgesebaj minutoj al siaj samsortanoj. La rusa barakestro senĉese kriadis.

— Rapidu! Rapidu!

La samsortanoj preteriris kaj li daŭrigis sian marŝadon al la rusa barakestro senĉese kriadis.

— Rapidu! Rapidu!

La samsortanoj preteriris kaj li daŭrigis sian marŝadon al la teatro, kiu jam vidigis el la proksima placo. Ĝi estis kolosa konstruaĵo el ligno por mil ducent personoj. Ĝiaj ornamaĵoj estis simplaj, kiel decas al siberia garnizona teatro. Ĝi servis iam por la amuzado de la rusaj regimentoj, sed nun la bonkora komandanto transdonis ĝin je la dispo de la militkaptitoj pro manko de rusaj artistoj kaj rusa soldatpubliko.

Johano suprenrapidis sur la larĝaj ŝtupoj kaj eniris la vastan vestiblon, kie gigantaj fornoj, konstruitaj el brikoj kaj lado, mildigis iom la malvarmon.

El la interno de la granda vidhalo aŭdiĝis gaja laŭta babilado kaj bruaĵ akordoj de fortepiano.

Li malfermis la pordon. La bruo kaj muziko ĉesis. La militkaptitaj artistoj respektive atendis la alvenon de la gvidanto sur la scenejon.

— Kion vi provas? — demandis li.

— La kantojn kaj la dancojn el la nova opereto, — respondis infanzaga junulo, kiu estis la primadono de la aktor-trupo.

— Kie estas la orkestro?

— La muzikistoj devis iri en la urbon. Nur morgaŭ ni povos provi kun orkestro — klarigis iu el la ĉirkaŭstarantoj.

— Nu bone! Ni provos la dramon!

— Doŝky ne estas ĉi tie.

— Stefano iru por Doŝky!

— Senbezone, mi opinias, ĉar ankaŭ vi ne povos provi, — rimarkis la primadona junulo kaj petole okulumis al la pordo de la vestejo. — Via parulino el la urbo atendas vin.

— Jes?! — diris Johano ŝajnigante surprizon.

— Jes!

Johano iris al la pordo de la vestejo kaj de tie donis instrukcion por la okupado.

— Post la fino de muziknumeroj provu la prozon de la unua akto. Bihay! Bonvolu min anstataŭi!

— Laŭdezire!

Johano malfermis la pordon kaj li tuj ekvidis la virinon sidantan ĉe la malgranda fera forno. Ŝi similis al tremanta birdeto, kiu serĉante varmon kaŭras sur branĉo super cindriginta fajraĵo. En la forno jam ne estis fajro. Oni kutimas hejti en ĝi nur dum la prezentadoj.

Johano rigardis la virinon, kiu eĉ ne rimarkis, aŭ nur ŝajnigis ne rimarki lian alvenon. Ŝi estis bela, belega, kiel delikata porcelanpupeto. Flustra rido de juneco vibris sur ŝiaj lipoj kaj ĵirta orblonda buklaĵo petolis el sub ŝia ĉapeto.

— Bonan tagon, sinjorina moŝto! — diris Johano laŭte, porcelanpupeto. Flustra rido de juneco vibris sur ŝiaj lipoj kaj ĵirta orblonda buklaĵo petolis el sub ŝia ĉapeto.

— Bonan tagon, sinjorina moŝto! — diris Johano laŭte, por ke la ekstere starantaj aŭdu la konvenan kaj nenion signifantan saluton.

— Bonan tagon, Johano Juroviĉ! — resalutis lin la virino kaj ŝian blankan, varman maneton etendis al li.

Johano apenaŭ tuŝis ĝin. La virinaj okuloj ekbrilis kaj ilia senpacience vaganta flamo ŝtelis malgraŭvolan ekbrilon en lian animon.

— Ĉu vi scias, kial mi venis?

— Mi eĉ ne konjektas.

— Hodiaŭ ni devas danci en la urbo. Oni petis min partopreni en la balo, aranĝata por la profito de malriĉaj orfoj. Mi ne povis rifuzi.

— Sed ni ne havas novan dancon.

— Faras nenion! Ni dancos la baleton "Feino kaj diablo". Ĉu bone?

Johano rememoris pri la sceno en la subtera vestejo. Ankaŭ tiam ili prezentis la saman baleton. Lia koro ekstrems kaj senresponde li esplorrigardis la okulojn de la virino. La vivantaj diamantoj ridetis.

— Ĉu vi ne volas?... Domage, ĉar mi jam promesis kaj ankaŭ en via nomo mi faris certan promeson, sciante, ke hodiaŭ vi ne ludos por la militkaptitoj... Kaj mi pensis, ke vi bone

fartos en gaja societo, kie oni vin estimas kaj amas... kaj mi...

La virino pepetis, sed la obstina muteco de Johano subite konfuzis ŝin.

— Kial vi rigardas min tiel fikse?

— Mi ne vin rigardas, sed vian animon?

— Strange! — kaj ŝi ruĝiĝis. — Nu kaj ĉu vi vidas ĝin?!

— Jes, ĉar ĝi tie sidas sur viaj koketaj trajtoj kaj brilas al mi el viaj okuloj.

Johano subite ŝanĝis la tonon. Li fariĝis flamanta pro kolero.

— Kial vi mensogas?

— Sed, Johano Juroviĉ, kion vi pensas? Ĉu mi mensogas?

Fi! Kia diro!

— Jes! Vi mensogas! Vi nur elpensis la tutan historion pri la hodiaŭa balo, por ke vi povu min allogi en vian hejmon. Kie estas via edzo?

— Li frumatene forvojaĝis al Tockoesavsk. Li havas oficialaĵojn tie.

— Vi do mensogis!

— Ne, ne! Mi ne mensogis, ĉar oni vere petis min por partopreni...

— Sed ne por la hodiaŭa vespero. Ĉu ne?

La virino mallevis la palpebrojn kaj flustris kun pardonpeta rideto.

— Post unu semajno estos la balo.

Johano kunplektis siajn brakojn sur la brusto kaj kun alternantaj sentoj rigardis la virinon, kiu timeme levis siajn okulojn al li kaj ridetis kun ĉarma konfuzo.

— Ĉu vi koleras... Johano Juroviĉ, ne koleru!... Mi scias, ke mi iomete mensogetis.

— Mensogetis? Kiel lerte vi povas senkulpigi vin!

— Nu boonee! Mi mensogis, sed... tamen... Johano Juroviĉ, vi ne devus koleri min... Mi volis vin vidi kaj... kaj...

— Kaj vi opiniis konvena la tempon, klam via edzo estas for de la hejmo.

— Ne riproĉu min, ĉar, je la sankta kruco, mi ekiros al la vasta mondo!

Johano ekflamis.

— Iru! Iru for! Sed ne ludu komedion por mi.

— Ĉu mi? Ĉu mi ludas komedion, kiu sin humiligante antaŭ miliikaptito kvazaŭ almozpetas vian amon? Ĉu mi ludas komedion, kiu forgetesante pri ĉio kaj ignorante ĉion ĵetas min al la buŝo de la mondo? Ĉu mi ludas, kiu nenion pensante pri la vagantaj klaĉoj vizitas vin en via malgaja fremdeco por forgesigi vian senaman orfecon? Ĉu mi ludas komedion aŭ vi? Kiu el ni ambaŭ?

La virino ekploretis. Johano sentis sin malarmita. Lia despota mieno fariĝis petega kaj la voĉo vibris pro ekscitiĝo.

— Sinjorina moŝto!

— Ne diru ĉiam tiun abomenindan „sinjorina moŝto“!

— Nu... bone... Katja...!

— Diru denove!

— Katja!

— Diru denove! — kaj kun larmaj okuloj ŝi ekridetis.

— Eh! Ne estu infano! — sed ankaŭ li ne povis reteni la rideton, kiu altrudis sin al liaj lipoj.

— Diru denove! Denove, denove! Bis! Bis! Bis!

— Katja! Katja! Katja! Ĉu vi estas

— Katja!

— Diru denove! — kaj kun larmaj okuloj ŝi ekridetis.

— Eh! Ne estu infano! — sed ankaŭ li ne povis reteni la rideton, kiu altrudis sin al liaj lipoj.

— Diru denove! Denove, denove! Bis! Bis! Bis!

— Katja! Katja! Katja!... Ĉu vi estas kontenta?

— Ne tute!

— Kion vi deziras ankoraŭ?

— Kison!

Johano iris al la pordo kaj de tie respondis kun malvarmiginta tono.

— Tuj mi revenos. Mi devas doni kelkajn instrukciojn al mia anstataŭanto kaj poste mi akompanos vin al la stacidomo.

— Vana klopodo! — diris ŝi kun ĉarma grimaco. — La plej baldaŭa vagonaro iras nur posttagmeze. Mi devas resti ĉi tie.

— Vi malvarmumos.

— Faras nenion. Almenaŭ mi ne devas longe suferi.

— Sensenca virina romantikeco.

— Vi estas romantika en la rolo de Jozefo de sinjorino Putifar.

— Tiun ĉi esprimon vi profitis de Doŝky. Ĉu ne?

— Mi ne rememoras. Povas esti. Cetere ĝi estas tute trafa esprimo.

— Hieraŭ li estis via gasto!

— Jes!... Kial vi ne venis, sinjora moŝto?

— Mi havis urĝan laboron. La du lastaj tekstoj de la kanto en mia nova opereto ne estis ankoraŭ pretaj.

— Kaj pro tio vi donacis la pakajon, kiun mi sendis, al stratvagulino.

Johano ruĝiĝis.

— Kiu diris tion?

— Neniu! Venante de la stacidomo mi renkontis knabinon, en kies mano mi rekonis mian pakajon. Mi haltigis ŝin, konjektante malbonon, kaj pridemandis. Ho, kiel impertinente ŝi ridis al mi.

— Vi ne estas devinta alparoli sin.

— Dankon! Kaj en tiu okazo estus ridinta pri mi la tuta ĉirkaŭaĵo, ĉar vi, sinjora moŝto, eĉ ne rigardante la enhavon, forgesis mian leteron en la pakajo... Jen!

— Si prenis leteron el la poŝo de sia pelto kaj etendis ĝin al Johano. Li, tute konfuzite, hezitante momenton, transprenis ĝin.

— Malfeliĉa letereto mia! Sopiraj krioj de mia amo, kiujn vi ĵetis al stratvagulino, Vi eĉ ne povas imagi la doloron, kiun vi kaŭzis al mi. Profunde vi ofendis min. Virino eble povas pardonon tial, se ŝia amo estas pli profunda ol la ofendo, sed forgesi, — neniam.

El Johano eksplodis senespera ekkrio.

— Kion vi volas de mi?!


La virino kun certeco pri sia triumfo ĝuis la baraktadon de la viro kaj ridetis.

— Nenion, sinjoro Bardy! Mi volas nur iom babili kun vi. Nenion, sinjoro Bardy, nur babili... nur babili.

Johano subite malfermis la pordon kaj vokis Stefanon.

La maljunulo venis servoprete kaj haltis antaŭ li.

— Stefano! Vi iros hejmen kaj diros al sinjoro Doŝky, ke mi petas lin tuj al la teatro. Ĉu vi komprenas? Tuj!... Krom tio vi iros al la hejtisto kaj petos lin fari fajron en tiu ĉi vestejo.



Poste vi iros al la oficira kuirejo kaj mendos tagmanĝon por tri personoj. Ĉu vi komprenas? Por tri personoj... Jen la mono. Ne forgesu alporti tablotukon kaj telerojn kun manĝilaro! Ĉu vi komprenas?

— Jes! Sinjoro Doŝky, hejtado en la vestejo, tagmanĝo por tri personoj, tablotuko, teleroj, manĝilaro.

— Bone, Stefano! Estu lerta!

La maljunulo ekiris kaj murmuris sub siaj lipharoj.

— Kiom da penado pro virino!

Johano fermis la pordon. La virino kun demanda mieno atendis lian klarigon, ĉar ŝi ne komprenis la interparolon. Ĝi estis hungarlingva.

Johano sidigis sur remburita apogseĝo kaj kun facila rideto, en kiu vidigis iom da incita venĝeto, li parolis kun troa ĝentileco.

— Sinjorina moŝto deziras babilon kun mi, sed bedaŭrinde mi ne havas multe da tempo por tio kaj, ĝuste por esti kompleza al vi, mi venigis anstataŭanton. Sinjoro Doŝky baldaŭ venos ĉi tien kaj estos je via dispono.

Koleraj rozoj ekbrulis sur ŝiaj vangoj.

— Vi estas komedianto.

Johano levigis kaj profunde klinis sin.

— Vi estas prava, sinjorina moŝto, kaj mi estas tre fiera pri mia profesio.

— Sed ne nur sur la scenejo, ankaŭ en la vivo.

— Vi devigas min por tiu ĉi rolo.

— Mi?

— Jes! Multfoje mi diris al vi, ke mi amas mian edzinon.

Tio ne estas komedio. Vi estas bela, pompanta, mem la vivanta tento, kaj mi devas reteni min per ĉiu ebla rimedo. Tio estas jam komedio, ĉar mia sango en ĉiu minuto, kiam mi vidas vin kaj ankoraŭ pli, kiam mi ne vidas vin, ribelas kaj bolas kaj postulas. Sed foje mi aŭdis de maljunulo, ke rezignoj faras la homon forta. Nun mi ekzercas.

— Nur maljunulo povas diri tian malsaĝaĵon.

Frapado sur la pordo. Venis la hejtisto.

— Ĉu vi ordonis hejti?

— Jes! Vi eble malvarmumos en tiu ĉi glacia aero. Cetere ni tagmanĝos ĉi tie. Stefano portos manĝaĵon el la oficira kuirejo. Mi mendis por tri personoj.

— Mi ne volas manĝi. Ankaŭ mi havas principojn. Neniam akceptu ion de malamiko.

— Ĉu vi rigardas min via malamiko? Kial?

La virino rigardis al la hejtisto kaj Johano komprenis ŝin.

La hejtisto estis simpla kamparano, dika, plenvanga, forta junulo. Li parolis kun terura dialekto, ke oni apenaŭ povis kompreni lin. Li ekkaŭris antaŭ la forno kaj tre malrapide, kvazaŭ li konstruus dometon por infanoj, li metis ligneton post ligneto en la fajrujon.

Por rompi la pezan silenton Johano alparolis lin.

— Nu, Joĉjo, kio nova?

— Nenea naova, seenjaoro! — respondis la knabo serĉante alumeton en ĉiu poŝo de sia bluzo. — Me faorgeesis faojrigelon!

— Jen alumeto! — diris Johano kaj donis al li la sian.

— One deeras, ke naovaj meletkaoptetoj alveenis.

— Kiam?

— Jos me aadis teon de meea amekoo. Ele estos en la baoraokoj apod la tejaotro.

— Aha! Mi scias. Venante al la teatro mi vidis kelkajn barakojn, kiuj kun malfermitaj pordoj atendas novevenintojn.

— One deeras, ke antao do ao tre maonaotj kaoptis elen

— Aha! Mi scias. Venante al la teatro mi vidis kelkajn barakojn, kiuj kun malfermitaj pordoj atendas novevenintojn.

— One deeras, ke antao do ao tre maonaotj kaoptis elen la roosoj.

— Versajne ni trovos inter ili samurbanojn.

— Uhum! — Li esprimis la saman opinion kaj per plenpulmo komencis blovi la fajron. — Ke la Jesoo Kresto cendriĝo teon legnon! Ĝe estas maolseeke, keel mea kaolsaono post laovaodo! — blasfemis la knabo.

La virino flustre demandis Johanon.

— Ĉu li scias ruse?

— Ne! Sed mi povas demandi lin. Joĉjo, ĉu vi parolas ruse?

— Ne moolte... Ke la Ponceos Pelatos eksteermo teon aorbaoron, en keo one haokis teon ĉe legnon! Ĝe ne vaolas ekbrooli... Me kaomprenas ne moolte roose.

Johano turnis sin al la virino kaj interpretis.

— Li ne parolas kaj ne komprenas multe.

— Ĉu li estas kamparano?

— Jes!

— Kiel sana li aspektas. Li vivas kiel la bruto kaj ne turmentas sin per doloraj pensoj... Ho kiel mi ŝatus esti tia sententa estajo.

— Vi eraras, opiniante, ke la simplaj homoj ne havas siajn dolorojn kaj sopirojn. Ili povas ami, kiel vi, kaj resti kortuŝe fidelaj.

— Hahaha! Vi opinias min tro naiva!... Demandu la knabon, ĉu li amas la rusajn knabinojn?

Johano ridante plenumis la strangan deziron.

— Joĉjo! La sinjorina moŝto demandas vin, ĉu vi amas la rusajn virinojn.

— Nor laŭ maodeero.

— Nur modere — interpretis Johano.

— Demandu lin, ĉu mi plaĉas al li? — kaj ŝi kokete ridetis al la knabo.

— La sinjorino demandas vin, Joĉjo, ĉu ŝi plaĉas al vi?

La knabo por momento rigardis al la ridetanta vizaĝo de la virino, klakis per la lango kaj gratante la orejon li respondis.

— Delekaota persaono, sed ne por me... Ŝea naozo semelas al la naozo de mea feanĉeno en Transselvaoneo... Taomen ŝe estas ple beela, me pensas. Per la maonoj de la senjorena moŝto ne estas eble melki la bovenojn, nek kneedi la ĉeutaogan paonon.

Li ĉesis paroli kaj denove, kun plena fervoro, blovis la fajron. Johano ripetante interpretis la opinion de la bona knabo.

— Li opinias, ke vi ne estas tiel bela, kiel lia fianĉino en Transsilvanio. Viaj manetoj ne taŭgas por melkado kaj knedado.

La virino gaje ekridis kaj preninte monon el sia retikulo ŝi donis ĝin al la knabo. La knabo tenis la monbileton en sia mano kaj nekomprene rigardis jen al la virino, jen al Johano.

— Mi dankas vian sincerecon, — diris ŝi.

— Keon ŝe vaolas? — demandis la knabo.

— La sinjorina moŝto dankas la komplimenton, — klarigis Johano.

— Vaolaonte me faoris! certigis kapjese la knabo kaj la monon zorge metinte en sian notlibron, daŭrigis la fajrofaradon.

— Ke la saonkta vergoleno kaompaotoo jam ĉe teon faojron!

La pordo malfermiĝis kaj venis en la ĉambro la primadono de la artista trupo. Li respektplene salutis la virinon kaj mallaŭte pritraktis aferon kun Johano. Dum la parolado kelkfoje li rigardis al ŝi.

La virino konjektis, ke ili parolas pri ŝi.

— Kion li volas? — ŝi demandis Johanon kaj afable ridetis al la rugiĝanta junulo.

— Teatra afero, sinjorina moŝto. Li petis min interpreti lian deziron, li ludos en la nova opereto la ĉefan virinan rolon, dancistinon kaj li bezonus ian belan balan kostumon kaj...

— Aha! Bone. Hodiaŭ vespere vi povos elekti por li el mia tualetaro laŭplaĉe — ŝi diris kaj kvazaŭ sugestie rigardis en la okulojn de Johano.

— Ĉu hodiaŭ vespere?

— Jes! Vi ja venos por partopreni en la hodiaŭa balo. Vi promesis. Ĉu ne?

Johano konfuzite balbutis.

— Jes, sed... mi...

— Nenia sed! Vi diris jes kaj vera viro plenumas sian promeson, eĉ se ĝi estas kontraŭ lia volo, — kaj aperis triumfa rideto sur ŝiaj lipoj.

Johano kapitulacis kun facila kapklino kaj turnis sin al la junulo.

— Hodiaŭ mi iros en la urbon kaj elektos por vi kostumon.

— Elektu tiun helflavan! Tiu koloro tre konvenas al mia blonda peruko. Krome bonvolu aĉeti por mi kelkajn ringojn. Ili malgrandigas la manojn.

— Bone, bone. Mi prizorgos.

— Kaj, kara direktoreto mia, ne forgesu aĉeti por mi *Leichner*-an

lli malgrandigas la manojn.

— Bone, bone. Mi prizorgos.

— Kaj, kara direktoreto mia, ne forgesu aĉeti por mi *Leichner*-an ŝminkon, ĉar tiu ĉi hejme preparita ŝminko t ne bone kaŝas eĉ la freŝe razitan vizaĝon. Mi volas brilegi, ke oni ekkusu al miaj piedoj, — afektis plu la trodorlotita junulo. — Jes! Mi eĉ ne diris al vi, ke kapitano Prokeĉ surprizis min per paro da orumitaj ŝuoj. Ili havas altajn kalkanumojn kaj sukcese malgrandigas la piedojn.

— Bone, bone.

— Ĉu vi ne havas bonan humoron, kara direktoreto?

— Mi havas, sed...

— Mi komprenas. Tuj mia kara!

Li salutis la virinon kun mude afektita rideto, premis la manon de Johano kaj foriris. La pordo fermiĝis, sed nur por momento, ĉar li denove malfermis ĝin por ŝovi la kapon.

— Elektu, kara direktoreto, se eble, ankaŭ tiun rozkoloran dekolititan dankkostumon, kiun la sinjorina moŝto uzis dum la lasta baletto en la urbo. Ĝi bonege montras la formojn. Ne forgesu!

— Bone, bone!

La pordo fermiĝis. Johano turnis sin al la virino, kiu starante antaŭ la vesteja stablo rigardis la artefaritajn virinajn koksojn kaj mamojn, kiujn oni per ŝnuretoj fiksas al la viraj korpoj dum la prezentadoj.

Johano haltis malantaŭ ŝia dorso.  
— Ĉu vi vidas, sinjorina moŝto, tiel ni mensogas al ni mem por luli nin en iluzioj, ĉar la realon forrabis de ni la vivo.

— Kaj eĉ se la vivo etendas al vi la realon, vi preferas la kotornojn. Jen viaj tragedioj, — diris ŝi kun malgaja rideto.

— Jes! Ja! Komuna sorto de la militkaptitoj.

— Sed ne ĉiuj estas revuloj.

La knabo fine sukcesis. La fajro brue ekzumis en la forno. Li metis ankoraŭ kelkajn lignojn por vigligi la flamojn kaj estis forironta. Li haltis antaŭ la muta paro, kvazaŭ por diri ion. Johano rimarkis lin.

— Kion vi volas Joĉjo?

— Me nor vaolas deri al la senjorena moŝto, ke ne estas teea roosa knabeeno por keea me faurgesos mean feanĉenon en Transselvaoneo. Roosa vereeno por roosa veero, hongora veereo por hongora veero.

La knabo forlasis la ĉambron.

— Kion li diris? — scivolis la virino.

— Li donis al vi la respondon anstataŭ mi... Por rusa virino rusa viro por hungara virino hungara viro. Kaj ankaŭ tion li diris, ke ne estas tia bela rusa knabino por kiu li forlasis sian fianĉinon. Vi povas vidi, ke ankaŭ la kamparanoj havas songojn kaj dolorajn sopirojn.

La virino nerve disŝiris unu el la virlnaj kostumpecoj kaj jetis ĝin al la piedoj de Johano.

— Jen! Vi, kurantogoj prefer la vivo, kun viaj revoj, kiuj ŝirigos kiel ĉi tiu produkto de vana iluzio.

— Katja! Vi estas maljusta. Vi juĝas pri sentoj, kiujn vi ne komprenas.

— Kial mi ne komprenas?

— Ĉar vi neniam amis vere, sindone kaj kun dolora rezigno.

La virino ekploris.

— Kial vi ploras? Ĉu mi trafis la veron kaj tio tuŝas vin dolore?

La virino sublte ĉirkaŭbrakis Johanon kaj kun arda esploro plendis.

— Vi turmentas min, Johano. Terure mi suferas... Kial vi diras, ke mi ne konas la amon... La amon rezignan kaj doloran?

— Ĉar vi konas nur la deziron.

— Vi eraras! Mi diras al vi, ke vi eraras. Mi amas vin ne forŝreble. Mi povas rezigni pri ĉio, pri ĉiu...

— Escepte min, Katja. Ĉu ne? Jen via granda eraro.

— Ne koleru min, Johano Juroviĉ. Indulgu min.

— Mi ne koleras.

— Kisu min! Nur unufoje kisu min!

Johano penis liberigi sin el la forte premantaj brakoj, kiuj kvazaŭ spasme ĉirkaŭprenis lin. Li ne sukcesis. La virino ĉiam pli forte tiris ilan kapon al si kaj ploretante pepetis.

— Kison, Johano!... Nur unu klseton... nur unu solan, mallongan klseton.

La vangoj de Johano flamis. Kun subita sinforĝeso li ekprenis la virinon al si.

Frapado aŭdigis. La virino ŝajnis indiferenton, ludante per skarpo de ekzotika teatra uniformo. Johano ekiris por marŝadi tien kaj reen en la ĉambro.

La frapado ripetigis. Johano laŭte ekkriis.

— Envenu!

Doŝky venis en la ĉambron. Li rigardis por momento al ambaŭ kaj poste kun apenaŭ sentebla ironio li diris.

— Versajne mi alvenis en ne ĝusta minuto kaj malhelpas vin en la dancprovo. Sed vi petis min, Johano, ke mi tuj rapidu per skarpo de ekzotika teatra uniformo. Johano ekiris por marŝadi tien kaj reen en la ĉambro.

La frapado ripetigis. Johano laŭte ekkriis.

— Envenu!

Doŝky venis en la ĉambron. Li rigardis por momento al ambaŭ kaj poste kun apenaŭ sentebla ironio li diris.

— Versajne mi alvenis en ne ĝusta minuto kaj malhelpas vin en la dancprovo. Sed vi petis min, Johano, ke mi tuj rapidu al la teatro.

Johano sentis la mokan tonon de la parolo, sed ŝajnis ne rimarki ĝin.

— En ĝusta momento vi venis.

— Ankaŭ mi tiel pensas — diris Petro kaj subpremis la altrudeman ridon, kiu sufokadis lin. Li turnis sin al la virino. — Saluton al vi, sinjorina moŝto. Mi eĉ ne kuraĝis esperi, ke tiel baldaŭ mi revidos vin.

— Bonan tagon, sinjoro Doŝky, — kaj ŝi etendis sian manon al Petro.

Petro klinis sin kaj kisis la maneton.

— Jen! Vidu, Johano Juroviĉ, sinjoro Doŝky estas vera kavaliro. Li ne ŝparas la mankison.

— Johano! Johano! Vi eĉ ne kisis la maneton de la sinjorina moŝto?! Ah! Ah! Ah! — riproĉis Petro kun troa patoso — Jen! Tia estas mia amiko. Pardonu lin, sinjorina moŝto... Ĉu ne honte ne kisi tian neĝblankan maneton, kia estas la filigrana maneto de la sinjorina moŝto?! Se mi estus en via situacio,

— Kion fari? Mi estas ja tia! — diris Johano, kaj li ŝajnis esti incitita.

— Urso, vera urso li estas, sinjorina moŝto. KREDU MIN! Mi estas lia amiko. Mi bone konas lin.

La virino ridis, Petro ridis kaj Johano vole-nevole ridis kun ili.

Botfrapetado antaŭ la pordo. La maljuna Stefano alvenis kun la tagmango. Respekte, kun iom da ceremonio, li malfermis la pordon kaj kiel en teatraĵoj li aplombe anoncis.

— La tagmango estas servita!

— Kie, Stefano, kie? — demandis samtempe Petro kaj Johano.

— En mia mano. — respondis dignoplene la maljunulo.

Johano kaj Petro iris sur la scenejon por porti de tie tablon kaj seĝojn. La aktoroj jam iris hejmen. Dume la maljunulo metis la kaserolojn sur la fornon, elpoŝigis manĝilaron, prenis el sub sia mantelo la telerojn, zorge volvitajn en tablotuko. La virino demetis sian ĉapeton kaj la pelton pendigis sur najlon ĉe la pordo.

Sia gracia staturo nur nun montriĝis en plena beleco.

Petro kaj Johano revenis kun tablo kaj tri komfortaj seĝoj. Ili rapide kovris la tablon per la blanka tuko, metis la telerojn kaj la manĝilaron sur ĝin.

La maljuna Stefano staris servoprete antaŭ la forno, sed Johano forpermesis lin.

— Stefano! Vi povas hejmeniri kaj post kelkaj horoj reveni por la objektoj. Ĉu vi komprenas? Hodiaŭ mi devas iri en la urbon. Mian vespermanĝon donu al sinjoro Varga. Li ĉiam konsentas malaperigi ĝin.

— Jes! Mi iras hejmen, revenos por la objektoj, vi vojaĝas al la urbo, vespermanĝon al sinjoro Varga. Mi komprenas.

Li salutis kaj foriris.

Johano proponis ĝentile seĝon al la virino apud si, sidigis.

## SPITE

K. de Kalocsay

*Gigantaj, en minaca, monotona  
grizo starantaj rokoj... Fieraj. Majestaj.  
Surdaj al voko. Blindaj al koloroj. Mutaj.  
Sensentaj titanoj. Krutaj avertoj. Neantoj de l' Tempo!  
Al viaj muskaj vertoj verŝas la suno oron de somero,  
per vento al vi flustras aŭtuno dolĉe melankolian zumon,  
vintro per arĝento funebra vin ornamas katafalke,  
printempo volas vekti vin per vibre febra kiso,  
sed vin impresas nenio...  
Rigide, fierege, en via interno sen sento, emocio, pasio,  
vi ĉirkaŭspiras vin per frosta Eterno. Kun muta malŝato vi vidas,  
ke herboj, papilloj, homoj vivi kaj morti rapidas  
ĉe viaj eternaj piedoj. La rivero blua  
de l' Tempo vin lavas, sed ŝaŭmo brila kaj ondo brua  
senŝanĝe preterfluas la fortikaĵojn terurajn  
de via kruela soleco. Kaj la malhelkonturajn  
pintojn kun ŝtoniĝinta nostalgio vi streĉas en la nokto serena  
al la firmamento steloplana:  
En vi la nuda, terura, senvive eternviva Tero-kerno [eterno.  
rigardas la stelojn, parencojn siajn en sensento, fiero, majesto, soleco.  
Inertaj titanoj! Kion vi havas el via nuda, glacia majesto?  
senŝanĝe preterfluas la fortikaĵojn terurajn  
de via kruela soleco. Kaj la malhelkonturajn  
pintojn kun ŝtoniĝinta nostalgio vi streĉas en la nokto serena  
al la firmamento steloplana:  
En vi la nuda, terura, senvive eternviva Tero-kerno [eterno.  
rigardas la stelojn, parencojn siajn en sensento, fiero, majesto, soleco.  
Inertaj titanoj! Kion vi havas el via nuda, glacia majesto?  
Via eterno kruda estas blinda kaj surdemuta neesto,  
mensogas via rigido frosta, fiero obtuza, majesto sovaĝa,  
amaso malsaĝa  
vi estas! Sensenton, fieron, majeston, solecon, eternon  
mi konscias pri vi anstataŭ vi! Mian internon  
ili tuŝas per sentoj, impresoj. Vi timige fieras  
ĝis volas mi, sed vi ŝaŭme malaperas,  
se mi turnas for rigardon mian...  
Jes, mi, atomo*

*pasema kaj efemera kaj bagatela: homo!  
Ne pli daŭra ol la trema rosguto sur via musko...  
Ho, kun febra saluto mi laŭdu mian vivon momentan!  
Rokoj! Aŭdu! Kontraŭ via glacie eterna kuŝo  
mi jetas el krianta buŝo la veron de mia ekzisto.  
Mi falis sur la Teron, rosguto kaj la momento posta  
jam portas malaperon mian. Sed dum kelkaj momentoj  
mi brilis, mi brilis! De miloj da sentoj mi plenis!  
La mondon mi jubilis! Mi estis vaste malfermita Okulo,  
kaj en mia momenta spegulo solfa ardis eternaj fajroj,*

La virino, preninte la dividan kuleron, ankoraŭ restis staranta.

— Ĉu vi permesas, Johano Juroviĉ, ke mi estu la mastro? — kaj ruzete ŝi aldonis. — Antaŭe mi diris, ke de malamiko mi akceptas nenion, sed tion mi ne diris, ke al malamiko mi ne donas ion.

Johano ridetis kaj donis sian teleron al la virino, kiu ĉerpis plenkuleron da supo por li.

— Virina logiko, sed ĉarma.

— La virina logiko estas ĉiam ĉarma, kvankam tre erara. — rimarkis Petro kaj ŝovis sian teleron antaŭ la virinon.

Ŝi prenis ankaŭ por si el la supo kaj sidigis. Kelkajn momentojn ili silente manĝis. Subite Petro, kiam estis la vico de la rostaĵo, saltis de la tablo kaj prenis el la poŝoj de sia mantelo du botelojn kaj tri glasojn.

— Ho, mi mallerta! Preskaŭ mi forgesis la vinon! — li kriis.

— De kie vi akiris vinon? — demandis la virino.

— El mia propra kelo. Tiu ĉi nektaro estas rikoltita en la kuracista barako. Sed kiamaniere oni rikoltis? Simple el sekvinberoj per aldono de iom da sukero kaj akvo. Tio ĉi estas specialaĵo de niaj bravaj kuracistoj.

— Nun mi komprenas, kial aĉetas ĉiunonate tiom da sekvinberoj la kuracistoj kaj via milita pastro.

— Ah! La pastro! Nia eminenta pastro! Li estas kurioza homo. Mi tre estimas lin, precipe, se mi ne estas devigata vidi lin. Li estas vere pia homo, kiu foliumas la biblion de la diablo, la kartojn. Li drinkas, kiel hipopotamo, li deturnas monsumojn, senditajn por bonfaraj celoj, li vangofrapas la malfeliĉajn soldatojn, kluj pro la neĝblovado ne povas rimarki kaj saluti lin laŭ la disciplino kaj ĉiunokte vir...

— Hm! Ahm! — ektusis averte Johano.

— Virtuoze ekzercas la rezignon pri la mondaj plezuroj. Nu!

— Vi tre koleras lin, sinjoro Doŝky.

— Mi ne koleras lin, nur senfine malestimas lin... Cetere tiu ĉi rostaĵo estas bonega. Ĉu ne?... Ho mi mallerta. Denove mi forgesis ion... Verŝi en la glasojn, tio estas mia tasko, — kaj li plenigis ilin, poste altenlevis sian glason kaj tustis.

— Sinjorina moŝto! Kara amiko! Hodiaŭ, la 18-an de Januaro en la 1917-a jaro.

— 1918-a! — korektis lin Johano.

— Nu bone! — kaj trinkinte ĝisfunde la enhavon de la glaso Doŝky residigis.

La virino kaj Johano ekridis.

— Eminentu oratoro vi estas, Petro! Ĉu ne, sinjorina moŝto?

— Nur ne demandu la sinjorinan moŝton! Ŝi havas ĉiam la saman opinion, kiel vi.

— Nu ne ĉiam! — protestis ŝi.

— Ĉiam, sinjorina moŝto, sed ne en ĉio! — persistis Petro.

La virino ruĝigis. Johano jetis riproĉan rigardon al sia amiko, kiu diable impertinente turnis siajn okulojn jen al li,

jen al ŝi. Subite, kvazaŭ kaptite de nova ideo, li levigis kaj iris al la pordo.

— Kien vi iras? — demandis Johano.

— Al Joĉjo! La fajro estingiĝos baldaŭ kaj ni ne havas sufiĉan provizon da ligno. Tuj mi revenos. Espereble vi ne enuos la duopon. Vi eĉ ne parolis ankoraŭ pri la hodiaŭa baletto, kiun vi devos prezenti en la urbo. Jes! Kion vi prezentos hodiaŭ?

— La feinon kaj la diablon, — respondis la virino tre rapide por eviti sinceran konfeson de Johano.

— Ah! Ĝi estas tre ĉarma baletto... Vere tre ĉarma baletto... Johano tre ŝatas ĝin... Nu, tuj mi revenos.

Li foriris. La virino kun pardonpeta grimaceto ridetis al Johano. Li konuzite turnis sian rigardon al la plafono.

— Kial vi mensogis?

— Mi nur mensogetis... Nur iom mi mensogetis...

— Vi scias ja, ke mi diros al li la veron.

— Sed ne nun. Granda diferenco... Ni havas tempon por elpensi ion akcepteblan...

— Sed kial? Kial ĉiam mensogi?

— Vi estas prava, Johano! Ni ne mensogu plu! Ni diru unu al alia. Mi amas vin!... Nu diru!

— Ne!

— Kial ne?

— Ĉar mi ne amas vin.

— Vi mensogas, Johano!... Iomete vi tre, treege mensogetas...

Ŝi karese frapetis la vangojn de Johano. Li toleris la petojn kaj profundigis en reva observado.

— Nu diru, Johano: mi mensogetis, ĉar mi amas vin... Nu diru!

Johano provis kontraŭstari, sed li ne sukcesis.

— Nu diru, mia kara!... Diru do: mi mensogetis, ĉar mi tre amas vin, Katja...

— Ne, ne, ne! Mi ne amas vin. Mi malamas vin, ĉar vi volas forrabi min de la miaj. Mi malamas vin, ĉar vi ŝtelis miajn pensojn kaj sonojn. Mi malamas vin...

La virino jetis sin al la brusto de Johano.

— Miaŭ! Miaŭ! Miaŭoa! Oaoamiaŭ! — eksonis ekstere la voĉo de Petro.

La virino residigis. Ŝiaj trajtoj nerve saltetadis kaj la okuloj jetis fulmojn al la envenanta Petro.

— Bonege vi povas imiti la katojn, sinjoro Doŝky!

— Dankon por la komplimento, sed mi estas nur mizera fuŝisto kompare al la veraj katoj.

Johano, ruĝa pro kolero kaj ekscitiĝo, kun akra tono demandis lin.

— Kial vi miaŭis?

— Mi vidis katinon en la teatro — kaj hungarlingve li aldonis. — Kiom vi donus al iu, kiu hodiaŭ nokte ĝustatempe miaŭus sub la fenestro en la urbo?!

(Daurigota)

## LA MONAĤO PREDIKAS AKVON

ZOLTAN AMBRUS

## LA MONAĤO PREDIKAS AKVON

ZOLTAN AMBRUS



atro Polikarpo faris belegan predikon pri la efiko de l'alkoholo. Kun tondra voĉo li kondamnis tiujn, kiuj, kvankam formitaj laŭ la bildo de Dio, ne hontas sin aĉigi je porkoj kaj la adeptaro kun puriĝinta animo, riĉe en noblaj intencoj kaj sur la lipoj kun la laŭdo de patro Polikarpo, forlasis la preĝejon.

La prioro ne povis sufiĉe laŭdegi la eminentan oratorojn, ankaŭ la ceteraj monaĥoj ne ŝparis la rekonon kaj ĉi tiu eksterordinara efiko faris patron Polikarpon ne ordinare bonhŭmora. En sia ĝojo tro multe li englutis okaze el la vino de Tokaj; tiel ke fine li rampis sub la tablon de l'refektorio kaj komencis kokokrii, asertante ke propre li estas koko kies nepra devo nun jam estas anonci la venon de l'tagiĝo. Oni ne povis al li enkapigi ke li ne estas sur la sterkejo kaj ke propre ankaŭ nun li ja estus patro Polikarpo;

ĝis mateno li kokokriis. Kiam li malebriiĝis, li devis sin anonci ĉe la prioro. La prioro sciigis lin ke konsiderante la meriton akiritan per la oratorajo, ĉi tiun nuran fojon li formetas la punon; sed la mallaŭdajn vortojn kompreneble li ne povis formeti kaj kun mikso de riproĉo kaj miro li demandis ke tiu sama homo, kiu trovis tiel elokventajn vortojn por brulstampi la drinkemon, kiel povis tiel terure forgesi pri si?

— Kial vi trinkis tiom multe?! — li demandis lin. — Kaj ĝuste vi?!...

Patro Polikarpo gratis la nukon; kaj vere li sukcesis kunskrapi la plej bonan senkulpigon.

— Por la kaŭzo de l'pureco mi trinkis — li klarigadis sian pekon. — El du malbonoj mi devis elekti, mi do elektis la pli malgrandan malbonon. Mi konfesas al vi, patro, ke iam kaj iam, kelkfoje min kaptas la tento, peki per la virina besto. Tiutempe mi



scias nur unu manieron por forpeli la malbonon: se mi sufokas ĝin en alkoholo.

— Malbone vi defendas vin, filo Polikarpo — respondis la prioro. — La spertaj paganaj aŭtoroj asertis ĉiam kaj ankaŭ la libroj de l'scienculoj instruas ke *Ceres*, *Bacchus* kaj *Venus* iras kune. La drinko ne nur ne defendas kontraŭ la karnemo, male, je karnemo ĝi logas.

— Jes, se malsaĝe malmulte oni trinkas — respondis patro Polikarpo. — Sed se oni, baraktante inter tentoj, saĝe trinkas multe, tiam oni forgesas pri ĉio, do ankaŭ pri la peko. Kaj kun tia bonintenco, mi povus diri: kun tia sankta celo mi trinkis multe... por peli el mia kapo la pli grandan pekon... kio ankaŭ prosperis.

— Alifoje, — juĝis la prioro, — se denove vin kaptos la tento, fleksu vian intencon prefere al preĝo. Konfidu vin al la providenco. Se helpos vin la preĝo, vi ne devos vin riproĉi; se ĝi ne helpos... eĉ tiam vi havos la senkulpigon ke vi serĉis la ĉielan gracon sur la ĝusta vojo kaj ĉi tiu via senkulpigo akiros la pardonon. Sed ne elektu la certan pekon, timante tion, kio estas malcerta.

— Laŭordone — respondis patro Polikarpo.

Kaj baldaŭ li anoncis sin ke ree li volus fari predikon, kaj ĉi tiun lian deziron, kompreneble, oni volonte plenumis.

Ĉi tiun fojon patro Polikarpo oratoris denove pri la malutila efiko de l'alkoholo, sed nun ne la danĝerojn de l'brando, sed tiun de la vintrinkaĝo li pentris per viglaj koloroj. „Eĉ el bono malutilas multo!“ — li tondris.

Al la prioro plaĉis la parolo.

— Oni povas vidi — li laŭdis en si patron Polikarpon — ke la sperto kaj vera pripento parolas el li. Sincera pripento kaj sperto; ĉiu devas rekoni ke tiu ĉi homo scias kion li diras. Lia peko ne estis do tute vana. Eĉ se per ĝi li malutilis al si, samtempe li akiris sperton: kiamaniere turni la senspertulojn en la ĝustan direkton.

Kaj li ne povis sufiĉe beni la providencon kiu zorgas ke nenio forpasu vane, eĉ ne la malbono.

Sed pro singardemo li nenion diris al patro Polikarpo. Li timis ke patro Polikarpo, trosinfidiĝinte, faros kiel pasintfoje.

Jen estis saĝa antaŭvido, — ĉar patro Polikarpo, aŭdante la flatajn vortojn de siaj kunuloj, denove ensuĉis, pro ĝojo pri la sukcesita malbono.

Sed pro singardemo li nenion diris al patro Polikarpo. Li timis ke patro Polikarpo, trosinfidiĝinte, faros kiel pasintfoje.

Jen estis saĝa antaŭvido, — ĉar patro Polikarpo, aŭdante la flatajn vortojn de siaj kunuloj, denove ensuĉis, pro ĝojo pri la sukcesita parolado, tro multe el la fama nektaro de Tokaj kaj apenaŭ finiĝis la vespermanĝo, li jam ruliĝis sub la tablon.

Sed ĉi tiun fojon li ne kokokriis, sed huris, dirante ke li estas leono.

La postan tagon, kompreneble, li devis respondi pri sia peko.

— Kial vi drinkis denove? — demandis lin la prioro.


— Pro malespero — ekskuzis sin patro Polikarpo. — Miaj ambaŭ piedoj estas plenaj de kaloj kiuj senĉese turmentas min dumire. Kaj tiu ĉi korpa doloro rememorigis al mi miajn animajn dolorojn. Ke vane mi klopodas, mi ne povas eliri de animaj nesufektoj.

— Kaj tiu ĉi malbenita drinkaĝo havas tiun econ ke ĝi forgesigas ĉiun doloron. Ju pli ofte oni trinkas ĝin, des pli ĝi konsolas. Kiam mi jam trinkis tre multe, mi sentis ke mi estas tiel forta, kiel leono kaj tiel sankta, kiel evangelisto. Mi ne sentis miajn kalojn; mi sentis nur la animan pacon de l'beatuloj. Por tiu ĉi kelkmomenta sankta feliĉo mi trinkis. Mi kulpo, mia plej granda kulpo!

— Jes, — respondis la prioro, — ĉi tiu malbenita drinko havas la menciitan econ... sed kiom vi devos repagi por tiu mallonga ebrio kaj kun kiaj usur-rentumoj!... Pro kelkmomenta bonsento vi depagas per tut-taga kapdoloro, per korpa kaj anima ruiniĝo. Alifoje, se via animo doloras, serĉu saniĝon en la preĝo; kaj se la kaloj turmentas vin, eltranĉigu ilin. Kaj nun, por ke mian konsilon pli bone vi gravuru en vian memoron, unu tagon vi meditos en via ĉelo kaj fastos.

— Laŭordone — respondis patro Polikarpo.

Kiam la plej proksiman fojon denove patro Polikarpo devis aperi en la predika seĝo, jam tute ne plaĉis al la prioro ke patro Polikarpo ree tondras pri



la malutila efiko de l'alkoholo. Kvankam ĉi tiun fojon patro Polikarpo eksplikis novan, ĝis nun ne detaligitan ĉapitron de la teksto kaj diris tre prudentajn aferojn. Li klarigis ke la modera, sed regula trinko de vino estas ankoraŭ pli danĝera, ol se oni tre malofte deŝiras la bridon, ĉar la regula uzo de l'venoeno certe muelas la korpon kaj animon.

Kaj la prioro bone konjektis. Patro Polikarpo ankaŭ je la ĝojo de la tria oratoraĵo transdonis sin al la ĝuo de l'vindrinko kaj evidente por eviti la danĝeron de l'modera drinko li plengorĝis tiom el la Tokaj-vino ke fine li plene maceriĝis kaj ree finis sub la tablo. Tie li asertadis ke li ne estas homo, sed azeno, eĉ tia azeno, kiu deŝiras la bridon kaj ĝismatene li piedfrapadis, kriadante: „i. a.“

— Kial vi drinkis denove, malfeliĉulo?! — demandis lin la prioro la postan tagon kiam patro Polikarpo, eldorminte sian ebrion, aperis antaŭ li por ekscii, kia pento atendas lin. — Ĉu vi povas denove prezenti ian novan senkulpigon?!

Li jam estis scivola, kiamaniere klopodos pravigi patro Polikarpo sian nepravigeblan konduton, kiu ĉe neniu estis pli nekomprenebla ol ĝuste ĉe tiu apostolo, kiu per sia tuta elokvento, dum sia tuta vivo luktis konstante kontraŭ la alkoholo.

— Pro scienc-soifo mi trinkis — improvizis la sindefendon patro Polikarpo. — La alkoholo estas sendube veneno, sed la scienco povas mildigi ankaŭ la venenon je medikamento, per la necesa dozado. Ĉar ĉio estas donaco de Dio. Ankaŭ la venenon li donas tial ke ni ĝin ekkonu, ŝanĝu je medikamento kaj uzu por nia utilo. Mi trinkis por akiri sperton, por rekoni, kiu estas tiu dozo, kiu la venenon de l'alkoholo nobligas je medikamento, sed bedaŭrinde mi eraris pri la dozado.

— Vi mensogas, fripono! — kriis la prioro. — Ne la sciencon vi soifis, sed la ebrion donitan de la drinko! Sed vi ja ne evitos la merititan punon, ĉar jen, por semajno mi malpermesas al vi ĉiuspecan viand-mangajaĵon!

Bedaŭrinde ankaŭ ĉi tiu severa puno ne plibonigis patron Polikarpon. Apenaŭ li finis sian kvaran predikon, en kiu li eksplikis per brilegaj vortoj ke nur tiuj povas pretendi tiel same la ĉielan, kiel la teran feliĉon, kiuj perfekte povas sin reteni de la ĝuo de l'alkoholo, eĉ de la ĝuo de plej malmulte da alkoholo — li denove ebriiĝis horizontala.

Sed ĉi tiun fojon sub la tablo li diris ke li estas sincera porko, oni do lasu lin en paco.

Kaj ĝis mateno li gruntis; certe li imagis ke li kuŝas en koto.

La prioro nun jam tre koleris.

— Mi volus scii, — li diris kiam patro Polikarpo hontante eniris al li por peti pardonon kaj indulgon, — ĉu vi trovos ankaŭ nun ian novan pretekston?!... Kial vi drinkis denove?!... Ĉu vi povus diri?

Patro Polikarpo ekgratis la tegmenton de sia cerbo, sed nun jam nenian novan pretekston li povis elgrati de tie.

Tiom longe li serĉis la respondon ke la prioro ripetis la demandon:

— Kial vi drinkis?

En la voĉo de l'prioro estis tiom da minaco ke en patro Polikarpo subite vekiĝis granda decido. Se oni ne trovas akcepteblan mensogon, nenio estas pli saĝa ol esti sincera.

Li fermis la okulojn kaj kun malespera aŭdaco li respondis:

— Ĉar drinki estas bone.

La prioro opiniis ke li ne aŭdas bone.

— Kion vi diris?

Sed la kredo de patro Polikarpo estis forta kaj se li jam komencis, do li konfesis plene.

— Ĉar drinki estas bone — li ripetis. — La vino estas donaco de Dio kaj mi ne estas la unua kiu respektas ĉi tiun donacon. Ankaŭ Noe trovis bona la vinon, tamen li trovis pardonon antaŭ Dio. Kaj se ĝi estas bona, ĝi ne povas esti destinita por tio ke ĝi restu neuzata. Se la malsaĝuloj ne bezonas ĝin, se ekzistas kiuj lasas ĝin kie ĝi estas, senkompate: mi trinkas ĝin pro kompato. Aŭ ĉu aliaj ĝuu ĝin? Ĉu la kulpaj? Aŭ eble la senkreduloj? Kial ne ĝuu ĝin mi, la bonkredulo?

— Kaj vi diras tion ĉi, — indignis la prioro — vi, kiu per tiel belaj predikoj kondamnis la drinkemon?!

— Mi kondamnas la drinkemon ankaŭ nun — respondis patro Polikarpo kuraĝe. — Sed la vero estas Dia kaj la homo estas falema. Kaj mia falemo havas tiun senkulpigon ke, kiel ajn falema mi estas, tamen mi batalas por la vero. Eĉ se mi mem falas, tamen per mia tuta forto mi klopodas ke almenaŭ aliulojn mi retenu de la enkulpiĝo, ke almenaŭ al aliuloj mi malfermu la okulojn kaj klarigu al la sen-spertuloj, en kian damnon kondukas la drinko. Jam sole pro tio mi meritas la vinon. Ĉar la vino estas kelkfoje la armilo de la satano per kiu li logas la malfortulon en kulpon kaj damnon, sed la vino propre tamen, en ĝia boneco, estas donaco de Dio, per kiu li rekompencas la batalanton de vero, la fervorulon de bono, la pur-animulon kaj la moderulon.

— Vi mem diris ke la modera trinko ankoraŭ pli certe muelas la homon ol la sporada eksceso.

— Ĝi ne muelas. Aŭ almenaŭ ĝi ne muelas pli ol aliaĵo... Ĉar jen, la tuta vivo senĉese muelas nin. Kaj ĉi tion mi diris nur tial, ke la homoj ne ekscesu; kaj se mi diras ke ankaŭ la modera drinko estas peko, tiam ili kontentiĝos per la modereco.

La prioro enpensigis.

— Do iru — li diris poste — kaj anoncu vian La prioro enpensigis.

— Do iru — li diris poste — kaj anoncu vian veron! Eble ankaŭ via peko estas la destino de l'providenco... Eble ĝi estas nur por tio ke per tiom pli granda kapablo vi povu laŭdi la virton kaj teni for de aliuloj la malbonon... Ĉiuokaze vi forpentos iom el via kulpo, se — kiel ajn falema vi estas — bonefike vi povas anonci la virton, la sinretenon de la ĝuoj, la scion toleri, rezigni kaj malhavi, kiu estas la fonto de ĉiu vivo kaj sano!

Kaj patro Polikarpo oratoris ankaŭ plu kun tia vervo, tiom da entuziasmo, per tiel elokventaj vortoj kontraŭ la alkoholo, kun tia efiko, tia sukceso li predikis la akvon, nur la akvon!... ke baldaŭ li povis fondi la unuan antialkoholistan federacion, la „Societon de Nepraj Abstemuloj.“ El la hungara: *Karlo Bodó*

# LA KANTO DE L'NAJTINGALO

GABRIELE D'ANNUNZIO

La najtingalo kantis. Komence tio estis kvazaŭ eksplodo de melodia ĝojego, elfeto de facilaj triloj kiuj falis en la aeron sonante kiel perloj resaltantaj sur harmonian vitraron.

Sekvis paŭzo.

Gorĝtrilo leviĝis, facila, eksterordinare daŭra kvazaŭ por fortopruvo, pro memfida fortmovo, pro ekscitiĝo pri nekonata rivalo.

Dua paŭzo.

Trinota temo, demandosenta, trapasis katenon de delikataj variacioj, ripetante kvin-sesfoje la demandeton, kvazaŭ modulate per kanfluteto, per paŝtista ŝalmo.

Tria paŭzo.

La kanto fariĝis elegia, disvolviĝis monotone, dolĉiĝis kiel sopiro, malfortiĝis kvazaŭ ĝeme, esprimis la malĝojon de soleca amanto, malĝojan deziron, varman atendon, eljetis finan alvokon, subitan, akran kiel fort dolora ekkrio; estingiĝis.

Alia paŭzo pli longa.

Aŭdiĝis tiam monotona kantsono, ŝajne ne elirinta de l' sama gorĝeto, tiom humila, timema, plora ĝi estis; tiom ĝi similis la ĉip-ĉipon de ĵus eloviĝin-

taj birdetoj, paserinan pepadon; poste, per mirinda eltorniĝo, tiu naŭva akcento ŝanĝiĝis en progresantan ĉiam pli rapidan notserion kiu brilis per alta trilado, vibris en puraj gorĝkantoj, fleksiĝis en maltimajn nottrairojn, malpliĝis, krescendis, atingis sopranajn altecojn.

La boskpoeto ebriiĝis per sia kanto.

Kun paŭzoj tiom mallongaj ke la notoj ne finis sian estingiĝon, ĝi elverŝis sian ebriegion en ĉiam variantan melodion, pasian kaj dolĉan, mallaŭtan kaj sonoratan, facilan kaj profundan, interrompita jen de raŭkaj ĝemoj, jen de plendaj plorpetoj, jen de neatenditaj lirikaĵoj formovoj, de lastaj alpreĝoj

Ŝajnis kvazaŭ la ĝardeno ĝin aŭskultus, la ĉielo kliniĝus al la melankolia arbo, de kies pinto poeto nevidebla elverŝis tiajn poeziajn ondojn. La ĝardeno floraro havis profundan sed silentan spiradon.

Kelkaj flavaj lumbriloj malfruis okcidente kaj tiu lasta rigardo de l' tago estis dolora, kvazaŭ funebra. Sed stelo ekaperis tutviva, tremetanta kiel luma rosguto.

El la itala: *Teo H. Rok'*

## ARTO KAJ ARTISTOJ

PAULO VARSÁNYI: LA ITALA ARTO. VENECIAJ SKOLOJ

(Daŭrigo\*)

Oni multfoje deklaris, ke *Savonarola* malutilis la liberan evoluadon de l' arto. Oni nomis lin „tom-bisto de l' arto“, forgesante, ke, male, la arto ŝuldas al li grandan dankon. Ĉar li malkovris por la arto fontojn, ĝis tiam nekonatajn. Li montris vojojn al la plejinterno de l' homa animo kaj la arto ekiris laŭ la signoj donitaj de li. La liberan evoluadon li do ne malhelpis, sed li konsciigis la dormetantajn individuajn trajtojn je pli profunda kaj pli vera naturpercepto ol la nura naturalismo. Liaj artaj principoj, ĝerintaj en la transpiritiĝo de l' religia fanatismo, ne restis senefikaj kaj ili estas proveblaj en verkoj de multaj pentristoj de tiu epoko. Liaj ten-encoj belege realiĝis en la pentrista genio de l' Renesanco: *Lionardo da Vinci*, kies verkoj mem estas psikologiaj enigmoj.

transpiritiĝo de l' religia fanatismo, ne restis senefikaj kaj ili estas proveblaj en verkoj de multaj pentristoj de tiu epoko. Liaj ten-encoj belege realiĝis en la pentrista genio de l' Renesanco: *Lionardo da Vinci*, kies verkoj mem estas psikologiaj enigmoj.

*Savonarola* finis sian vivon sur ŝtiparo, sur la *Piazza della Signoria* en *Firenze*. Post lia morto reviviĝis la ekzilita vivĝojo. Denove regis la senĝena plezuro, oni denove rerigardis al la greka orepoko, enspirante la aeron de l' mitoj, avide ĝuante la erotiĉajn historiojn de l' dioj. Senseco kaj senreligieco estas la ĉefaj trajtoj de la Italio de l' XVI-a centjaro. *Luther* profunde indigniĝis pro la tieaj cirkonstancoj: „Se ni estus devigataj — diras la italoj — sekvi en ĉio la vorton de Dio, ni estus la plej mizeraj homoj de l' mondo kaj neniam havus eĉ unu gajan minuton. Oni faru pian mienon, sed oni ne devas kredi ĉion.“

\*

La brila kolorigo ĉiam estis eminenta trajto de l' veneciaj artistoj. *Giovanni Bellini*, kvankam li jam

\* Komenco en la aprila nomero de l' pasinta jaro.

montras iom pitoreskan koncepton, ankoraŭ ne povis atingi la veran, koloran prezentadon, ĉar en liaj bildoj la desegnaĵoj elementoj estis ankoraŭ en plimulto. La plenan harmonion ektivigis liaj grandnombraj disĉiploj.

*Giorgio da Castelfranco* (1477—1510), kun *Palma* kaj *Tiziano*, devenas el la skolo de *Giov. Bellini*. Lia efektiva nomo estis *Giorgio Barbarelli*, *Giorgione* (granda *Georgo*) estas artistnomo donita de la admirantaj samtempoj. En la *Castelfranco*'a preĝejo *S. Liberale* — kie li estas enterigita — super la ĉefaltaro estas videbla la ĉefverko de lia vivo: „*Madono kun St. Liberale kaj St. Francisco*“. Ĉi tiu bildo videble estas senpera daŭrigo de l' *Bellini*'aj tradicioj kaj ĝi nemulte diferencas de liaj „*Santa Conversazione*“. *Maria*, sur alta piedestalo, tenas la etan *Jesumon*; sube, maldekstre debila la ĉefverko de lia vivo: „*Madono kun St. Liberale kaj St. Francisco*“. Ĉi tiu bildo videble estas senpera daŭrigo de l' *Bellini*'aj tradicioj kaj ĝi nemulte diferencas de liaj „*Santa Conversazione*“. *Maria*, sur alta piedestalo, tenas la etan *Jesumon*; sube, maldekstre staras la junvizaĝa *St. Liberale* en kiraso, kaj dekstre *St. Francisco* en bruna kapuĉo. La vizaĝoj de l' sanktuloj montras silentan ekstazon; *Maria* rigardas kun mildaj, revaj okuloj. La malantaŭa pejzaĝo de *Castelfranco*, bananta sin en la ora brilo de l' mortanta suno, formas poezie harmonian fonon. La tutan bildon vualas ia mistikeco, ia melankolio, kvazaŭ sopiro.

Sur la dorsflanko de l' bildo estas videblaj la vortoj: „*Mia kara Cecilia*, venu, rapidu, vin atendas via *Giorgio*“. Laŭ la priskribo de *Vasari*, *Giorgione* avide sin donis al la ĝojoj de l' amo. Dum silentaj, lunlumaj noktoj, kiel amanta kavaliro, li vagadis tra stratoj kaj kantis mildajn serenadojn sub fenestroj de belulinoj. La sorto portis en lian vivon la ĉarman figuron de *Cecilia* kaj ŝi iĝis lia muzo, la revanta *Madono de Castelfranco*.

Giorgione okupis sin pleje pri freskopentrado. Sed liaj bildoj detruigis pro la sala mara haladzo de Venecio jam en la XVI-a centjaro. La nombro de liaj olepentraĵoj estis tre malgranda kaj el ili estas tre malmultaj la aŭtentikaj bildoj. La moderna artkritiko, post longaj pridiskutoj, unuvoĉe akceptis nur kvin, kiuj estas la jenaj: 1. „Madono kun St. Liberale kaj St. Francisco, pentrita ĉ. 1504 por *Tuzio Constanzo*, kondotiero; nun en la *Castelfranco'a* preĝejo *St. Liberale*. 2. Laŭ temo nesolvebla bildo, nomita „Ventega pejzaĝo“ aŭ — laŭ aliuloj — „*Familio de Giorgione*“; nun en Venecio: Pinakoteko *Giovanelli*. 3. „Kampa koncerto“; nun en *Firenze*: Pinakoteko *Pitti*. 4. „*Aeneas, Evander kaj Pallas*“ aŭ — laŭ aliuloj — „*Orientaj saĝuloj*“; Vieno: Arthistoria Muzeo. 5. „*Venus*“; Dresden: Pinakoteko.

La enhavo de l' „Ventega pejzaĝo“ estas necerta. Sed ĝia temo estas por ni tute indiferenta. Nin interesas nur la psikaj trajtoj de l' bildo; psike — kiel ĉiuj majstroverkoj — ĉi tiu bildo estas perceptebla nur en inspirita animstato, ĝi vekas en ni tiel delikatan teksaĵon de sentoj, kiu — kiel la misteraĵoj — ne estas esprimebla per vortoj. Ĝi estas kvazaŭ rido, tra kiu aperas antaŭ ni nova mondo de artisto, perfuĝinta el la ĉiutaga vivo. Ĉi tiu nova mondo estis vivbezono de lia animo kaj lia tuta vivenhavo. Giorgione ne estis nura sekvanto de skolaj tradicioj sed artisto serĉanta siajn proprajn individuajn trajtojn. Ĉi

tiuj trajtoj estas facile rekoneblaj en liaj bildoj kaj la enhavo de ĉiuj estas la sama: mistikaj sentoj, forflugantaj emocioj de ĉiam serĉanta kaj neniam kontentigita artista animo. La absoluta harmonio estis kion li serĉis kaj liaj bildoj estas eukorpiĝintaj variaĵoj de la mondo de l' absoluta harmonio, prisionĝita de li en melankolia nostalgio. Liaj figuroj estas sinforge senmovaj, vivantaj en lando de sonĝoj kaj kvazaŭ fandiĝintaj en la travivo de ia supertera sento: en ili la animo de l' artisto mem revadas.

La Viena bildo montras al ni la saman vivpercepton. Laŭ nova vidpunkto, ĝi figuras la viziton de *Aeneas* ĉe *Evander*. Sendube aŭtentika lia bildo estas la „*Venus*“ en la *Dresden'a* pinakoteko. Ĝian pejzaĝan fonon pretigis *Tiziano*. Pli poezie idealigitan bildon de virina korpo pentristo ankoraŭ ne povis krei. Krom la supraj bildoj ni havas gravuraĵan kopion el la XVII-a centjaro pri unu el liaj perdiĝintaj bildoj nome „*Ektrovo de Paris*“, de *T. van Kessel*. Peco de olea kopio samtempa kun ĝi estas videbla en la Muzeo de l' *Belaj Artoj de Budapeŝto*, kaj ĝi montras du paŝtistojn. Giorgione donis novan spiriton al la venecia arto. Liaj samtempoj ĉirkaŭis lin kun granda admiro. Lia afiko je la veneciaj pentristoj estis tre fruktodona. Li postlasis du disĉiplojn, kiuj iĝis la plej eminentaj sekvantoj de lia arto: *Sebastiano del Piombo* kaj *Tiziano-Veccellio*.

## M A R S E L J E Z O

L E O N I D A S   A N D R E J E V



Li estis malnoblulo: leporanimo kaj senhonta pacienco de laborbruto. Kiam la sorto moke kaj malice ĵetis lin en niajn nigrajn vicojn, ni ridadis kvazaŭ frenezuloj: ja ofte okazas tiaj ridindaj, tiaj sensencaj eraroj. Sed li — li, kompreneble, ploris. Dum la tuta vivo mi neniam renkontis homon, kiu havus pli multajn larmojn, kaj ili fluadis tiel volonte el la okuloj, el la nazo, el la buŝo. Kvazaŭ spongo — trasorbiĝinta per akvo kaj premita en pugno. Ankaŭ en niaj vicoj mi vidis plorantajn virojn, sed iliaj larmoj estis — fajro, de kiu ĉiam forkuris sovaĝaj bestoj. Pro ĉi tiuj viraj larmoj maljuniĝis la vizaĝo kaj la okuloj estis junide kiu ĉiam forkuris sovaĝaj bestoj. Pro ĉi tiuj viraj larmoj maljuniĝis la vizaĝo kaj la okuloj estis junigitaj: kiel lafo, eligita el ardanta interno de l' tero, ili bruligis neforviŝeblajn postsignojn kaj enterigis sub si tutajn urbojn de malnoblaj deziroj kaj bagatelaĵ zorgoj. Sed se tiu ĉi homo ploras, ruĝiĝas la nazo kaj la tuko estas malsekigita. Verŝajne, li sekigis ĝin poste sur ŝnuroj, alie de kie li povis preni tiom da naztukoj?

Dum ĉiuj tagoj de l' ekzilo li iradis al estroj, al ĉiuj estroj, kiaj nur estis kaj kiuj estis por li elpenseblaj, salutis, ploris, ĵuris je sia senkulpeco, petegis kompati lian Junecon, promesis dumvive ne malfermi buŝon, eble nur por petegoj kaj laŭddiroj. Sed ili mokis lin, kiel ni, kaj nomaĉis lin „malgranda malfeliĉa porko“, kriante al li:

— Hej vi, malgranda porko.

Kaj li obee kuris je alvoko: ĉiufoje pensante ekaŭdi sciigojn pri reveno al la patrujo, sed ili nur ŝercis. Ili, samkiel ni, sciis pri lia senkulpeco, sed

deziris, turmentante lin, timigi aliajn malgrandajn porkojn, — kvazaŭ ili ankoraŭ ne estus sufiĉe malkuraĝemaj!

Besta timo je soleco pelis lin al ni, sed severaj kaj senesprimaj estis niaj vizaĝoj kaj sentezulte li serĉis ŝlosilon. Li ofte nomis nin karaj kamaradoj kaj amikoj, sed balancante la kapon ni diris:

— Gardu vin: oni vin ekaŭdos.

Kaj li rigardis la pordon, ĉi malgranda porko. Nu, ĉu efektive estis konservebla la seriozeco!

Ni ridadis per voĉoj malkutimigitaj al rido, kaj li, kuraĝigite kaj ĝojigite, alsidiĝis pli proksime kaj rakontis, kaj ploris pri siaj ŝatataj libretoj, lasitaj sur tablo, pri sia panjo kaj frateto, pri kiuj li ne sciis, ĉu ili vivas aŭ jam mortis pro timo kaj ĉagreno.

Fine ni forpelis lin.

Kiam komenciĝis malsatstrikio, timego lin ekposedis — neesprimeble komika timego. Ja li ŝatas manĝi, kompatinda porko, kaj li timegis la karajn kamaradojn kaj tre timis le estrojn: distrite li vagadis inter ni kaj ofte viŝis per tuko sian frunton, sur kiu eliĝis io — larmoj aŭ ŝvito. Kaj malcerte li demandis min:

— Ĉu vi longe malsatstrikos?

— Longe, — severe mi respondis.

— Ĉu sekrete vi nenion manĝos?

— Panjo sendados al ni kuketojn, — serioze konsentis mi.

Li malfide rigardis min, balancis la kapon, kaj, ĝemspirinte, foriris. Sekvintan tagon li, verda pro timo kvazaŭ papago, anoncis:

— Karaj kamaradoj! Mi ankaŭ kun vi ne manĝos.

Kaj estis kolektiva respondo:

— Malsatu sola.

Kaj li ne manĝis! Ni ne kredis; samkiel vi, ni pensis, ke li ion sekrete manĝas, kaj same pensis la gardistoj. Kiam fine pro la malsatstrikio li malsaniĝis je malsattifo, ni nur eklevis la ŝultrajn: kompatinda, malgranda porko! Sed unu el ni — tiu, kiu neniam ridis, malgaje ekparolis:

— Li estas nia kamarado. Ni iru al li.

Li deliris, kaj kompatinda, kiel tuta lia vivo, estis ankaŭ ĉi tiu sensenca deliro. Pri siaj ŝatataj libretoj li parolis, pri panjo kaj frateto; li petis kuketojn, — malvarmajn kiel glacio, bongustajn kuketojn, kaj ĵuris ke li estas senkulpa, petante pardonon. Kaj la patrujon li vokis, vokis la karan Francion.

— Ho, estu malbenita la malforta homkoro.

Li animon ŝiradis, vokante: kara Francio! Ni ĉiuj ĉeestis en la ĉambro, kiam li agoniis. La konscio revenis al li nur antaŭ la morto, kaj silente li kuŝis, tiel malgranda, malforta, kaj silente ni, liaj kamaradoj, staris. Kaj ni ĉiuj, senescepte estis aŭdintaj kiam li diris:

— Se mi mortos, ekkantu la „Marseljezon“.

— Kion vi diras! — ekkriis ni, tremante pro ĝojo kaj ekscitita kolero. Kaj li ripetis:

— Se mi mortos, ekkantu la „Marseljezon“.

— Kaj la unuan fojon okazis, ke liaj okuloj estis sekaj, sed ni — ni ploris, ploris ĉiuj senescepte, kaj kiel fajro, de kiu forkuras bestoj, brulis niaj larmoj.

Li mortis, kaj ni kantis la „Marseljezon“. Per junaj kaj fortaj voĉoj ni kantis la famekonatan kanton de l'libero, kaj minace akompanis nin la oceano, portante la karan Francion sur siaj ondsupraĵoj, palan timegon kaj sange-ruĝan esperon. Por ĉiam li restis nia signo, — ĉi tiu malnoblulo kun karno de leporo kaj laborbruto — kaj kun granda animo de homo.

Genustaru kamaradoj kaj amikoj antaŭ heroo! Ni kantis. Nin rigardis pafiloj, minace tintadis iliaj ĉanoj kaj akraj pikiloj de bajonetoj etendiĝis al niaj koroj, — sed pli laŭte, pli ĝoje sonis la minaca kanto, en delikataj manoj de batalantoj malrapide balanciĝis nigra ĉerko.

Ni kantis la „Marseljezon“!

*El la rusa: H. Halpern*

## ĈU REMEMORI?

(ELEGIO)

*El la rusa: H. Halpern*

## ĈU REMEMORI?

(ELEGIO)

Ĉu rememori? . . . Ha! vi estis rave bela,  
Mi estis juna kaj ne timis la estonton.  
Sub sonoj de muzik' en salonego hela  
Memoras mi unuan nian ekrenkonton.

Ridadi, gaji, danci tuj ni ekforĝesis,  
La mano en la man' ni pie nin izolis,  
La tutan mondon rimarkadl ĉesis  
Kaj vivi la antaŭan vivon plu ne vells . . .

Dekjaroj pasis. Ŝajnis nur momento.  
Nun niaj idoj, kiel ni, kun rido dancas . . .  
Ĉu ili spertos pri la nova viv' kaj sento?  
Aŭ ĉion, kiel ni, ripeti pupe ŝancas?

Demandi rajtas ni, sentante nian finon,  
Kaj serĉas en okuloj de l'infan', konsolon:  
Ĉu tie ĉi plenumas ian ni destinton?  
Sed se l'viv' estas fum', por kio ludi rolon . . .

## STELDANCADO

K. D. BALMONT

I.

Baju — baju — baju — baju —  
Mi aŭdas kanton emocian.  
Mi kaŝos pensojn de l'enu'.  
Doloron sorĉos mi konscian.  
Trovita mia stel' en blu',  
Per ĝi mi trovis harpon mian.  
Baju — baju — baju — baju —

II.

Flamon hele	Multo estos,	Gajan flamon,
Jen funele	Kio restos	Gemornamon
Montras mi.	Sen memor'.	Faros mi,
Mi bruliĝas,	Flugu horo	Kaj rubene
Etingiĝas	Kun sonoro	Brilos jene
Tie ĉi.	Al la hor'.	La glaci'.
Mi — instiga	En radio	Flugas horo
Kaj gajiga	Kaj pasio	De l'aŭroro
Meteor' —	Estas lim',	Per ruĝond',
Ludas kante	Planedara	Tondro bolas:
Kaj kredante	Kaj senbara	Mi parolas
En la hor'.	Malproksim'.	Super mond'.
Estis brila	Je momento	Fulmekbato:
Fajrflugila	Mi en vento	En boato
Luma fort'.	Flugas jen.	Naĝos mi,
Ĉion multe	Mi min klinas,	Nun mi festas,
Kaj tumulte	Iluminas	Fakta estas
Prenis mort'.	En maten'	Songebri'.

Mi — nur ido  
Kun la rido,  
Juna ĝu'.  
Dum mi sonas,  
Ne rekonas  
Min vi, ĉu?

III.

Sun' ekbrulis. Glavo estas la radi'.  
Sur ĉevalo flugas, flugas, flugas mi.  
Step'tintanta. Mankas domo sur eben'.  
Birdojn volas vi? Tre multaj birdoj jen.  
Ĉu kolera besto vokas en sovaĝ'?  
Kuru kontraŭ ĝi! Antaŭen kun kurag'!  
Mia fajrĉeval'. Egalas kiu ĝin?  
Tra mallum' velura ĝi traportis min.  
Vidas longen ĝi. Kaj gardas per ore!'.  
Kiel viv' kurante, portas min sur sel'.  
Mia konĉevalo. Brido: la radi'.  
Ne faletos, ho, neniam falos ĝi.  
Kien mi kun la ĉeval'? Silentu dir'!  
Tutan stepon koni estas la dezir'.

IV.

Ah, longegaj kiom estas tiuj ombroj. Kurbaj. Strabaj. Sen finaj!  
Estis longaj. Jam pli longaj. Pli mallumaj. Ne videbla la vizaĝ'.  
Ne faletos, ho, neniam falos ĝi.

Kien mi kun la ĉeval'? Silentu dir'!  
Tutan stepon koni estas la dezir'.

IV.

Ah, longegaj kiom estas tiuj ombroj. Kurbaj. Strabaj. Sen finaj!  
Estis longaj. Jam pli longaj. Pli mallumaj. Ne videbla la vizaĝ'.  
Estis suno. Brulis arde. Ruĝaglobe ĝi forrulis en la volv'!  
Ĉu jam ĉio? Hufsonoro. Piedbatoj. Vojo longa en la polv'!  
Ah, ĝemplendas kiom vento. Polvon portas. Polvon tordas en la bul'  
Kiom ili, la polveroj. Ĉu kalkuli? Tro terura la kalkul'.  
Mi veturas. Kiu? Kio? Kie? Vagas la rigardo tra eben'.  
Mi min vidas elinterne kaj ne scias, ĉu mi estas tie jen.  
Stranga fajfo flugas supre. Eretaroj Apenaŭta eta gliit'. [rilo. Lit'.  
Murmuret! Susur'! Bordero. Vok'!. Ripoz'! Rifuĝo. Dorm'. Kov-  
Kie? Kio mi? Ĉevalo mia blanka. Mi en neĝ! Ah, lasu min.  
En senbordo En senfundo. En lumajo. Mi endormas. Dronas. Fundo.  
Estas fin.

V.

Serpenton en ĉiela blu'  
Konstelacioj faris ĉene  
Laŭ spac' de l'Vivoevol'u'.  
Vualoj kiaj jen ebene  
Trankvilas en jarcenta flui'.  
Kaj steloj spiras senĉagrene;  
Baju — baju — baju — baju.

# BIBLIOGRAFI O

NOVA SENTO

Jen titolo de originala romano. La aŭtoro kaŝas sin sub la pseŭdonimo Tagulo. La verko aperis dum la milito, antaŭ dek jaroj, ĉe la Brita Esp. Asocio, rapide elvendigis kaj apenaŭ estas konata en niaj rondoj. Kvankam la verko meritis vastan konatecon, ĉar laŭ formo kaj enhavo ĝi havas vere frapantan originalecon.

Jen, resume, la enhavo de ĉi tiu „filozofia romano“.

En la komenco de la romano ni trovas nin en Londono, kie la vivon de la malriĉaj senlaboruloj la aŭtoro pentras per realismaj koloroj. Nun okazas neatendita afero, kometo flugas en nian sunsistemon kaj faras grandajn konfuzojn inter la planedoj. La heroo de la romano veturas per aviadilo kun sia amiko ĝuste kiam la Marso tre apoksimiĝis la Teron. Li akcidentas, perdas sian konscion kaj regajnas ĝin — sur la Marso. Okazis reenkarntigo, kutima al la Marsanoj. Ili scias ĉion pri la Tera vivo, disponas pri mirindaj spiritaj kapabloj kaj vivas en granda harmonio. Ili instruas al nia heroo la Marsan lingvon kaj petas lin ke li priskribu sian Teran vivon. Tiamaniere la verkinto havas okazon pripentri la Marsan socion, tio estas, la perfektan socion. En la maniero de B. Shaw (interese estas, ke ĉi tiu romano, simila al la romano de Shaw: Portretoj de Dio, pretiĝis multe pli antaŭe) ni vidas la kontrastojn, ofte tre akrajn, de nia malperfekta socio, projekciitajn sur la ideala rolo de tiu perfekta, Marsa socio. Oni plurfoje povus kontraŭdiri la opiniojn de la verkisto, sed ne eble nei lian originalecon. Post longa meditado pri la Marsa socio, nia aviadisto retrovas sian ŝajne perditan amikon, reenkarntigintan, strange, en virina formo. Ili geedziĝas. Fino de l' historio.

La romano de s-ro Tagulo estas nekontesteble *tendenca* romano; li uzas la formon de romano por propagi siajn ideojn. La forta flanko de la romano estas ne ĝuste la temo, sed la maniero kaj formo, la pensoj kaj citaĵoj de l'aŭtoro. La libro diferencas de la aliaj libroj ankaŭ laŭ ia eksterajo. Ĝi estas presita sur paleverda papero per brunaj literoj. La verdeta papero estas tre agrabla al la okuloj, sed literojn mi preferus nigrajn. La interesaj desegnaĵoj estas faritaj de la aŭtoro mem.

Teozofia estas la karaktero de la libro, ĝiajn enhavon, formon, pensojn determinis la teozofio de l'aŭtoro. Eĉ se ne ĉiu povas akcepti senrezerve la tutan tendencon kaj ĉiun lian penson, la libro, pro sia intereso, nobla enhavo kaj bona stilo meritis esti konata en kiel eble plej vasta rondo.

Sinjoro Tagulo estas Londonano. Dum mia restado tie, mi havis okazon informiĝi pri lia personeco. Mi ne miris eksciinte ke li estas arkitekto, oni povas tion diveni el la detalaj priskriboj de la Marsaj konstruaĵoj. La Marsanoj konstruas ĉion el sukkena materialo, sen anguloj, en tre estetikaj, simetriaj formoj. Pureco, beleco, simpleco, jen la sankta triunuo de la moderna arkitekturo, kiu manifestiĝas per la plumo de moderna arkitekto en ĉi tiu fantazia verko.

Kaj mi ne miris, ke la aŭtoro estas liberpensulo, teozofiano kaj pacifisto. Mi ne miris, ke li estas solema, enpensigema, kiu sidas ofte longan tempon, nenion dirante, droninte en meditado, fiksante revan rigardon al la ĉielaj bluoj senlimaj. Ĉion ĉi bone montras lia reva verko, en kiu li donacis al ni la belajn iluziojn kaj kuraĝajn fantaziojn de sia animo.

Ĉi bone montras lia reva verko, en kiu li donacis al ni la belajn iluziojn kaj kuraĝajn fantaziojn de sia animo.

La „Nova Sento“ meritis respreson.

Jozejo Major

## SHAKESPEARE: LA TRAGEDIO DE REĜO LEAR.

El la angla: A. L. Curry kaj A. J. Ashley. Huddersfield. Yorkshire. Anglujo.

La tragedio mem? Ĉiu konas ĝin, la tragedion de grandioza maljunulo, kiu fariĝis viktimo de sia eraro. Li abdikas pri siaj rajtoj kaj li fariĝas senrajtulo, li fidas je vortoj kaj la vortoj trompas lin. Kaj sur ĉi tiu fundamento stariĝas inkube kolosa konstruaĵo, problemo de patro kaj infano. Patro batalas kontraŭ filinoj, alia patro kontraŭ filo kaj ĉi tiu paralela batalo, grandigante je superhomaj dimensioj, tremigas la teron per siaj eksplodoj teruraj, per sia animkatenanta furoro. En ĉiu sceno sekvas nova, pli terura teruraĵo, kvazaŭ montoj ŝetitaj sur montojn, ĝis fine la tuta scenejo estas fajrovoma vulkaninsulo, kie devos pereji ĉiu vivanta estaĵo.

Ho kiel malforta estas tiu ĉi priskribo!

Kaj la traduko? Ĝi estis certe granda kaj malfacila laboro. Kaj tre kuraĝa entreprenado. Oni nepre devas rekoni ĉi tiun kuraĝon, sed pri ĝia sukceso oni apenaŭ povus uzi la vortojn de senrezerva rekono.

Ofte ni diras kaj aŭdas, ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Kaj tio ja estas vera. Tio signifas ke Esperanto havas sian propran spiriton, kaj gramatike senerara lingvaĵo povas impresi strange, nenature, peze, fremdmaniere, se ĉi tiu spirito mankas. Malfacile estas diri kio estas tiu ĉi spirito, sed facile estas rimarki ĝian mankon per tio ke dum lego oni devas atenti ne pri la arta enhavo, sed pri la klara kompreno de la frazoj, ke oni estas ofte haltigata per ne konvene uzata vorto, ke oni ofte rimarkas: jen, mi legas en artefarita lingvo. Granda ekzerco, funda studo de la klasikaj Esperantaj verkoj, vigla sento pri la logiko kaj gusto de la lingvo, sagaco, sprito, eltrovemo kaj ama pacienco necesas por tio ke tradukante oni povu kontraŭstari la tentantan spiriton de la nacia lingvo kaj tamen reprodukti ĉiun stilspecialaĵon per Esperanta ekvalento aŭ per ĝenerale komprenebla, sed tamen frapanta kaj „suka“ esprimo. La Esperanta tradukanto havas ĉi rilate multe pli malfacilan taskon ol la nacilingva. Li ne ĉiam povas preni el la preta materialo, ĝin ofte li devas krei mem, aŭ denovre eltrovi, ĉar ne ekzistas ankoraŭ kompletaj esprimvortaroj enhavantaj ĉiujn solvojn, jam uzitajn por nacilin-vaj esprimoj.

La tragedioj de Shakespeare estas plenaj de tiaj sukaj esprimoj, laŭverboj diroj, vortludoj. Oni ja povas traduki ilin laŭvorte (tion nur angloj komprenos), diri, per simplaj vortoj, nur ilian enhavon (tio estas kruela senspico de la teksto), klarigi ilin en noto (tio forprenas la tutan artan efekton). Kaj oni povas apliki la supran metodon. (Tio estas grandioza pliriĉigo de nia esprimvortaro).

Ĉi tiun lastan metodon, bedaŭrinde, la tradukintoj plej malofte uzis. Oni apenaŭ povus fari riĉan liston el „fine trovitaj“ esprimoj.

Sed eble ni postulas tro multe.

Tamen, ne. Tia ĉefverko devigas la tradukanton. Ĝin ja bezonas propre ne la legantoj (ili povas ĝin legi en bonaj naciaj tradukoj) sed la lingvo mem por pliriĉigo.

Rilate lingvajn detalojn mi notis superfluajn artikolojn, superfluan „vi“ apud ordona verbo, „mi ne kun li parolos“ (kun kiu do?) anstataŭ „kun li mi ne parolos“, „fariĝi“ anst. „fari“ kaj aliajn kiujn mi multfoje jam riproĉis kaj kiujn ĉiam ripeti estas enue. Sed plej malagrabla estas la mallerta vortordo, kaj stranga frazformado kiuj konfuzas la ekvilibron de la frazoj, devigas nin kunserĉi la vortojn kaj la sencon. Kaj ĉi tion ne ĉiam ni sukcesas trovi; malgraŭ ĉia enigmosolva peno restas kaŝita ekzemple la senco de la jenaj frazoj:

„... mi ne forvagiĝis  
tiel de via amo, kiel vin  
aligi kie mi malamas.“

„... mia bonintenco eble  
efektivigos sin ĝis tiu celo,  
por trafi kiun mi aspekton propran  
forviŝis.“

Kaj eble la plej granda enigmo:

„... Vere, tio ŝajnas  
klimaks' al kiu amas ne malĝojon;  
ali!, tro pliligante malpliigus  
kaj pretrekstremiĝus.“

Kompreneble ne la tuta teksto estas tia, kelkfoje duonpaĝoj estas legeblaj sen cerbumo. Sed ankaŭ dum ilia lego ni sentas ian distancon inter ni kaj la verko kaj post finlego ni estas iom lacaj pro la mensa laboro, kiu kostis la kompreno de la teksto.

Do, malgraŭ nia laŭdemo kaj ĝojo pri la pliriĉigo de nia literaturo ni devas diri, ke la tradukon ni same ne rigardas definitiva solvo kiel la Faŭst-tradukon de R. Barthelmess.

Kopar.

## E L D R A M O J.

Fragmentoj el „Ifigenio en Taŭrido“ de Goethe kaj el „La Rabistoj“ de Schiller. Tradukis Dro L. L. Zamenhof.

## AMORO KAJ PSIĤE

Lucius Apulejus. Tradukis Emilio Pfeffer. La verkojn eldonis Esperanto-Verlag Ellersiek kaj Borel G. mb. H. Berlin kaj Dresden. Prezo 0'30 gmk.

La 7-a kaj 12-a numeroj de „Esperanto Biblioteko Internacia“ aperis en dua eldono. La reapero donas novan eblecon por la plej vastaj rondoj ekkoni la Zamenhof'an stilon, samtempe ili plenumas utilan servon por propagando de Esperanto per la nomoj de la famaj aŭtoroj. Ni varme rekomendas ambaŭ verketojn al la publiko, kiu legante la interesajn kajerojn profitos veran ĝuon de la altvaloraj literaturaĵoj.

dr-oth

## LET ERK EST O

J. G. C. En la dua numero de nia revuo, sub la rubriko „Disputo“ ni pritraktis la demandon de Esp. ritmo, esperante interesigon, vigan diskuton kaj, kiel rezulton, fine ritman unuecon en Esperantujo. Certe vi ne legis tiun artikolon, male vi estus protestinta — aŭ konformiginta. Tial ni denove prenas la malnovan temon.

Rilate viajn rimarkojn estas neeble nun respondi tute *detale*, ĉar tio kostus tutan libron. Sed eble per la pritrakto de la t. n. *blanka verso* aŭ dekonusilaba jambo ni povos klarigi iom la aferon. Ĉi tiu versformo troviĝas en tre multaj klasikaj dramoj, inter aliaj en ĉiuj tragedioj de Shakespeare, do estas grave interkonsenti pri ĝia formo, atingi fine *unuecon*. Estas neeble, ke ĉiu tradukanto lmitu la ritmoregulojn de sia nacia lingvo en tia tute internacia versformo, oni devas havi por ĝi la Esperantajn regulojn, al kiuj ĉiu tradukanto devas sin teni same, kiel li tenus sin al la reguloj de sia naciolingva ritmiko, se li tradukus el fremda lingvo nacilingven. Ĉar ĉi okaze, ĉu ne, li ne tenus sin al la ritmiko de tiu fremda lingvo, el kiu li tradukas.

Kiu metriko estas bona en tiu lingvo? Tiu, kiu konvenas al la spirito kaj strukturo de la respektiva lingvo. En Esperanto ekzemple tute ne taŭgus la greko-romanaj ritmoreguloj, kiuj mezuras la longon de vokalo laŭ la nombro de la postsekvantaj konsonantoj. Laŭ ĉi tiu ritmiko la ritma skemo de „tondradi“ estus: — — —. Sed en Esperanto la akcentado estas tiel forta, ke ĝi forviŝas ĉiun alian konsideron. Do la ritma skemo de la supra vorto estas: — — —.

Tradukante el la latina, ni do ne povas uzi ĝian ritmikon, ni tradukas per Esperanta ritmiko, laŭ kiu anstataŭ *longa* ni prenas *akcentan*, anstataŭ *mallonga* ni prenas *senakcentan* silabon. Sed same ni ne povas uzi la metrikon de aliaj lingvoj, kies karaktero ne estas konforma al tiu de Esperanto.

Sed pri ĉi tio poste.

La blankverso ĉe Zamenhof (en la traduko de Hamlet kaj Ifigenio) sekvas la severan jamban skemon: „Ĝi estas jam afero decidita.“ (Hamlet) „Al viaj ombroj, pintoj moviĝemaj“ (Ifigenio).

Ĉi tiu skemo vere ŝajnas konveni al nia lingvo; la versoj marŝas bele, harmonie, glate, sen akcentkaramboj. Ĝia sola difekto estas, ke la unua silabo en la verso devas esti ĉiam *senakcenta*, dum la Esp. demandaj, montraj, rilataj pronomoj, starantaj precipe en la komenco de la frazo, estas *dusilabaj*, kun akcento sur la *unua* silabo. Oni ja povus helpi per inversoj, sed, se sonas tolereble:

„Vi kie estis dum la tuta tago?“

estus tute nenaturaj, neakcepteblaj.

„Aŭskultas kiu la parolon gravan“,

„Vi venis kiam, mi ne vidis vin.“

La lingva sento batalas ĉi tie kontraŭ la ritma rigoreco. Ĉe Zamenhof feliĉe venkis la unua. Ekzemple:

„Kiun mi vidis jam la duan fojon“ (Hamlet).

Ni vidas, ke en la komenco anstataŭ du jamboj (— / — —) staras horiambo (— — — —). Ĉi tio tute ne estas peko, sed deviga konformiĝo al la naturo de nia lingvo. Kaj ĝi estas bela! La anapesta ekkuro (— — —) donas elegantan svingon al la verso.

Alla permeso estas, ke ni uzas en la mezo de la verso anstataŭ tri jamboj (— — / — — / — —) du anapestojn (— — — / — — —).

„Mi vokas nun ilin al granda juĝo“ aŭ:

„Doloro premis la koron kruele“

Sed tiajn ritmoŝanĝojn Zamenhof uzis multe pli malofte. Kaj ilin ja ne altrudas tia nepra neceso, kiel la unuan. Krome Zamenhof uzis ĉiujn tri permesojn nur ĉe vortoj, kiuj havas malpli fortan akcenton (dusilabaj vortoj de la Tabelo, unu, ili, oni, posedaj pronomoj, prepozicioj). Oni povus ilin nomi *duonakcentaj*. Kaj la permeson klarigi ankaŭ tiel, ke ĉi tie la ritmo „ŝvebas“, la skandado paŭzas. Tia skandopaŭzo aŭ ritmoŝvebo povas okazi ĉe la duonakcenta „estas“, se ĝi sekvas akcentitan silabon:

„Sen lim estas la fano, kiun volus“ (Ifigenio).

Tamen, precipe en la komenco de la verso, oni povus permesi ankaŭ ĉe plenakcentaj silaboj tiajn anapestajn ekkurojn, ŝpare. Jen la kvar eblaĵoj:

Leviĝu jambo, per leviĝo via  
Puŝu antaŭen ĉiam nian temon.  
En via batado enestu truda  
Senpacienco, ĝi taŭgas al dramo.

Laŭ mia opinio oni povus konsenti en tio, ke ĉi tiuj kvar eblaĵojn oni ne rigardas pekoj. Kompreneble oni povas ne uzi la trian kaj kvaran eblaĵon, se oni preferas pli severan skemon. Ankaŭ mi mem ne volonte uzas ilin.

Kvina eblaĵo estus ankoraŭ:

„Tra la mondo jam iras voĉ triumfa.“

Ĉiuj kvin eblaĵoj enhavas nur levigantajn verspiedoĵojn: jambon, aŭ anapeston. Laŭ mia opinio la blankverso estas nepre leviganta versformo, do tiaj versoj, kiuj enhavas mallevigantajn piedojn [troheon aŭ daktilon] estas nepre malbonaj. Jen:

Regulojn ritmajn havas nia lingvo,  
Kiujn respekti devas la poeto.  
Lingvon patran neniu do imitu  
Tradukante ion en Esperanton,  
Ĉar nur samlandano povos ĝin ĝui,  
Kaj ja ĝuste ne por ili verkas li.

La unuaj du versoj estas bonaj, la postaj farigis ĉiam pli malbonaj, ĉar enhavas pli kaj pli da troheoj.

Kaj nun la ĉefafero.

Ritmiko bazita nur je la nombro de silaboj prezentus en Esperanto anarkion. Laŭ ĉi tiu principo ekzemple bona blankverso estus la jena:

„Kares', kis', lul', varl' ama en sin' dolĉa“

Ĉu ne terure? Kvankam ĝi ne estas malbonsona. Aŭdu:

„Kareskis, lulvarta' maensin, dolĉa.“

Do, la verso ne estas malbonsona *en si mem*, sed farigas preskaŭ neelparolebla pro la Esp. regulo de akcentado; oni devas difekti sian langon pro la abrupta sinsekvo de akcentoj. Kaj se oni ne akcentas forte, la verson neniu komprenos.

Nun mi revenas al la speciala karaktero de Esp. En la naciaj lingvoj ofte sekvas sin, senpere, akcentitaj silaboj, en la ordinara parolo. Tiam oni apenaŭ akcentas, preterglitas tra iu el la silaboj, kiel en Esp. tra la duonakcentaj silaboj.

„Oiseau vert“

„mon front blême“

„old gentleman“

En la Esp. parolo tia renkonto de akcentoj neniam okazas, ĉar la akcentojn disigas la finaĵoj. Ĉi tio ebligas konstantan fortan akcentadon kaj per tio facilan komprenon. Oni povas ĝin nomi unu el la fundamentaj karakteroj de la lingvo. Do, oni povas ĝin respekti ankaŭ en la poezio. Se ni ne volas *langdifekton* aŭ *nekomprenon*.

Do, mi denove solene deklaras ĉi tie la *fundamentan regulon* de Esperanta versfarado:

*Du akcentitaj silaboj ne estu metitaj senpere unu post la alia.*

Tamen, ne estas regulo sen akcepto. Estas eble, ke la poeto volas havi certan efekton ĝuste per la abrupteco de la verso. Ekzemple:

„Stel', rab', murd', ĉiuj krimoj de l' infero.“

Laŭ mia opinio, ĉi tiuj supre skizitaj reguloj tute ne estas tiel severaj ke oni povus paroli pri la trorigidigo de la Esp. versfarado. Iom lerta poeto certe facile sin movas inter iliaj kadroj, kiuj estas eta taj. La merito estu ĝuste: kiom eble malpeje trouzi ilian elastecon. *Kopar.*

## K O R E K T O

En la unna numero la presejo kruele elcenzuris kelkajn literojn de du poemoj.

Pĝ. 7a: RESPONDO de Solovjev

Linio 7a: Aŭ, povas esti

„ 11a: . . . en mia viv' aŭtuna

„ 13a: . . . eĉ eraras.

Pĝ 10a: VIZIO SUR LA PONTO de Kalocsay

Linio 10a: nun ĉio ĉi estis . . .

„ 12a: aŭ papermaĉajaj etaj figuroj . . .

„ 17a: kaj ĝi rulas la akvon . . .

„ 28a: . . . kaj kuŝas . . . la monto . . .

„ 30a: Terurite, malvarmŝvite . . .



## KIU ESTAS LA PLEJ BELA LIBRO EN ESPERANTO?

LA ĜUSTE-  
SOLVINTOJ RICEVOS PREMION  
LA REZULTO ESTOS  
PUBLIKIGATA

# ENIGMO

SENDU VIAN SOLVON ĜIS 31-A DE MARTO AL:  
**HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO**  
BUDAPEST, VI. KERÜLET, EÖTVÖS-UTCA 3. SZÁM

Mi scias, ke la heraldike ornamitan

## INTERNACIAN ESPERANTAN LUDKARTARON.

per kiu estas ludeblaj la plej multaj konataj kartlu-  
doj kaj kiun oni tutmonde kore akceptis,

**NI DEZIRAS FABRIKIGI  
APARTE EN ĈIU LANDO.**

La enlande fabrikita senimposta

**I. E. L. ESTOS TRE MALKARA.**

Ni serĉas en ĉiu lando

**MEMSTARAN ELDONO-  
REPREZENTANTON.**

al kiu la aŭtoro

**LUDONAS LA PATENTON.**

Jam la envestaĵo de malmulta sumo

**REZULTIGAS BELAN PROFITON.**

Pli detalajn informojn donas

**IEL KARTCENTREJO**

**BUDAPEST, HUNGARUJO.**

POSTO 412, KESTO II.

## KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al  
**Heroldo de Esperanto**

Ĝi estas

**Duonsemajna  
Aktuala Ilustrita  
Grandformata**



Senpagajn specimenojn petu de la administracio

**Horrem b. Köln, Germanl.**

Reprezentanto en Hungarujo:

**Hungara Esperanto Instituto**  
Budapest VI, Eötvös-utca 3

## AUSTRIA ESPERANTISTO,

oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-  
Delegitaro. Esperanto-Delegitaro de  
Wien, Tutmonda Esperantista Ligo  
fervojistaj kaj Universala Esperantista  
Pacifista Ligo, aperas monate kaj in-  
formas pri la plej aktualaj generalinte-  
resaj aferoj de Aŭstrio.

Ke ĝi estas jam tre ŝatata de alilandaj  
interesuloj, pravas la abonco el pli  
ol 20 landoj.

**ABONPREZO SV. FR. 3.50 POR 1925.**

*Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj!*

Pruvi, ke estas almenaŭ dekmil!

**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO**  
bezonas dekmil membrojn

Delegitoj en pres-  
kaŭ ĉiuj urboj

ALIĜU AL U.E.A.!

Ĉiu Esperantisto  
devas esti membro

**CENTRA OFICEJO:**

**12, BOULEVARD DU THÉÂTRE,  
GENÈVE**



# Literatura Mondo



P. SZINYEI-MERSE

PARKO

REDAKTA KOMITATO: JULIO BAGHY, PAULO BALKÁNYI, KARLO BODÓ,  
KOLOMANO DE KALOCSAY, P. DE LENGYEL, DR<sup>o</sup> V. TÓTH, P. VARSÁNYI,  
RESPONDA REDAKTORO: DR<sup>o</sup> BÉLA RÁCZ DE KOVESD L. K.

MARTO 1925

IV. JARO 3. NO.

ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST, EÖTVÖS UCCA 3

# NIA KUNLABORANTARO

LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CASAS (BARCELONA), HELMI & HILDA DRESEN (TALLINN), NIKOLAO HOHLOY (ZAGREB), IVAN H. KRESTANOFF (PIRDOP), A. MAZZOLINI (FERMO), JAN VAN SCHOOR (ANTWERPEN), TIBERIO MORARIU (BUCURESTI), PAUL NYLÉN (STOCKHOLM), EMMA L. OSMOND (LONDON), PETRO STOJAN (CHRISINAU), M. SOLOVJEV (NOVI SAD), DR. LEONO ZAMENHOF (VARSOVIO), RAYMOND SCHWARTZ (PARIS), J. JURYSTA (CZENSTOCHOVA), STANISLAW BRAUN (LÓDZ), HENRIKO SEPPİK (TALLINN), DANIEL EYQUEM (PARIS), ZANONI.

## KARAJ LEGANTOJ

Anstataŭ la kutimaj instigoj kaj plendoj (kiuj, tamen, ankoraŭ estas aktualaj) ni donas nun ĉiokaze enigmon. Enigmon laŭmodan, kiu precipe en Ameriko estas en granda favoro. Ĝia Esp. nomo estu KRUCENIGMO.

La unuan enigmon ni ne volis fari tro malfacila. Se ni vidos sufiĉan interesigon pri ĝi, sekvos enigmo simila en ĉiu numero. Certe, por solvi ilin, necesas bone scii Esperanton.

La maniero de la solvo estas la jena. Ĉe ĉiu cifero komenciĝas vorto, kies senco estas ĉirkaŭskribita en la aldona listo. La vorto havas tiom da literoj kiom da kvadratoj troviĝas en la respektiva vico, de la cifero ĝis la fino de la vico, aŭ ĝis la plej proksima nigra kvadrato. Estas *horizontalaj* kaj *vertikalaj* vicoj. Ankaŭ la direkto de la vicoj estas eksciebla per la listo.

Infer la solvintoj ni lotumos tri premiojn

1) Duonjara abono de L. M. 2) La tragedio de l' Homo. 3) Karinty-Kalocsay: Morgaŭ matene.

Jen la enigmo:

1		17		19		21	23	
		2						
			3	4				
5	16						6	24
7				25				
8			20		9			
	10		18				11	
15			12			22		
13					14			

### HORIZONTALE

- 1) La plej ampleksa romano en Esp.
- 2) sufikso havanta tri sencojn
- 3) harmonia kunsonoro
- 4) polico pri ĝi gardas
- 5) oni diras pri tiuj kiuj ne ĉeestas
- 6) nombro
- 7) sur bordo troviĝas
- 8) juvela ŝtono
- 9) prepozicio
- 10) nia plej fidela akompananto
- 11) itala rivero
- 12) la plej granda batalo en Esperantujo
- 13) estas maldolĉe aŭdi tion ĉi de virino
- 14) geamantoj celas fariĝi

### VERTIKALE

- 1) branĉo de poezio
- 4) metalo
- 11) prepozicio
- 15) prepozicio
- 16) grandfolia kreskaĵo apudvoja
- 17) fama monto japana
- 18) interjekcio uzata precipe en teatro
- 19) en la Alpoj oni vidas multajn
- 20) metalo
- 21) ruĝa farbo
- 22) vorteto por la esprimo de insisto, certigo
- 23) Aleksandro la Granda estis pri ĝi fakulo
- 24) tridimensia geometria formo
- 25) la plej ofta vokalo en Esp.

La solvon oni sciigu tiamaniere ke post la ciferoj 1—25 oni skribas la solvitajn vortojn.

Limdato: la 30<sup>a</sup> de Aprilo.

Bonan sukceson!

### ANONCOJ:

#### MALGRANDAJ:

PO DU ENPRESOJ LA PREZO DE UNU  
NUMERO!

1 PAĜO:

1.200.000. H. KR.

1/2 PAĜO

600.000. H. KR.

K. T. P.

### FILATELISTOJ!

#### POŝTMARKKOMERCISTOJ!

Ĉiaspecajn poŝtmarkojn, precipe hungarajn ni donos interŝange kontraŭ poŝta aŭ grandkvanta sendaĵo. Sendu nur sendifektajn, purajn (uzitajn aŭ neuzitajn) poŝtmarkojn.

HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO  
Budapest, VI., Eötvös-utca 3. (Hungariando)

### ! GESAMIDEANOJ !

Helpu min al eksterlanda porekzista vojaĝo  
per aĉeto de miaj



GRAVURAĴOJ DESEGNAĴOJ

Prezo: 5 - 7 svizaj fr. po peco

PAULO VARSÁNYI

Kunlaboranto de L. M. Budapest VI, Nagymező-ii. 30

**MALUTILO**

Ĉe mastrino Roman ekmalŝanis la bovino. Ĝi kuŝis sur la pajlo kaj malĝoje rigardis per la grandaj grizaj okuloj. Naztruoj ĝiaj tremis, haŭto ĝia sulku-miĝis, la tuta besto tremis pro febro. De ĝi aromis malsano kaj terura, sed muta doloro. En tia okazo plej doloras ke bruto ne povas ekparoli kaj plendi.

„Okulvideble ke ĝi ne saviĝos. Eble oni povus helpi se la malsano sidus en la sango, sed ĉi okaze iu sorĉis per okuloj, kaj helpi estas neeble. Submetu vin al la Dia favoro, eble venos ia konsolo...“ Tiel parolis Ilaŝo, kiu konis la brutkuracarton.

„Ho Ilaĉjo, videble ĝi ne saviĝos, kaj se ĝi pereos, ankaŭ mi ne estos plu bezonata. Tutan mian vivon mi pereigis, por ĝisvivi la propran bovineton. Post mia edzo mi restis vidva, la filo mortis militserve kaj mi sangis kaj laboris tagon kaj nokton. Jen la vintraj longegaj noktoj, kaj mi ĝis tagiĝo ŝpinas, ĝis ŝvelas miaj fingropintoj, ĝis sablo en okuloj pikas. Nur Dio sola scias, kiel maldolĉe mi ĉiun groŝon kunmetadis, ĝis mi sukcesis kolekti...“

„Al malriĉulo, sciu, ĉiam tiel prosperas, forlabori la manojn ĝiskubute, kaj vane! Estas ja tiel, kion fari? Tia la vivo...“

„Ne scieble kion fari, la kapo turniĝas. Kiu povas doni konsilon?“

„Provu ankoraŭ baldaŭe mendi diservon kaj tagmanĝon por malsatuloj. Aŭ promesu piediri indulgencan de Joano Suĉava; oni diras ke tio ofte helpas.“

„Ho, jam mi intencis, kaj la tagmanĝon, kaj la Dipatrinon en Zarvanica kaj nun promesas ankaŭ tiun de Joano Suĉava.“

„Eble, mi diras, Dio vin helpos, se vi al Li vin submetos. Donu al vi Dio la plej bonan!“

Kaj Ilaŝo foriris.

Mastrino Roman sidiĝis ĉe la bovino kaj gardis ĝin, ke ĝi ne pereu. Ŝi donis al ĝi kion ŝi havis plej bonan, sed ĝi nenion volis manĝi. Nur rigardis kontraŭ la maljunulino kaj des pli ŝin kompatigis.

„Etulino, etulino, kio vin doloras? Ne lasu maljunan virinon sen kulero da lakto. Konsolu min almenaŭ iomete.“

Kaj ŝi karesis la bovinon ĉe la frunto kaj ĉe la kolo kaj lamentis super ĝi.

\*Vasyl Stefanyk, ukraino, filo de vilaĝano, naŝkiĝis en Galicio 1871. Studis la medicinon en Krakovo kaj antaŭ la milito estis radikala deputito ĉe la aŭstria parlamento. nau Tomete“.

Kaj ŝi karesis la bovinon ĉe la frunto kaj ĉe la kolo kaj lamentis super ĝi.

\*Vasyl Stefanyk, ukraino, filo de vilaĝano, naŝkiĝis en Galicio 1871. Studis la medicinon en Krakovo kaj antaŭ la milito estis radikala deputito ĉe la aŭstria parlamento.

En siaj verkoj li priskribas la vivon de ukraina vilaĝano, tiu sklavo de popolo, tiel vere, tiel senpere ke en la tutmonda literaturo estas malfacile trovi ion similan. Eĉ en la geniaj vilaĝaj bildoj de George Sand — „François de champs“, „La petite Fadette“, — vilaĝo kaj vilaĝanoj estas tro lumigitaj per romantikismo. Same de Maupassant kaj Zola oni ne sentas la socian subigon de vilaĝano. Saine ĉe aliaj nacioj...

Ĉe Stefanyk ĉiam regas nepra tragikeco: „... Al vilaĝanoj estas tiel: kio estas en la mondo plej malbona, tion ili devas sperti, kio estas plej malfacila tion ili devas plenumi...“ — diras liaj herooj — kaj la aliaj respondas: Por tio ni estas naskitaj.

Sur tri paĝoj plejparte donas Stefanyk tremigan bildon de kamparana sorto kun tiom da forteco kaj profundo ke vane oni serĉus tiel kondensitan verkiston. „Non multum sed multa“, — estas lia moto.

Liaj verkoj pro majstra uzo de vilaĝana parolmaniero estas malfacile tradukeblaj, sed por konatigi la samideanaron kun tiu genulo mi riskis kelkan provon.

La tradukinto

„Kiel, kiel mi povos kuntiri miajn bezonojn por alia?! Nek la fingroj kunmetiĝas, nek kudrilon surfadenigi mi sukcesas; kiamaniere en maljuneco mi perlaborus bovinon?“

La bovino tremis kaj mastrino Roman kovris ĝin per sia pelto kaj ŝtoniĝis apud ĝi, duonvestita dum frostoj. Klakadis ŝiaj dentoj, sed ŝi ne foriris eĉ unu paŝon.

„Eble pro la pekoj nun Dio tiel min punas? Ĉar pro vi, malfeliĉa, mi ofte pekis! Jen trans limo fremda mi paŝis, jen kukurbeton mi forŝiris, jen branĉeton mi forrompis. Sed la lakton al neniu mi avaris. Ĉu ie malsanas infano, ĉu ie virino akuŝiĝas, mi tuj iras kun la potoj kaj portas lakton. Eĉ fromaĝon al maizkaĉo mi ofte donis al la homoj. Di-sinjoro, ne punu min tiel severe — malriĉan vidvinon. Nenion fremdan mi jam tuŝos, nur pardonu, cedu al mi tiun ĉi bovinon!“

Tiel ĝis malfrua nokto lamentis mastrino Roman ĉe la bovino. Ŝi aspergis ĝin, sed nenio helpis. Ĝi disetendis la piedojn tra la tuta staleto kaj blovmis per la flankoj, eblekante. La virino glatumis, ĉirkaŭprenadis, karesis, sed tamen neniom ŝi povis helpi.

La luno lumigis la staleton tra la pordo, kaj la maljunulino vidis ĉiun movon de la bovino. Fine ĝi leviĝis. Apenaŭ ĝi povis sin teni sur la piedoj. Ĝi ĉirkaŭrigardis la staleton, kvazaŭ adiaŭante ĉiun angulon.

Poste ĝi falis sur la pajlon kaj distreĉiĝis kvazaŭ kordo. Mastrino Roman ekgenuis apud ĝi kaj frotis ĝin per pajlofasko. Ŝi mem ne sciis kio al ŝi okazas. Poste la bovino laŭte ekĝemis kaj komencis bati per la piedoj. Al mastrino Roman fariĝis varme, flavis antaŭ ŝiaj okuloj kaj ŝi falis sangante. La bovino batis per la piedoj kaj ŝiris en pecojn la maljunulinon.

Ambaŭ baraktis mortante.

**BLUA LIBRETO.**

Tiu Antono, kiu nun ebrie bruadas sur la placo, ĉiam spertis nur malfeliĉon. Ĉio kuris al li el la manoj, kaj nenio en la manojn. Li aĉetas bovinon, ĝi mortaĉas, li aĉetas porkon, ĝi teniumiĝas. Ĉiam tiel.

Sed kiam mortis lia edzino, kaj post tio ankaŭ du filoj, tiam Antono tute aliĝis, drinkis, ho drinkis kaj drinkis; fordrinkis kampon, fordrinkis ĝardenon, kaj nun vendis la kabanon. Vendis la kabanon, prenis de la vilaĝestro bluan servolibreton kaj devas ien iri, dungiĝi, trovi servon al si.

Sed kiam mortis lia edzino, kaj post tio ankaŭ du filoj, tiam Antono tute aliĝis, drinkis, ho drinkis kaj drinkis; fordrinkis kampon, fordrinkis ĝardenon, kaj nun vendis la kabanon. Vendis la kabanon, prenis de la vilaĝestro bluan servolibreton kaj devas ien iri, dungiĝi, trovi servon al si.

Tie li sidas ebrie kaj kalkulas, ke aŭdu la vilaĝo, al kiu li vendis la kampon, al kiu la ĝardenon kaj al kiu la kabanon.

„Mi forvendis kaj perdita! Ne plu mia kaj finita. Ne mi-a! Ho, se mia avo nun vekigis el la tombo. Moŝtsinjoro, kvar bovoj belegaj, dudek kvar morgo da kampo, konstruaĵoj plej belaj en la vilaĝo! Ĉion I havis. Kaj la nepo, jen!“

Li montradis al la gevilaĝanoj la bluan libreton.

„Ho, drinkas mi kaj drinkos plu. Por la propra mi drinkas, neniu rajtas malhelpi. Kaj li al mi diras: aĉulo, la kampon vi forsorbis! Sigelon li presas kaj insultas! Ho, mi konas pli moŝtajn vilaĝestrojn ol tiu ĉi.“

„Ke via morto estu tiel facila, kiel al mi nun!“

„Iras mi de la kabano, for, tute mi jam foriras kaj

mi kisis la sojlon kaj iras. Ne mia plu kaj finite! Forpeli min kiel la hundon de fremda korto! Permesite — mi petas. Estis la mia, kaj nun fremda. Eliras mi eksteren, kaj la arbaro bruas, kvazaŭ parolas: revenu, Antono, al la kabano, revenu, aĉulo!“

Antono per ambaŭ pugnoj batas sian bruston ke en la vilaĝo ĝi eĥas.

„Sciu, tia sopiro min kaptis, ega sopiro! Eniras mi ree la kabanon. Eksidis mi, sidis, kaj eliras — ne mia, kion mi povas diri, se ne mia...“

„Ke al miaj malamikoj tiel estu morti, kiel al mi estis forlasi mian propran hejmon!“

„Eliras mi en la korton... tute malklariĝis. Verda musko sur la kabano, la tegmento urĝas riparon. Fulmotondro — ne mi vin plu, karulo, riparos. Ŝtono, — eĉ ŝtono rompiĝus pro bedaŭro!“

Post ĉi tiu vorto Antono batas per la manoj la teron, ĝi estu tiu ŝtono.

Sidiĝis mi sur la ĉeporda sojlo. La mortintino ankoraŭ ĝin formis, kaj mi argilon per ĉaro veturigas. Mi nur volas stariĝi, kaj la sojlo ne lasas, mi rektiĝus — ĝi ne lasas. Kaj al mi enue, enuege, ne! Mi preskaŭ pereas... Sidas mi kaj ploregas, tiel ploregas, kvazaŭ iu de mi haŭton po-strie ŝirus. La homoj gapas pro mia pento“.

„Jen, vidu, ĉe la pordego la pastro nekrologis. La tuta vilaĝanaro ploris. Inda, li diras, estis ŝi edzino, laborema...“

„Turniĝu en la tomboj, karuloj, ĉar fripono mi

estas. Fordrinkis mi ĉion ĝis la eroj. Eĉ la tolon mi fordrinkis. Ĉu vi aŭdas, Maria, kaj vi Vasilĉjo, kaj vi Jurĉjo, nun paĉjo portos butikacajn ĉemizojn kaj al judoj akvon li portados...“

Nun Antono montras la vilaĝestran domon.

„Sed la vilaĝestrino — bona virino. Ŝi elportis al mi panon por la vojo, ke la vilaĝestro ne vidu. Di-sinjoro favoru al viaj infanoj, en ĉiu paŝo. Al vi ĉiuj Dio donu pli da bono ol al mi...“

„Kiarajte mi sidu sur fremda sojlo? Mi iras. Mi nur ekpaŝis kaj la fenestroj eklamentis. Ekploris ili kiel malgrandaj infanoj. La arbaro ilin konsolas, kaj larmon post larmon ili gutas. Ekploris pro mi la kabano. Kiel infano post la patrino — tiel ĝi ekploris.“

„Viŝis mi per basko la fenestrojn, ke ili min ne priploru, ĉar ne valoras, kaj tute mi foriris.“

„Ho facile, samkiel ŝtonon mordi. Malluma mondo antaŭ mi...“

Antono ĉirkaŭmontras per la mano.

„Estas ĉi tie ankoraŭ la mono, sed mi drinkos. Kun miaj homoj mi drinkos, kun ili mi malŝparos. Por ke ili sciu, kiel mi forlasis la vilaĝon.“

„Jen, ĉebruste mi havas bluan libreton Tio estas mia kabano kaj mia kampo kaj miaj ĝardenoj. Kun ĝi mi iras ĝis mondlimoj! Libreto de la imperiestro, ĉien la pordoj por mi malfermitaj. Ĉien. Kaj ĉe sinjoroj kaj ĉe judoj kaj ĉe ĉiu — konfeso!“

El la ukraina: *Oresto Kuzjma*

## V I K T I M O J

ROMANO EL LA VIVO DE SIBERIAJ MILITKAPTITOJ

JULIO BAGHY

### KVARA ĈAPITRO.

En la ĉambro N-o 10 de la artista barako oni estis metinta la tablon en la ĉambromezon. Gaje babilanta societo sidis kune. Ili regalis la nove alvenintajn samsortanojn, kiuj antaŭ du-tri monatoj ankoraŭ ĝuis la liberecon en la malproksima patrujo.

El la kontraŭflanka ĉambro de la germanaj artistoj aŭdiĝis gitarsonoj kaj laŭta kantado. Heimmüller mankis el la hungara ĉambro. Li iris al siaj samlandanoj, kiuj ankaŭ akceptis novajn konatulojn.

Mankis ankoraŭ Petro kaj Johano. Oni ne atendis ilin, ĉar la maljuna Stefano jam anoncis la dumnoktan foreston de Johano. Versajne Doŝky venos poste.

Ĉirkaŭ la ankoraŭ sidis dekunu militkaptitoj el plej diversaj partoj de Hungarujo. Ĉiu estis vera tipo de artisto. La ĉefan lokon okupis Keĉemen, la talenta poeto. Apud li dekstre kaj maldekstre sidis du gastoj.

Keĉemen rakontis kun viglaj gestoj ion amuzan al la mirantaj gastoj, kiuj ankoraŭ nur de kelkaj semajnoj manĝis la rusan panon.

— ... kaj la tuta tendaro estis severe gardata. Kiel do foriri? Gardisto kun bajoneto kaj pafilo staris antaŭ la pordego de la barilo. Frumatene mi, kaj tri aliaj, ellitiĝis. Ni prenis cigarskatolon, alnajiis ĝin sur stangon, al kiu ni faris tri piedojn, ni prenis inĝenieran mezurfadenon, kiu hazarde restis ankoraŭ en la tornistro de iu, kaj ni iris sur la korton. Ni komencis la komedion. Mi estis la inĝeniero. Tenante kajeron en la mano kaj senĉese farante notojn, mi komandis meti la tripedan aparton jen tien, jen ĉi tien. La gardisto respekte rigardis nin. Dume du aliaj per longa kolorigita stango kaj per metalfaldeno mezuris la teron. La gardisto palpebrumante observis. Paŝon post paŝo ni proksimiĝis al la pordego. Fine ni atingis ĝin.

— Kaj la gardisto? — malpacienis unu el la gastoj.

— Aŭskultu! Mi montris al la gardisto ian paperon, sur kiu ni kopiis stampilon per trikopejka monero kaj skribis hungar-

lingvajn sensencaĵojn per rusaj literoj. La gardisto ĝin rigardis precipe la stampilon li observis longe kaj atente kaj — salutante li malfermis la pordegon. Ni daŭrigis la mezuradon kaj laŭvorte ni elmezuris nin el la tendaro. De tiam mi estas malamiko de analfabetaj kursoj.

La novaj militkaptitoj ekridis, la malnovaj, kiuj konis la historion, ridetis bonguste. Keĉemen daŭrigis.

— La reveno estis jam pli malfacila afero... En tiu tempo estis malpermesate enporti ion, precipe vivandon. La rusoj versajne tiamaniere volis venĝi pro la sinsekvaj malvenkoj... Ni aĉetis porkon en la apuda vilaĝo... Sed kiamaniere fari la kontrabandon, jen estis la demando. Doŝky havis bonan ideon. En nia ĉirkaŭbarita bataliono, kiu enhavas pli ol dek barakojn, troviĝas ankaŭ malsanulejo. La flegistoj, kun la ruĝkruca manikbänderolo, havis ĉiam la rajton, en- kaj eliri libere. Ni bazis la ruzaĵon je tio ĉi. Surmetinte la banderolojn, ni faris el du stangoj portilon, metis sur ĝin la mortigitan porkon, vindis ĝian sangan kapon per tolo kaj la verkon ni kronis per soldata ĉapo.

— Nun sekvis kovro per dika soldatmantelo, levo kaj — ekfiro hejmen. Doŝky kaj mi estis la gvidantoj. Dumvoje ni renkontis kelkajn rusajn oficirojn, kiuj varme interesiĝis pri nia vundita kamarado. Doŝky rakontis al ili kortuŝan historion. La kozaka kapitano vundis nian malfeliĉan kamaradon per sabro, ĉar li forgesis ĝustatempe saluti lin. La oficiroj kredis al li, ĉar ĉiuj konis la terure kruelan naturon de la kozaka kapitano. Ili do komplete balancis la kapojn kaj instigis nin: Rapidu kun li, homoj, al la kuracisto!... Kaj ni iris, ni rapidis! Nun venis la pordego kun la rusa gardisto. Dio helpu! Nu, li vidante la sangan-tan korpon, senvorte, tuj, larĝe malfermis la pordegon. Dume dekelkfoje li faris krucsignojn... Tiamaniere ni sukcesis superuzi la severan caran reĝimon.

Keĉemen finis. Sekvis granda, longa rido.

La pordo malfermiĝis. Doŝky venis. Aklame oni salutis lin.

— Ah! Kie vi forlasis Johanon.

— Li iris en la urbon — respondis Petro.  
— Kune kun la prokuroredzino. Ĉu ne? — rimarkis Ŝolath,  
longhara pentristo.

— Jes!  
— Eĉ feliĉo, ke li ne alvenis kun vi, ĉar ni estas dektriope,  
— esprimis sian superstiĉan opinion la dika Varga.  
— Vere, ankoraŭ unu mankas al dektri, — konstatis unu el  
la gastoj.

— La superstiĉa dektria numero. Kiu venos dektria en la  
ĉambro, tiu mortos en tiu ĉi jaro.

— Nepre mortos, — ridis Doŝky kaj la aliaj ridis kun li.  
Iu ektrapis la pordon. Ĉiuj eksilentis. Malgraŭ ĉia facilani-  
meo kaptis ilin la superstiĉo.

La ekstere-staranto ripetis la frapadon.  
— Nu! Envenu! — donis la permeson Keĉemen.

La malalta mizera figuro de Izor Steiner aperis sur la sojlo.  
Li estis la brokantisto de la militkaptitoj el la najbara barako.  
Kun larĝa rido li haltis antaŭ la pordo.

— Bonan amuzigon, sinjoroj volontoroj! Bonan amuzigon!  
— Bonvenon, Izor! — diris Petro. Kion vi portis?

Izor singarde metis sian ĉapon sur la plankon kaj prenis  
el sub sia brako nigran pantalonon.

— Jen! Pantalonon!  
— Ah! Jes!

— Jes! Pantalonon! Mi kuŝis sur mia litbenko kaj pensa-  
dis. Mi ĉiam pensadas, se mi kuŝas sur mia litbenko. Kaj subite  
venis al mi en la kapon, ke Salomono portis por vendo nigran  
oficiran pantalonon el la oficira tendaro. Salomono estas mia  
helpanto kaj samfirmano. Nu! Venis en mian kapon, ke antaŭ  
kelkaj tagoj sinjoro Bardy petis min akiri nigran oficiran panta-  
lonon al sia frako. Kaj kuŝante sur mia litbenko mi diris al  
Salomono, al mia helpanto kaj samfirmano, ke mi iros al sinjoro  
Bardy por montri la pantalonon. Bone! Diris Salomono. Kuŝante  
sur mia litbenko mi rigardis tra la fenestro de nia barako la  
fenestron de via ĉambro kaj mi vidis, ke ĝi estas luma. Venis  
al mi en la kapon, ke verŝajne sinjoro Bardy estas hejme kaj  
mi venis por montri la pantalonon.

— Sinjoro Bardy ne estas hejme. Li iris en la urbon, kaj  
nur morgaŭ li revenos.

— Faras nenion. Estas ĉi tie anstataŭ li sinjoro Doŝky.  
Sinjoro Doŝky aŭ sinjoro Bardy estas tutegale.

— Nonono!  
— Preskaŭ! Mi volas diri. Preskaŭ! Cetere jen estas la  
pantalonon. Rigardu, sinjoro Doŝky! Ĝi estas tute nova.

Izor montris la pantalonon kun triumfa okulbrilo. Doŝky  
rigardis ĝin.

— Preskaŭ, Izorĉjo! Nur preskaŭ!  
Izor ekridis.

— Nu tute nova ĝi ne estas, tamen en bonega stato.  
Doŝky rigardis la pantalonon. Ĉe la tablo oni parolis pri  
la moralo de la virinoj. Unu el la gastoj, juna kadetaspiranto,  
fanfarone rakontadis siajn amajn aventurojn. La aliaj aŭde  
aŭskultis.

— Kiom vi volas por tiu ĉi ĉifono, Izor? — komencis la  
marĉandon Petro.

— Ĉifono? Ĉifonooo!? Sinjoro Doŝky, vi perdis la vidon,  
se vi nomas ĉi tiun belegan pantalonon ĉifono. Neniam mi  
portis pli belan pantalonon, eĉ dum mia fianĉeco. Ĉu vi pensas,  
ke mi volas trompi vin? Neniam mi revidu mian familion, kiun

— Ĉifono? Ĉifonooo!? Sinjoro Doŝky, vi perdis la vidon,  
se vi nomas ĉi tiun belegan pantalonon ĉifono. Neniam mi  
portis pli belan pantalonon, eĉ dum mia fianĉeco. Ĉu vi pensas,  
ke mi volas trompi vin? Neniam mi revidu mian familion, kiun

Dio plimultigu, se ĝi ne estas pantalonon.

— Bone! Sed kiom kostas?

— Nur dekdu rublojn. Nur dekdu.

Petro redonis la pantalonon kaj estis revenonta al la tablo.  
Izor kaptis lin ĉe la maniko.

— Kiom vi volas doni por ĝi?

— Vi petis tro multe. Neniom!

— Dekunu, sinjoro Doŝky! Dekunu kaj mi povas konfesi,  
ke mi ne havos multe da profito.

— La pantalonon valoras kvin rublojn kaj mi donas al vi sep.  
Ĉu bone?

— Ĉu vi opinias min freneza. La sinjoro oficiro, kiu komi-  
siis min per la vendo, nepre detranĉus mian kapon, se mi donus  
ĝin por kvin rubloj.

— Sep, Izorĉjo. Sep.

— Nu? Kaj kie estos mia profito?

— La pantalonon ne valoras pli. Oni povas tra ĝi kalkuli la  
stelojn.

— Kalkuli la stelojn, vi diras. Tra tiu ĉi pantalonon vi volas  
kalkuli la stelojn? Tra tiu ĉi delikata peco?

Izor levis la pantalonon antaŭ la lumon de la lampo, sed  
li subite reprenis ĝin.

— Estu mi fava hundo, se mi povis kalkuli la stelojn tra

ĝi, sed por ke vi ne povu diri, ke la maljuna Izor estas malbona  
homo, mi malaltigas la prezon kaj klarigos al la sinjoro oficiro,  
ke la pantalonon mi preskaŭ bonfare vendis al iu tre malriĉa  
soldato. Ĉu bone? Mi diris dekunu. Ĉu ne? Dekunu mi diris.  
Nun mi diras dek. Sed ne marĉandu, sinjoro Doŝky, ne marĉandu,  
ĉar kredu, ke mi jam nun perdas per la negoco. Mi nur ne volas  
perdi konstantan aĉetanton.

— Izor! — diris Petro kaj preninte sian monujon etendis  
al la brokantisto ok rublojn. — Jen ok rubloj! Se vi volas akcepti,  
lasu la pantalonon, se ne, prenu ĝin for.

— Aj! Aj! Vi estas tre perforta, sinjoro Doŝky! Sed kion  
fari? Mi tre ŝatas la artistojn. Mi diros al la sinjoro oficiro, ke  
la pantalonon forprenis de mi la rusoj. Jen la pantalonon! Prenu,  
sed al neniu diru, ke mi vendis ĝin tiom bagatele. Oni priridus  
min. Eĉ al Salomono, al mia helpanto kaj samfirmano mi diros,  
ke la rusoj forprenis ĝin de mi. Li havus apopleksion, se li  
eksciis, ke mi donis ĝin kvazaŭ donace.

— Donaĉon mi ne volas. Prenu la pantalonon kaj punkto.

— Ajaj! Ne estu tiel fiera, sinjoro Doŝky. Mi ne volis ofendi  
vin. Mi nur kvietigas mian konsciencon. Nu!

Izor metis la pantalonon sur la litbenkon de Bardy kaj  
forpreninte la monon li kliniĝis al la planko por sia ĉapo.

— Ĉu vi scias, ke vi estis la dektria en la ĉambro? —  
jetis la frazon Varga al la forironta brokantisto.

— Ajve! Nu, belegan negocon mi faris, — ekkriis Izor kun  
ektimo kaj lia mieno fariĝis malespera. — Mi profitis nur tri  
rublojn kaj certan morton.

— Ne timu Izorĉjo! Ni ĉiuj rikoltos morton ĉe la fino de  
la vivo. Ni ĉiuj devas morti, — konsolis lin ridetante Petro.

— Sed morti ĝuste kiel la dektria, estas granda diferenco.  
Izor ekĝemis kaj foriris. Petro revenis al la tablo. Ankoraŭ  
ĉiam la juna kadetaspiranto fanfaronis.

— Jes! Jes! La virinoj estas ĉie virinoj. Ne nur en Ruslando,  
sed ĉie malaltigis la moralo. Ĉu vi opinias, ke niaj virinoj estas  
sanktulinoj. Tute ne! En tiu urbo, kie mia garnizono estis, mi  
havis belegan amatinon. Ŝi estis tre ĉarma ino. Ino en la vera  
senco de la vorto. Ŝi estis pasia kaj nekontentigebla. Se oni  
vidis ŝin sur la strato, ŝi estis kvazaŭ Madono kun mildaj trajtoj  
kaj sufero serioza mieno, sed hejme... Hejme ŝi estis nekontraŭ-  
starebla diablino...

— Ĉu vi ne hontas rakonti tiajn aventurojn? — riproĉis lin  
Petro. Ĉi tie estas keikaj inter ni, kiuj lavas edzinon hejme kaj  
tiaj fantazioj vekas turmentajn sentojn en ili. Mi ne ŝatas la  
fanfaronadon. Cetere honesta virino restas fidelela ĝis la tombo.



— Ĉu vi opinias, ke mi parolas mensogaĵojn? — respondis atakeme la kadetaspiranto. — Tute ne! Ŝi eĉ donis sian fotografafan antaŭ ol mi foriris al la tranĉeoj. Se vi ne volas kredi al mi, mi montros ŝian portreton. Jen, vidu, ke mi ne fanfaronas, dirante, ke ŝi estas belega virino.

Li prenis paperujon el sia poŝo kaj post iom da serĉado li ĵetis virinan fotografafan sur la tablon.

— Jen! Konvinkigu!

Ĉiuj rigardis scivole la portreton.

Subite eksplodis vekrio en la ĉambro. Kvazaŭ fulmobato impresis la krio.

— Mia edzino!

Eksonis la terura krio kaj Dogler, la plej silenta samĉambrano, kun sovaĝa miemo fikse rigardis la fotografafan.

— Mia edzino! — kaj lia voĉo plure ekstremis.

Doŝky kun subita decido saltis al la kadetaspiranto kaj ŝovis lin al la pordo. Keĉemen retenis la furiozantan Dogler, kiu subite kun blinda furiozo volis sin ĵeti al la kadetaspiranto. Komenciĝis granda luktado. Kelkaj klopodis bridi la malfeliĉulon, kiu en sia senpova kolero en propran korpon entranciĝis la ungojn. La aliaj rapide forigis la malagrablan vizitanton.

— Mia edzino! Mia edzino! — ripetis Dogler en sia doloro. Jen plure, jen furioze frapante per la piedoj. Dissirinte sur si la bluzon, sangajn striojn li tranĉis per la ungoj sur sia nuda brusto.

— Dogler! Havu prudenton! — kvietigis lin Keĉemen kaj penis malhelpi lin. — Nu! Amiko mia! Dogler!

— Mia edzino! Mia edzino!

La sama veado aŭdiĝis ankoraŭ kelkajn minutojn. Ĉiuj staris konfuzite, ne sciante kion fari, kion diri.

Subite Dogler eksaltis kaj kuris al sia litbenko, super kiu, sur la muro pendis la familia bildo. Lia edzino kaj lia floto. Inter ili estis kopiita la fotografajo de Dogler, kiun li sendis antaŭ unu jaro hejmen. Kiel li ĝojis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam ricevinte la bildon de sia familio li povis trovi inter ili ankoraŭ sin mem, almenaŭ bilde. Kiel li ploris pro la ĝojo.

Dogler ŝiris la bildon de sur la muro kaj ĵetis ĝin en la fornon. Li rigardis la ekflamiĝon. Neniu kuraĝis lin malhelpi.

Li denove kuris al sia kuŝejo kaj el sub ĝi tiris sian soldatan keston. Malŝosinte ĝin li elprenis volumon da leteroj, kiujn la virino sendis el la malproksimo. Furiozante li ĵetis ilin en la fajron kaj kun freneza miemo li rigardis la cindriĝon de forgesitaj fideljuroj kaj falsaj sentoj.

La paperfasko ekflamis laste. Dogler, per unu salto, atingis la pordon kaj antaŭ ol oni povis malhelpi lin, li kuris eksteren en la frostan nokton.

Doŝky sekvis lin,

La luno pale lumis. La neĝo siblis pro la frosto.



P. Szinyei-Merse: Vojrando 1904  
Kun la permeso de Kónyves Kálmán

Dogler kuregis kaj dume ĵetis, unu post la alia, siajn bluzon, ĉemizon sur la vojon. Doŝky sekvis sed ne povis atingi lin. Subite Dogler, perdinte la forton, falis sur la glacian teron kaj arde ploregis.

— Malĉastulino! . . . Aĉa malĉastulino!

Doŝky atingis lin. Genuis al li kaj kovris lin per la forĵetitaj vestaĵoj, kiujn li kolektis dum la kurado.

— Dogler! Amiko mia! . . . Regu vin!

— Mi volas morti! Lasu min morti!

— Senpripensa parolo! . . . Dogler! Havu prudenton!

Dogler subite fariĝis rigida. La trajtoj spasme baraktis, liaj manoj konvulsie skrapis la teron kaj ĉe la buŝo aperis ŝaŭmo.

— Dogler! Dogler! Mia bona amiko! . . . Kion mi faru? Kion mi faru?

Doŝky inerte rigardis ĉirkaŭen. En la malproksimo vidiĝis homa figuro. Li plenpulme ekkriis.

— He! Hola! Venu ĉi tien! Helpu!

La figuro rapidigis siajn paŝojn.

— Rapidu, je la amo de Dio! — kriis Petro.

La homa figuro komencis kuri. En la nokta silento aŭdiĝis raŭka stertorado de Dogler kaj knaraj bruoj de proksimiĝantaj paŝoj.

— He! Kiu? — demandis virina voĉo.

— Ĉu vi estas, Fiza?

— Jes!

— Rapidu en la barakon kaj diru al Keĉemen, ke li venu tuĵ!

— Ĉu akcidento okazis?

— Jes! Jes! Nur rapidu!

— Ĉu sinjoro Bardy?

— Ne! Dogler!

Fiza alvenis kaj vidante la duonnudan malfeliĉulon, ŝi rapide demetis sian pelton kaj ĵetis ĝin al Doŝky.

— Prenu por li! — ŝi kriis kaj kuris plu.

El la direkto de la artista barako jam venis kelkaj. Fiza nur vorton ĵetis al ili.

— Rapidu! Tie! Ĉe la vojkurbiĝo!

Ŝi kuris al la kuracista barako.

Keĉemen kun la samĉambranoj atingis la vojkurbiĝon kaj levis de la tero la malfeliĉan samsortanon. Ili kurante ekiris kun li al la barako. Dogler malfacile kaj stertore spiris.

Apenaŭ ili hejmenrevenis kaj metis Dogler en la liton, la pordo malfermiĝis kaj Fiza kun unu el la kuracistoj venis en la ĉambron.

La militkaptita kuracisto ekrigardis la malsanulon.

— Epilepsio! — li diris mallonge; kaj lerte li komencis sian arton.

Dogler baldaŭ rekonsciĝis, sed nur por minutoj kaj poste nevenkebla dormo fermis liajn palpebrojn. Egale, ritme li spiradis. Fiza sidigis sur la randon de lia litbenko kaj komplete rigardis lin.

— Nur plena ripozo! Nenia ekscitiĝo! — ordonis la kuracisto. — Morgaŭ denove mi venos.

La kuracisto foriris. En la ĉambro estis peza silento. La samsortanoj mute sidis sur la litbenkoj. Fiza delikate, apenaŭ tuŝante, karesis la vunditan vizaĝon de Dogler, kiu kelkfoje ekveis en sia dormo.

— Nur plena ripozo! Nenia ekscitiĝo! — ordonis la kuracisto. — Morgaŭ denove mi venos.

La kuracisto foriris. En la ĉambro estis peza silento. La samsortanoj mute sidis sur la litbenkoj. Fiza delikate, apenaŭ tuŝante, karesis la vunditan vizaĝon de Dogler, kiu kelkfoje ekveis en sia dormo.

Petro sidigis al la tablo. Lia rigardo longe esploradis la tie forgesitan fotografafan. La pensoj pelis unu la alian en lia laca kapo. Li rememoris pri okazintaĵo ĉiam tentanta. Kompate li turnis sin al la malsanulo kaj levigante de la tablo li ekiris al lia litbenko.

Por momento li haltis kaj poste, tiel delikate, kiel permesis al li la reganta sento, li klinis sin al la frunto de la knabino kaj kisis ĝin.

La knabino surprizite rigardis lin. Petro konfuziĝis.

— Bona knabino vi estas, Fiza! Tre bona. Vi havas koron. La knabino nenion respondis.

— Ĉu vi koleras, ke mi kisis vian frunton?

— Mi dankas tion, sinjoro Doŝky. . . Mi tre dankas tion.

Ŝi ekploretis silente. Petro revenis al la tablo kaj, preninte en sian manon la fotografafan, duonvoĉe murmuris kvazaŭ al si.

— Estas virinoj, pri kiuj oni opinias en la unuaj minutoj, ke ili estas estas idealaj lampiroj kaj poste oni konvinkiĝas, ke ili estas nur kampaj cimoj.

Li metis la fotografafan en sian poŝon kaj averte diris al la samĉambranoj.

— Eĉ unu vorton pri tio ne rakontu al Johano!

# NEATENDITA DISIGO

D. KRISTODOROV

**K**in la kamparo, ekster la urbo, antaŭ la nova kazerno atendis multaj bovoveturiloj — ĉiuj peze plensarĝitaj, kun jungitaj bovoj — pretaj por longa kaj nekonata vojaĝo.

Alproksimiĝis lacema antaŭvespero kaj facilaj nebulaĵoj dormeme vualis nian patrinon la Teron, kvazaŭ milionoj da larmoplenaj okuloj rigardus en la silentan malproksimon.

Kaj sur la pinto de la Vitoŝa-monto kuŝis nubego, mallume brulanta en la purpuro de l' sunsubiro, kvazaŭ sortdivenisto konanta la misteron de la jarcentoj starus tie kaj malgaje enpenŝiĝinte li determinus la sorton de la patrolando, kiu sensente ĵetis sin en sangan batalon sen Dia beno...

Jen, baldaŭ la peza karavano etendiĝos sur la longan kaj nekonatan vojjon kaj mallumo kovros la kulturitajn kamparojn.

La veturiloj unutone ekknaris en la senbrua nokto, kaj la veturigisto destinita al neelportebla turmento, kun dolorplena koro rememoros ke iam li vivis en la domo naskiĝa.

Kaj la animo ankoraŭ pliforte eksuferos, kiam malfortiĝinte ĝi renkontos la serenatan mateniĝon kaj kiam la klara suno ekbrilos super la dezertaj paŝtejoj, grenkampoj kaj herbejoj...

La karavano ankoraŭ ne estis ekveturanta, kaj la brutoj atendis, kun okuloj fikse rigardantaj antaŭen, kvazaŭ en la malproksimo ili observus ion neforigeblan.

Flanke, sur la vojo, aperis avo<sup>1</sup> Stamen kun ŝultrumita pansako. Li iris al la vilaĝo. Ĵus proksimiĝinte al la veturiloj li flankumis al ili, sentante, ke io nevenkebla ekflamiĝis en lia brusto.

Li ja sufiĉe malfruiĝis, kaj la hodiaŭa tago ankaŭ pasis neeluzite kaj alportis nenan konsolon!

Avo Stamen eksentis, kia mistera forto devigis lin flankumi kaj iri inter la pretajn por forveturo veturilojn. Io kvazaŭ diris al li, ke ankaŭ lia bovoparo estas tie kaj li nepre ĝin vidos.<sup>2</sup>

Pli ol du semajnoj jam pasis de kiam li disiĝis de sia bovoparo kaj tamen li ankoraŭ ĉiam sopiris al ĝi, kvazaŭ oni, forpreninte liajn bovojn, estus el li forpreninta ankaŭ la eblon, vivi en tiu zorgoplena kaj peniga tempo.

Ne vagante longe, la maljunulo haltis antaŭ unu veturilo kaj rekonis siajn bovojn. Eble ankaŭ ili rekonis ĝin, kvazaŭ oni, torpreninte siajn bovojn, estus el li forpreninta ankaŭ la eblon, vivi en tiu zorgoplena kaj peniga tempo.

Ne vagante longe, la maljunulo haltis antaŭ unu veturilo kaj rekonis siajn bovojn. Eble ankaŭ ili rekonis lin, ĉar ili levis la kapojn. Iliaj okuloj tuj ekbrilis, ili kvazaŭ ekpensis, ke jam venis la tempo, reveni vilaĝen.

La stalo certe ankoraŭ ne forgesis ilin. Ĝi sopiras same kiel ili kaj ĉiutage ilin ĝi atendas. Tie avo Stamen ĉiam malavare donis al ili fojnon kaj krude muelitan grenfuragon. Kaj nun super la stalo la maljuna ulmo malgaje etendas la nigrajn branĉojn kaj tremetas en soleco. Ĉiuvespere ĝi malĝoje kaj tiel malbonsigne bruetas. Kaj dumnokte Ĉerj<sup>3</sup> ankaŭ komencis bojeĝi.

Malbona signo estas tio. Kio okazos — neniuj scias! Terura milito ja komenciĝis! Ve al tiu, al kiu suferon destinis la sorto...

<sup>1</sup> En la bulgaraj vilaĝoj la maljunuloj estas nomataj: avo † antaŭnomo, intime, anstataŭ sinjoro † familia nomo.

<sup>2</sup> Dum la milito la tirbrutoj estis rekviziciataj.

<sup>3</sup> La hundo.

La koro de la maljunulo ĝoje ekbatis, kvazaŭ li vidus amatan homon. Li ekstaris antaŭ la jugo de l' veturilo, atendis siajn tendenajn brakojn kaj kareseme ĉirkaŭprenis la kapojn de ambaŭ brutoj.

Ili kviete fermetis la okulojn.

Avo Stamen kun mallaŭta kaj maltrankvila voĉo ekrakontis al ili pri la enuo, kiun li suferis malproksime de ili, kaj iliaj suferantaj animoj kvazaŭ konfuziĝis en malgajaj kaj maltrankviligaj antaŭsentoj.

Li plendis al ili, ke jam dezerta estas lia domo kaj malplena la stalo, ke ĉiumatene, antaŭ sunleviĝo, li nepre iras en la stalon: ke al li ĉiam ŝajnas, ke li ilin vidas tie, sed ili forestas, kaj la dezerteco estas turmenta, neelportebla kaj ĝi kvazaŭ ŝiras elprofunde la koron.

Dio scias, ĉu li ĝisvivos la tagon, kiam en lia domo ekregos gajeco.

La brutoj aŭskultis kaj komprenis lian parolon, sed doloro pli granda kaj pli neesprimebla malklariĝis iliajn okulojn...

Ĉu tie ĉi ne estas iu, kiu ilin kompatus?

— He, maljunulo, vi karesas ilin kiel malgrandajn infanojn — mokeme kriis grandkreska kaj fortika soldato, kiu alproksimiĝis la bovojn kaj komencis ordigi iliajn kondukilojn...

— Ĉu ili estas viaj? — demandis la soldato.

Avo Stamen embarasiĝis.

— Jes, miaj ili estas, — li respondis. — Okaze min Dio alkondukis, por ilin vidi ankoraŭ unufoje...

— Do adiaŭu ilin, ĉar jen ni jam estas ekveturantaj — al la alia mondo, oni povus diri...

La maljunulo estis iom ofendita.

— He, knabo, vi ne scias, kion mi nun sentas! — ĝeme diris avo Stamen.



P. Szinyei-Merse: Verando 1902  
Kun la permeso de „Könyves Kálmán“

— Kiu nin demandas pri niaj sentoj kaj deziroj! — respondis la soldato, — nia sufero estas pli-malpli tolerebla, sed tiuj, kiuj staras kontraŭ la pafado...

— Dio ilin gardu! — ĝem-sopirante diris la maljunulo. Mi ankaŭ sendis filon kaj nepon al la milito, kaj neniu scias, kie ilin trafas la noktiĝo, kie la tagiĝo. Tri semajnoj jam pasis, de kiam ili forlasis la hejmon, kaj ankoraŭ nenian leteron de ili mi havas. Mi preskaŭ perdis la saĝon, mi nur malsupreniras en la urbon por ion ekscii, sed ĉie oni levas la ŝultrojn kaj silentas, kaj malbonaj pensoj migras tra mia cerbo...

— Do, ankaŭ mi kaj preskaŭ ĉiuj estas en la sama stato! — diris la soldato, ektiris la kondukilojn de la bovoparo kaj malrapide ekpaŝis.

La maljunulo lin eksekvis.

La veturiloj vice postiris unu la alian kaj la karavano etendis sin sur la vasta, griziĝinta kamparo.

— Io min trudas sekvi vin kaj neniam reveni, — eklendis avo Stamen. Mi sopiras al la bovoj... Mi vartis ilin de malgrandaj ĝis grandaj kaj mi kutimiĝis esti kun ili... Kvazaŭ miajn okulojn mi gardis ilin, sed nun al vi ili estas konfiditaj... Prizorgu ilin!...

— Ne zorgu pri ili, avo, ĉiukaze ilia situacio estas pli bona ol la nia...

— Ankaŭ ili havas animon — interrompis lin la maljunulo — ankaŭ ili suferas, kiel ni, sed parolkapablun ili ne havas kaj ili ne povas plendi...

— Nun ankaŭ ni similas al ili: kiam la situacio tedas nin, ni nur blekas... — ekkriis la soldato ĝenite kaj forturnis la kapon.

Avo Stamen tuj haltis kaj senespere ĝemis.

Neniu komprenas lian suferon.

Jam venis vesperiĝo, kaj la kamparo fordoniĝis al mortrigida silento. Super la nemalproksima kaj malregula silueto de l'ljulin-monto aperis la stelo vespera.

Eble ĝi ridetis por iu, kiu havas gepatran hejmon kaj sen turmentaj zorgoj renkontas la noktiĝon.

Kaj la longa karavano kvazaŭ stranga fantomo treniĝis kaj malrapide, iom post iom malaperis sur la mistere malheliĝinta vojo.

Avo Stamen staris en la sama loko kvazaŭ alnajlita, kvazaŭ subite li estus perdinta la konscion kaj jam ne povus konjekti, ke li devas reveni.

El liaj okuloj faladis larmogutoj... grandaj, silentaj larmogutoj...

El la bulgara: *Iv. H. Krestanoff*

## T R A G E D I O

SIGISMONDO MÓRICZ

**P**ri la morgaŭa edziniĝa festeno de la knabino Sarudy parolis ĉiu. Post la tagmanĝo la rikoltistoj sterniĝis en la subo de l'grenkrucoj, aŭ sub la tendetoj improvizitaj el forkegoj kaj rastiloj, kie surpendigita jupo donis iom da ombro por la vizaĝo de la kuŝantoj. Sufiĉas tio, por ke oni ne estu trafita de sunmalsano.

Sur la granda flava kampo gaje sin movis tien ĉi kaj tien tiuj ĉi formike diligentaj homoj kaj dum la superhome granda laboro, kiu ŝajnis kvazaŭ ne havi finon kaj limon, ili trovis ĝojon en la svingo de brakoj, en la movo de buŝo kaj la fraŭloj kaj knabinoj tiel ridegante pinĉadis unu la alian per vorto kaj per mano, kvazaŭ tio estus la ĉefe ĉefa tasko de la vivo.

Johano Kis estis manĝinta la pommanĝaĵon kiun lia somermakula, gapmiena filo, kiu lin timige similis, elportis por li. Poste li ĉirkaŭrigardis, sed li estis malvigla iri ĝis grenkruco kaj tie, samloke, li sterniĝis, sur la stoplejo. La ĉapelon li metis sur la vizaĝon kaj tuj ekdormis. Ankoraŭ tiom li aŭdis ke Paŭlo Sarudy buĉigis ankaŭ bovidon por la geedziga festeno.

Kaj li ekdormis.

Neniu zorgis pri li, eĉ ne lia propra filo. Ĉi tiu prenis la argilpoton kaj enrigardis: ĉu la patro ne lasis en ĝi iom ankaŭ por li? Certe li ne lasis. Tiel malplena estis la vazo, kvazaŭ ĝin la hundo Krispa estus jam ellavinta. Li renversis la glazuran poton kaj iris post la hundo por serĉi teran avelon.

Kiam Johano Kis vekigis, lia unua faro estis ekleki la buŝon. En sia sonĝo li estis en geedziga festo kaj bonege li satigis sin plena. Malbonhumore li ekpensis ke li forgesis ĉion, ankaŭ tion, kie li estis, ankaŭ tion, kion li manĝis. Se li almenaŭ ne estus vekiginta.

Li jam al kutimiĝis ke dum sia tuta vivo li devas rezigni pri ĉio, do li ne longe bedaŭradis. Li turnis sin aliflanken kaj ree volis dormi. Li ne sukcesis. Lia vizaĝo fariĝis ruĝa sub la ĉapelo, kvazaŭ kuirita kankro. Li depuŝis la nigran de malpuro pajloĉapelon rezigni pri ĉio, do li ne longe bedaŭradis. Li turnis sin aliflanken kaj ree volis dormi. Li ne sukcesis. Lia vizaĝo fariĝis ruĝa sub la ĉapelo, kvazaŭ kuirita kankro. Li depuŝis la nigran de malpuro pajloĉapelon kaj agrablis al li ke la kampa venteto freŝe tuŝis lian haŭton.

— La diablo dancigu tiun maljunan Sarudy — li pensis, — sufiĉe mi laboris por li dum mia vivo, li povus min inviti al la edziniĝo de sia filino. Ke fine mi satigis fojon.

Li levis sian dikfingron:

— Estos viandsupo. Bona, flava, grasa kokinsupo. Tio estos bona. Da ĝi mi manĝos unu teleron.

Kaj li jam plenbuŝis, suĉadis la densajn, etajn, flavkolorajn vermicelojn, kiujn plenmanope li glutigis malsupren tra sia gorĝo.

— Labori, homoj! — iu kriis.

Johano Kis ne moviĝis. Li rememoris ke foje, en sia infanaĝo, li estis en ia edziniĝa festeno. Eĉ parenca estis al li tiu familio, tamen nenion li ricevis el la tuta regalo krom kokpiedo.

Senpova kolero, sovaĝa furiozo kaptis lin. Lia



P. Szinyei-Merse: Alaudo 1882  
Kun la permeso de „Könyves Kálmán”



mano pugniĝis kaj li sentis ke nun li povus frapi tiel, ja tiel, ke ĉio rompiĝus-frakasiĝus.

Sed lia dikfingro rigide staris, pro tio ĉi li iom post iom rememoris kion li ĵus pensis.

— Poste, farĉita brasiko... Sesdek mi manĝos el ili... sed kvindek certe kiel unu.

— Uf, labori! — oni kriadis tie.

Ankaŭ li surpiediĝis pene. Li sentis sin malsata. Li alrigardis la nigraflankan argilvazon. Malplena... Kaj, sen tio, kio ja estus en ĝi? Nur ia sukaĉo.

Li piedbatis la vazon; malŝate kaj kolere. Ĝia flanko rompiĝis. Cetere ĝi jam estis dratumita kaj unu drato kroĉiĝis al lia ŝuo:

— Pesto vin trafu! — blasfemis Johano Kis kaj deskuis de sia piedo la malhelpaĵon. — Mi jam, dum mi nur vivas, ĉiam devos snufi tiun ĉi malriĉecon. Tiu maljuna fripono ne invitos min.

La tutan tagon li estis malbonhumora. Neniu rimarkis tion. Johano Kis estis tia nevidebla homo, kiun neniu ekvidas. Tiel li travivis sian tutan vivon, neniam li estis eĉ unu minuton interesa homo. Nek forta, nek malforta, nek malgranda, nek granda, nek lama, nek fieraspekta; kion li ja estus surhavinta okulfrapantan? Li estis kia la homo: du okulojn li havis kaj unu nazon. Ankaŭ lipharojn li havis. Kaj neniam venis io en lian kapon. Se estis mateno, li leviĝis, vespere li kuŝiĝis; kiam venis la tempo, li edziĝis. Tiam li satiĝis lastfoje, li malsaniĝis pro tio. Soldato li ne estis, ekster la vilaĝon eĉ dekfoje li ne iris, ankaŭ tiam nur al foiro. Ridi, tion li nur unufoje faris bonguste, tiam, kiam lia patro lin volis mortbati, ĉar li manĝis la tutan pladon da nudloj kaj kiam li frapis al li, pro sia propra frapo li ekŝanceliĝis, falis kaj frapis la kapon al la muro. Li ankaŭ mortis pro tio.

Ankoraŭ ĉi tio sola interesis lin: la manĝo. Pro tio li kutimis tradraŝi sian edzinon kaj se li havis iam penson, do pri tio, kion estus bone manĝi. Sed ankaŭ tion li ne sciis multe imagi. Vane: la sperto ne helpis lin.

Vespere, kiam ili estis hejmenirintaj kaj dirintaj al la mastro kion ili faris, la maljuna Sarudy diris:

— Viroj, virinoj, morgaŭ vespere ĉiu povos veni al la edziniĝo de mia filino. Tiom vi povos manĝi, kiom vi volos.

Johano Kis preskaŭ svenis. Li efektive ektimis. Tion li ektimis, ke li ne povos plenumi la taskon. La ceteraj ĝoj-

— Viroj, virinoj, morgaŭ vespere ĉiu povos veni al la edziniĝo de mia filino. Tiom vi povos manĝi, kiom vi volos.

Johano Kis preskaŭ svenis. Li efektive ektimis. Tion li ektimis, ke li ne povos plenumi la taskon. La ceteraj ĝojkriis, vivuis, sed li silentis. Tie li staris, malantaŭe, estis mallumiĝanta vespero, neniu zorgis pri li. Poste inter la aliaj ankaŭ li ekiris hejmen kun pezaj paŝoj.

Hejme li manĝis la vespermanĝon: bran-supon. Silente, senvorte. Piede li forpuŝis la katon, kiu grimpis sur lian kruron kaj miaŭis. Nenion li pensis. Sed tre strange li sentis sin, kvazaŭ granda, granda tasko atendus lin, la plej granda en lia vivo. Ĝi ne estis al li tute klara, sed time li pensis pri la morgaŭa festeno.

La tutan nokton li ne povis dormi. Multfoje li vekigis kaj maldorme sin turnadis, sed se li komencis prinensi kio

okazos morgaŭ, kaptis lin tre granda maltrankvilo. Li etendis la dikfingron:

— Unue estos kokinsupo... Da ĝi mi manĝos unu kuvon.

Li ekridetis. Li ekpensis ke, se oni verŝus en grandan kuvon la multan terpomsupon, kuminsupon, ĉeriz-, bran-, marmeladupon, kaj tiujn ĉiuspecajn farun-sukojn, kiujn li dum sia vivo jam manĝis, — ojoj, tiel granda kuvo ja ne estas en la mondo, eĉ en la kelo de la ĉefepiskopo de Eger ne estas tia barelo. Kaj se poste oni kunverŝus tiujn bonajn manĝaĵojn, kiujn li manĝis iam, — eble eĉ tiu aĉa kruĉo ne pleniĝus, kiun hodiaŭ li piedrompis sur la kampo.

Subite ŝajnis al li kvazaŭ li surhavis la ŝuaĉon kaj sentus ke enkroĉiĝas la vazo per la drato. Li forte ekfrapis per la piedo. Se li estus kuŝinta sur lito, ĝi senprokraste estus rompiĝinta, sed tiu ĉi pajla kuŝbenko ne tre atentis tiajn ekscesojn. Kvankam Johano Kis tre forte piedpuŝis. La malriĉecon li piedpuŝis for de si.

La postan tagon li vekigis grumbleme. Kiam la malbonan dormon li elfrotis el la okuloj, li klare sentis ke lia brusto estas tre peza. Kvazaŭ ferringo premus ĝin.

Li kuntiris la brovojn.

— Diablo dancigu tiun maljunan Sarudy, morgaŭ mi formanĝos lian bienon. Sufiĉe mi jam pioĉis por li.

Li ne kuraĝis matenmanĝi. Tagmeze li eĉ ne gustumis la tagmanĝon, li timis ke vespere li ne estos malsata.

Aliffoje, se li kverelis kun la edzino, multfoje li faris ke dum tuta tago li ne manĝis eĉ unu maĉon kaj li ne rimarkis. Nun tremis lia tuta interno kaj kapturmo kaptis lin pro la malsato.

Li kunpremis la dentojn, la grandajn, fortajn, dikostajn makzelojn kaj per siaj grizaj okuloj rigide rigardis antaŭen. Kun la obstina kolero de sovaĝbesto li luktis kun si mem. Sed li ne manĝis, li persistis.



— Kvindek farĉitajn brasikojn! — li ripetadis kaj kun fera decido li tranĉis la vicon de greno per sia falĉilo. Laŭtakte kvazaŭ rikolt-maŝino.

Ĉesis ĉirkaŭ li la mondo. Li ne vidis la grandan tritiktabulon, nek la homojn laborantajn ĉirkaŭ li, li konis neniun kaj nenion, ne havis estinton, estonton, tuta lia memo firmiĝis je sola granda volo. Tiel li kontraŭiris ĝin kvazaŭ ian taskon kiu superas la homan ekziston. Kaj li sentis ke lia tuta interno, lia stomako transformiĝis kaj kapablas nekredeblan laboron. Kiam kun fajrerantaj okuloj li enrigardis la mondon, li estus furaginta entrepreni ke la garbojn tiel li ŝovu en sin, kiel ĉe la draŝmaŝino la enmetanto ŝovas ilin en la faŭkon.

Fine vesperiĝis. Oni hejmeniris el la laboro, hejme jam de tagmezo daŭris la festeno. Eĉ tempo ne estis por sinpreparo, oni devis tuj sidiĝi ĉe la metita tablo.

Johano Kis venis en angulon; despli bone. Li apogas la dorson al la muro kaj tiam venu la malamiko. Kun tiu ĉi blinda kaj sovaĝa decidiĝo kontraŭrigardis iam iu lia praulo turkan armeon da dumil homoj.

Oni alportis la supon.

Johano nenion trovis multa, nenion trovis malmulta. Li ricevis taŭge profundan argilteleron kiun la kuiristino verŝis plenplena por li. Fingre dika estis sur ĝia supro la flava graso kiu jam eĉ ne disŝiriĝis je ringoj, sed kunfluis.

Johano Kis prenis sian lignokuleron kaj kviete, serioze komencis la laboron. Liaj intestoj tremis kaj li apenaŭ povis regi sian avidecon.

Ĉe la deka kulero lin trafis terura konsterniĝo.

Li sentis ke li satiĝis.

Palo kovris lian vizaĝon. Li eksentis ke kolosan taskon li surprenis. Li eksentis sian homan malgrandecon. Kvazaŭ vento trablovigis lian cerbon la penso ke li ne povos plenumi kion li surprenis.

Li kuntiris la brovojn; sur lia malalta frunto ĉiĝis vertikalaj sulkoj, liaj larĝaj fer-makzeloj krake kunbatiĝis kaj li denove sin ĵetis en la batalon.

Maŝine, kiel la falĉilon li svingas en arko de dekstre al maldekstre, nun la kuleron li levadis laŭtakte al sia buŝo, ĝis la telero malpleniĝis.

Tiam li sentis kapturon kaj naŭzan trosatecon. La manĝaĵo estis tro grasa por lia kaduka, malforta stomako kutimiĝinta al sengrasaj sukaĉoj.

Kazeaj vermiĉeloj sekvis. Bongustaj, laktokremitaj, la manĝaĵo estis tro grasa por lia kaduka, malforta stomako kutimiĝinta al sengrasaj sukaĉoj.

Kazeaj vermiĉeloj sekvis. Bongustaj, laktokremitaj, rost-larditaj, grasaj. Oni bone plenmetis lian teleron.

Kaj Johano Kis elprenis sian flavan, osttenilan rompitan forkon kaj same tiel trankvile, kiel ĵus antaŭe, ankaŭ ilin li laŭvice enmagazeniĝis. Li ne sentis la guston de la manĝaĵo. Premon li sentis interne kaj li ekdeziris iri al la libera aero. Aŭ almenaŭ ekblasfemi laŭte, maldolĉe. Kaj kun senfina doloro, envio li rigardis ĉirkaŭen. Ĉiu estis gaja kaj ridis, plumbuŝis. Kaj li jam sciis ke estas fino. Hodiaŭ li jam manĝis tiom, kiom li kutimis en sia tuta vivo dum unu sido. Sed li kungrincigis la dentojn kaj tenis sian teleron por la tria manĝo. Ĉi tio estis lento kun pork-dorsaĵo. Ekstere, inter la servistoj kaj laboristoj oni ne tenis sin al la kutima vicordo, kiun interne la fianĉin-gvidanto fiksas per versaĵo. Tion ili donis, kio estis al ili pri proksime. Tiu manĝis el ĉi tio, tiu ĉi el tio, Johano Kis el ĉio.

Tio daŭris du horojn longe, sen halto, sen ripozo.

Tiam venis la farĉita brasiko.

— Kvindek! — diris en si Johano Kis kaj vualo kovris liajn okulojn.

Grandaj viandopecoj estis metitaj inter la farĉaĵojn kiel aldonoj. Kaj kiam Johano Kis volis, post tri grandegaj farĉaĵoj, ŝtopgluti pecon de tia tendena, duonkuirita, nemaĉita viando, — li terurite stariĝis. Liaj okuloj elŝvelis, preskaŭ elsaltis el sub la dikaj brovoj, sur lia kolo la vejnoj ŝvelis ŝnurdikaj.

Kun sia lasta prudento li elkuris el la domo.

Li atingis la morusujon kaj tiam li saviĝis de la danĝero. La peco enpremiĝinta en lian gorgon, kiu jam preskaŭ sufokis lin, reglitis en la buŝon.

Larmoj eksidis en liaj okuloj kaj la makzelojn tiel fortike li kunpremis ke eĉ kojnon oni ne estus povinta bati inter ilin.

Kaj nun kun la ebrio de l' pasio li diris en si: — Krevu, hundo.

Denove li glutis la viandon.


Kaj ankaŭ nun li estis nekapabla por tio. Ĝi restis en la gorgo kaj plu ĝi iris nek supren, nek mal-supren.

La du manoj de la homo kaptis la aeron; lia malgrasa, longa korpo turniĝis kaj falis surdorsen.

En terura konvulsio li baraktis senvoĉe sur la tero, ĝis definitive li silentiĝis.

Neniu rimarkis ke li malaperis, kiel ankaŭ tion ke li ĉeestis aŭ tion ke li vivis.

El la hungara: *Karlo Bodó*



## AMKANTO

C. J. Hunt

Foje mi vagis tra ĝarden',	Ho, amatino, ho Luci',
La plej gracia en la mond'	Foje ĉagrenis disi min
Kaj superŝutis ĝin sukcen'	De via mola brust' kaj mi
De l' suno, kiel glata ond'	Tro rava kredis kisi vin:
De la senlaca Ocean':	Nun vi fieras en riĉec',
Nu, mi min banis en la bril'	Kaj ĉe vi dormas maljunul' ...
Kaj, sidiginte sub platan'	Ĉu en luksaĵoj kaj mondec'
Min dronis en trankvil'	Troviĝas ida lul'?
De la senlaca Ocean':	Nun vi fieras en riĉec',
Nu, mi min banis en la bril'	Kaj ĉe vi dormas maljunul' ...
Kaj, sidiginte sub platan'	Ĉu en luksaĵoj kaj mondec'
Min dronis en trankvil'.	Troviĝas ida lul'?

La birdoj kantis super mi;	Vi estis mia, kaj ni du
La floremajlo sur la ter'	Iam esperis pri domet'
Tapiŝon faris; melodi'	Humila, kiun tuŝos bru'
Forflugis supren el river'	De l' urb' neniam, sed kviet'
Vezike, sed en mia kor'	Kaj niaj songoj ĉirkaŭ ĝi
Sukcenon anstataŭis kot',	Teksos lulombron por infan'
Kaj la sunbrilon jam dolor'	Kaj tie kune vivus ni
Forŝtelis per dorlot',	Ĝis ĉio iĝos van' ...

Ho, vi kruela, ho virin',  
Kies venenon ĉiu trovas  
Unue dolĉa kiel vin',  
Naŭza nur poste! Kiel povas  
La amdezir' de malsaĝul'  
Kun tia ravo sin plenumi,  
Se fine devas arda brul'  
En nigran cindron fumi?

Tiel mi pensis en mizer',  
Kaj ploris sub la sunsukcen'  
Ĝis nebuligis ĝin Vesper'  
Sekretirante tra l' ĝarden':  
Tiam mi levis min kaj iris  
Hejmen kun mia kordolor',  
Kaj super mi la steloj miris  
En sia tur' el or' ...

# ARTO KAJ ARTISTOJ

PAULO VARSÁNYI: PAULO SZINYEI DE MERSE



P. Szinyei-Merse

Rívereto

En la historio de *l'ple-naerismo* lia loko estas apud la pioniroj. Se lia nomo ne sonas tiel, kiel tiu de *Manet*, la unua reprezentanto de ĉi tiu arta principo, ties kaŭzo estas en la malfavoraj cirkonstancoj kaj ankaŭ — en li mem, kiu ne havis sufiĉan batalemon, por persisti kontraŭ moko kaj nekompreno, kaj forĵetinte le penikon lasis ke la tempo preterkuru lin, kaj ke tiuj francaj pentristoj kies bildojn li eĉ ne vidis, solvu, sendepende de li, la problemojn de li jam solvitajn.

Li naskiĝis en norda vilaĝo de *Hungarlando* en 1845, el malnova, nobela, bienposedanta familio. Liaj inklinoj jam frue montriĝis. En 1864 lia patro portis lin al la akademio de *München* en la skolon de *Piloty*. Ĉi tiu medio tre impresis lin, sed sen ia decida efiko. *Piloty* postulis de li *grandajn historiajn komponaĵojn*, sed ili estis malproksime de lia ambicio. Post vanaj eksperimentoj estis permesata al li la pentrado en la libera naturo. Sed la naturo ne tiel montriĝis antaŭ li, kiel postulis tion la akademaj ordonoj: „*Nenie mi trovis la bonan mezspacon, nek la bonan fonon kaj nenie montriĝis la akademie taŭga bruna antaŭspaco*. Nenie kaj nenie mi trovis en la naturo tiajn aĵojn, kiajn oni pentris sur la bildojn en la skolo! En la naturo ĉio, ja ĉio estis tute alia. Kvankam multe pli simpla, sed multe, multe pli bela!“ Nun li komencis pentri bildon — la *Faŭno* (1867) — en kiu, obeante la akademajn pretendojn, li klopodis valorigi ankaŭ siajn individuajn ekvidojn. Li ekspoziciis ĝin en *Budapest* kaj *München*, sed la kritiko ignoris ĝin. Nun venis tempoj plenaj de problemoj: „Senĉese krosis en mia kapo: kiel do oni devus vidi ĉi tiun belan naturon kaj ripentri en bildo? Mi rigardis la verdan herbaron, mi rigardis la bluan ĉielon, la naĝantaj blankajn nubojn, la multkoloran floron, la malhelajn arbojn. . . Mi vidis la pejzaĝon en sunbrilo, mi vidis ĝin brili en luksa kolorpomo; mi vidis la pejzaĝon sub nubvualoj, mi vidis figurojn sen ombro, mi vidis herbaron, arbon kaj arbetaĵon kunfandiĝi en milda kolorharmonio. . . Sed tamen, ĉu estas eble tiel ripentri ilin? Ĉu estas permesate?“ Lin kaptis duboj; sed nun li rememoris pri io: „Miaj pentristaj kunuloj, kiuj en la pasinta jaro ĉeestis la parizan mondekspozicion (1867), rakontis miraklojn pri la francaj pentristoj. Ke ili ne komponas siajn bildojn! Tiuj bildoj estas tute tiaj, kia la naturo! Ĉio estas pentrita per simplaj, helaj koloroj! La verdan herbaron ili pentras verda per helverda koloro, la bluan ĉielon vere blua kaj la ruĝa tuko estas pentrita ruĝa per ruĝa koloro! Top! Ili ja estas miaj kunuloj! Ili faras tion, kion mi volus! — Tiel mi iĝis disĉiplo de *l'francaj pentristoj*, kvankam eĉ unu francan pentraĵon mi ne vidis.“

Li reiris al *München* kun freŝa animo kaj faris

ankaŭ bonan materialan rezulton. Nun venis diligenta laborado. En la *Kunstverein* li ekspoziciis malgrandan pejzaĝon, sed la kritiko mallaŭdis ĝin. Sed li ne perdis la kuraĝon.

„Dum la somero de 1869, en la *München*'a internacia ekspozicio mi vidis francajn bildojn la unuan fojon. *Courbet*, *Corot*, *Millet* estigis inter ni, junuloj, kvazaŭ revolucion. Leibl kaj mi mem laŭte indignis kontraŭ la *München*'a skolo, ni tuj ekŝiĝis de *Piloty* kaj ribeligis la junularon. *Courbet* vojaĝis al ni en *München*, kaj nia gvardio portis al nova direkto la junularon de *München*.“ Lia memfido revenis. Li luis alian atelieron. Tiam li pentris la bildon: „*Ĝeamantoj kuŝantaj sur fojno*“ (1870), kiu montras jam progresintan valorigon de la plenaera principo. La *prusa-franca* milito devigis lin forlasi la bavarian ĉefurbon. Li iris hejmen, sed tie li ne povis labori, ĉar neniu volis kompreni lin. En la printempo de 1872 li reiris kaj la arta vivo revigliganta redonis al li la humoron. Post malgrandaj bildoj li komencis pentri la „*Pikniko*“-n (1873). Tiam li interkonatiĝis kun *Böcklin*. „La plej bela, plej feliĉa periodo de mia vivo estis ĉi tiu. En amikeco, en ĉiutaga intima rilato mi vivis kun la plej granda pentristo de *l'jarcento*. Tiam progresis la laboro. *Böcklin* animis min: pli verdan, ankoraŭ pli verdan! . . . Nur per brilaj, akraj koloroj estas eble redoni la sunbrilon! . . . Viola, ruĝa, flava, blua, bruna, la ludado de *l'malpezaj bluj ombroj* sur la blanko! . . . la brilantaj sunmakuloj! . . . Ĉiam pli kaj pli supren sur la kolorskalo! . . .“ Por la figuroj li uzis modelon, sed la pejzaĝon li pentris elmemore, ĉar li povis vidi antaŭ si „ĉiujn herbojn, ĉiujn florojn.“ Ankaŭ li mem estas sur la bildo, kuŝante surventre, montrante la dorson al la mondo. Li ekspoziciis ĝin en la *Kunstverein*: „La publiko indigniĝis, sed al la pentristoj ĝi plaĉis.“ Ĉi tiu malsukceso tute rompis lian laboremon. Li retiriĝis al sia vilaĝa soleco, edziĝis kaj provizore rezignis pri la pentro, ĉar li sentis, ke la „*Pikniko*“ estas la ĉefverko de lia vivo: „Por kio do mi pentru? Neniam mi pentros pli bonan ol la *Pikniko*, pli bonan mi ne povas, kaj ĝin neniu bezonas.“ Naŭ jarojn li ne pentras. En 1882., en *Vieno*, instigite de *Makart*, li denove prenis la penikon kaj pentris la bildon „*Alaŭdo*“. Nun li aranĝis ekspozicion el siaj elektitaj bildoj; la estas la ĉefverko de lia vivo: „Por kio do mi pentru? Neniam mi pentros pli bonan ol la *Pikniko*, pli bonan mi ne povas, kaj ĝin neniu bezonas.“ Naŭ jarojn li ne pentras. En 1882., en *Vieno*, instigite de *Makart*, li denove prenis la penikon kaj pentris la bildon „*Alaŭdo*“. Nun li aranĝis ekspozicion el siaj elektitaj bildoj; la *Viena* kritiko rigore akceptis lin. La sama malsukceso akceptis lin en *Budapest*. *Gustavo Kelety*, la publikan opinion tiam direktanta kritikisto, esprimis sian bedaŭron kaj diris, ke *Szinyei* suferas je „*kolora deliro*“. Nun li porĉiame rezignis pri la arto. En *Jernye*, lia vilaĝa hejmo, li enmagazenigis siajn bildojn kaj ne plu laboris. „*Mi rezignis! Hic ego sum barbarus, quia non intelligor. Jes: mi estas ĉi tie barbaro, ĉar oni ne komprenas min.*“ La malbona sorto ĉiel premegis lin, li ekzedziĝis kaj ankaŭ materialaj zorgoj vizitis lin. Dum 27 jaroj lia mano ne prenis penikon. En 1894. pentristo, *Teodoro Zemplényi* vizitis lin en lia soleco kaj instigadis. „La glacio rompiĝis. Serioze mi eklaboris. Sed la laboro ne progresis tiel, kiel iam. La pentro el la memoro, rekte „el la ventro“ tute ne sukcesis“. Nun li ĉion pentris nur

merititan sukceson. En 1901 li ricevis la veran kontentigon: en la internacia ekzpozicio en München por la „Pikniko“ li ricevis la unuaklasan ormedalon. „Post dudekok jaroj mi ricevis la kontentigon! La pli grandan parton de mia vivo, tiujn amarplenajn dudekok jarojn, ilin jam neniu redonos al mi. Depost mia 28a jaro ĝis la 56-a!...“

\*

Kiel ni vidis, la tempo, kiam Szinyei aperis, ne estis taŭga por la novaj artaj principoj. Ankoraŭ regis la historiaj tradicioj kaj la historia genro ĉion sufokis. La tuta jarcento estis plena de politikaj movadoj, kiuj donis specialan formon ankau al la tiama mintaleco. Piloty pentris grandegajn historiajn bildojn,

kiuj donas fidelajn esprimiĝojn de l'tiamaj artaj pretendoj, laŭ la signoj de l' brunvida tradicio.\* La cirkonstancoj do ne taŭgis por Szinyei. Manet estis pli feliĉa, ĉar li havis inklinajn mediojn kaj multajn helpantojn, ne kiel li, kiu iĝis „barbaro“ en sia patrujo. Sed la miopa epoko feliĉe forpasis per la helpo de l' nova generacio, kiu portis al venko lian arton. Kaj li iĝis multe ovaciata pioniro de la moderna hungara pejzaĝpentarto, kiun la junularo ĉirkaŭis kun pia respekto. Li mortis en plena forto de sia kreado, en 1920. Longajn klarigojn liaj bildoj ne bezonas, ili estas klaraj kaj serenaj kiel sunbrila, somera tago, plenaj de freŝa vivĝojo, kiuj ŝajnas resorĉi la perditan, feliĉan mondon de l' maljuna Pan.

\* Vidu ampleksan konigon en la septembra n-o.

## E F E M E R E ! . . .

K. DE KALOCSAY

I.

Eternon mi balbutas senlimon ho mistero! . . .  
 Stelnebuloj en mi tordiĝas astroj kuregas atomoj en mi dancas eternan rondodancon de l' gaja Materio.  
 La mondon mi spegulas kun brilo ekstaza  
 kun scio triumfa la mondon mi spegulas . . . aŭdu, homoj!  
 Nenio sen mi. Miaj okuloj donas koloron al floroj  
 formon al kristalo zigzagan teruron al fulmo  
 miaj oreloj donas trilon al birdoj melodion al streĉita kordo  
 [tondran muĝon al Niagara  
 de mia lango ricevas aromon fruktosuko amaron galo dolĉon  
 [lipo kisanta,  
 mi sentas en la mondon parfumon fetoron, pikon doloran de  
 [dorno, glatan glitan dolĉe incitan veluron de haŭto virina:  
 kvin sensoj kvin buŝoj manĝas por mi la mondon: senvivan  
 [senestan haoson  
 por ke mia cerbo transformu ĝin en la brile klaran  
 mondon kiun mi vivas per ĉiuj fibroj, kiun mi spegulas per  
 [ĉiuj vibroj — ĝis la spegulo rompiĝos.  
 Post mi — nenio, antaŭ mi — nenio sed en mi — mondoj  
 [kaj mondoj kaj mondoj  
 la lumradio honte postrestas mian penson preterkuregantan  
 ruĝajn orangajn violajn sunojn kaj nigrajn globigantojn:  
 [blindajn vagulojn de l' Spaco . . .  
 . . . ho, mia penso, belege freneza sago kiun mi pafas  
 en la malhelbluon de l' Nokto ke ĝi flugu meteore  
 kaj kun fajre triumfa ekbrilo anoncu ĉe l' sojlo de l' Senfino:  
 „jen mi, sendita de hom!“  
 Ho festo majesta mistera volupta: konscii senci la mondon;  
 senlimon balbuti eternon; la mondon plezuri dolori  
 [vastiĝi, tiam, limo de l' spaco, pli malpli, pli vasti ter' Senfino,  
 senlimon balbuti eternon; la mondon plezuri dolori  
 vastiĝi trans limoj de l' korpo, kaj voli sin verŝi tra l' Spacoj  
 kaj tiam ho tiam [kaj Tempo] . . .  
 ekscii ekscii subite  
 kun frosto en spino konscii rekoni  
 la murdan taĉmenton de l' Tempo la flavajn  
 muelajn momentojn  
 kiuj venas vice seninterrompe nerezisteble ĉiam  
 kun sia nerimarkeble malrapida certa nepra maĉe muelanta  
 [detrua potenco.  
 Ho terura aro mortiga sinmortiga, momentoj; neeble vin kapti  
 [vi pasas for glitas for neeble vin fiksi  
 nereporteble vi pasas kaj ĉeestas, pasas kaj ĉeestas;  
 mezuras vin horloĝo, ĝi rustiĝos kaj haltos  
 mezuras vin pulsato de homoj, ili mortos kaj mortos  
 kaj mortos ankaŭ la lasta homo Tera  
 kaj super la senfina tolo funebra de glacio  
 kaj super la nudaj rokoj de la skeleto de l' Tero  
 kaj super la haoso de sunsistemoj karambolintaj  
 vi pasas kaj pasas kun egala senĉesa senindulga ritmo.  
 Ho, mizero!  
 Senlimon mi balbutus eternon eternon  
 trezoron unikan mi havus, vivon senton konon konscion amon.  
 Kaj perdiĝas la trezoro mizere, disfluas forglitas malaperas  
 en via senkompata sinsekvo, malicaj enviaj momentoj  
 trompaj donacantoj el kiuj unu rabas kion la alia donis

kaj inter kiuj mi vidas image la momenton nigre vualitan  
 kiu la vivon  
 mian vivon, bole pulsantan sukron  
 eltordos kaj verŝos en koton.  
 Kun certeco nepra ĝi venas kun certeco senindulga  
 ĝi proksimiĝas en la vico kaj ĉiu falanta momento  
 ĝin tiras post si per salteto, neeviteble senĉese senĉese.  
 Ho, se mi povus kapti iun, tiun ĉi, aŭ tiun ĉi . . . neeble! . . .  
 ili pasas kaj pasas . . . jen unu . . . jen unu . . . jen unu . . .  
 eterne eterne eterne  
 efemere efemere efemere  
 kaj kvazaŭ mia sango elgutas laŭ takto ilia  
 kaj mi senpove atendas la falon de ĝia lasta guteto.

II.

Momento . . . momento . . . momento . . .  
 sangguto . . . sangguto . . . sangguto . . .  
 malfeliĉa malŝparulo mi  
 disipulo sub trudo  
 ŝetas mi ŝutas mi perdas mi for  
 mian havon ununuran dentgrince gardatan trezoron  
 la Vivon kies oro  
 ŝanĝiĝas neeviteble  
 je moneroj senvaloraj: momentoj  
 forfluantaj el la manoj mizere . . .  
 ĉu ne eble helpi do  
 ĉu ne eble spiti do  
 kia freneza sopiro  
 travibras mian spinon kaj kovras  
 la frunton per la frosta ŝvit'  
 travibras mian spinon kaj kovras  
 la frunton per la frosta ŝvit'  
 de malespera fortostreĉ'  
 ho  
 se mi povus ekstari fortike kontraŭ la monotona muelrad' de  
 kapti momenton fine firme [l' Paso  
 trudi ĝin havi ĝin scii ĝin mia  
 disstreĉi ĝian daŭron je eonoj kaj en beata frenezo  
 plenŝtopi ĝin per sentoj pli potencaj  
 ol sunfrakasaj steluraganoj de l' Kosmo  
 ol materidetrui eksplodoj de l' atomoj  
 sentempe sendaŭre senpase  
 deskuinte  
 la ĉenojn de l' tirana Temp'  
 por sola sola eterndaŭra momento  
 etendi min jubile tra la surdaj Universaj senfino  
 bori min ĉiopove en la plej kernan kernon  
 de l' obstine malluma Materio,  
 kaj danĉi ĉirkaŭ kerno atoma  
 dolori la sopiron de gravitanta korpoj  
 amon malamon de ideoj  
 vibrigi eteron magnete lume elektre  
 dormi vivon en semoj  
 disvolvi en maja verdo konscii en cerboj  
 planti triumfe de globo al globo  
 kaj kiel ekstaza harmonio de scioj kaj sentoj kaj volo

ekŝvebi kiel ciklono de sentoj  
ekŝvebi kiel animo konscia, spirito plenumiginta  
senco kompleta  
de neesplorableblaj leĝoj universaj . . .  
egale se poste  
sub pezo kolosa  
de neesprimeblaj revelacioj  
en tiu ĉi eterna momento sentempa sendaŭra senpasa  
tenanta eonojn, senfinojn, energiuraganojn kaj animmiriadojn  
sennomajn senlimojn de spacoj kaj vivoj kaj sentoj  
mi falos per fulma frapo

de fortoj tro fortaj por homo  
de konoj tro brilaj por homo  
mi falos senspire senvive . . .

kaj poste do dancu  
atomoj stultan dancon de l'stulta Materio kuregu  
vojon sensencan stultaj sunoj blindaj globgigantoj  
de l'Nenio tra l'Nenio en la Nenion . . .  
jam spegulo ilia rompiĝis en pecojn fulgajn  
jam bildo ilia perdiĝis por eterne  
jam senco ilia mortis fandiĝis en polvon . . .

## FRAŬLINO ROZENHARC

MOISEO NADIR

Oni prezentis nin unu al la alia :

— Fraŭlino Rozenharc.

— Sinjoro Pidvoline !

Ŝi diris : — Ŝajnas, ke iam mi vin jam renkontis ie.

Mi rigardis flanken kaj diris oscedante :

— Povas esti,

Ŝi diris : — Bonvolu, nur *sen manoj*. Mi malamas tion.

Mi diris :

— Kiu provokas vin ? Kiu tuŝas vin ? mi volas nur palpi mian kravaton. Ne pli.

— Kravato ? ha ? nenion plian vi volis ? nu, jes. Mi tre bone konas vin, virojn, kaj scias, ke bone estas eviti vin.

— Eviti vin — mi jesis kaj ree oscedis.

— Kaj oni ne devas esti afabla al vi, ĉar male vi tuj pensas Dio scias kion.

— Vi jam pensas, ke Dio scias kio ! — postĝemis mi dormeme.

— Bonvolu teni vin iom pli malproksime ! — diris ŝi, vidante kiel unu el miaj piedoj prepariĝis por iri — kaj ne estu tiel . . .

Pli multe mi ne aŭdis, ĉar mi ankoraŭ foje oscedis kaj foriris, al aliaj junaj virinoj.

Post unu tago mi ricevis bonodoran leteron, kun la jena enhavo :

Amata Sinjoro Pidvoline !

Mi devas al Vi diri, ke ne estas bele de Via flanko, kiel Vi kondukis hieraŭ vespere. Ĉiufoje kiam Via rigardo renkontiĝis kun la mia, mi sentis kiel ĝi

Mi devas al Vi diri, ke ne estas bele de Via flanko, kiel Vi kondukis hieraŭ vespere. Ĉiufoje kiam Via rigardo renkontiĝis kun la mia, mi sentis kiel ĝi ekmordas mian junan korpon, kiel ĝi forglutas min, kun sia voluptemo. — Fi ! mi ne konjektis, ke dum tia mallonga tempo, de kiam ni nin konas, okazos inter ni tia afero. Mi konstante pensis, ke Vi amas mian animon kaj ne mian korpon. Kun saluto, Fraŭlino Rozenharc.

— Jen nova provoko al mi ! — mi diris al mi, traleginte ĉi tiun leteron — nun vi havas karnavalon en Majo. Ankoraŭ ŝi mankis al miaj zorgoj — ŝi, la dia ino.

Tamen al ŝi nenion mi respondis, ĉar mi ne volis komenci korespondadon kun ŝi. Nia renkontiĝo ja pendis jam super mi kiel ombro de malfeliĉo.

Pasas kelkaj tagoj, kaj mi ricevas ankoraŭ unu leteron, kun la jena enhavo :

„Honorinda Sinjoro Pidvoline !

Antaŭ kelkaj tagoj, mi skribis al Vi leteron, en

kiu mi atentigis Vin, ke ĉiuj rilatoj inter ni estas kvazaŭ disŝiritaj. Mi ne deziras ke Vi venu al mi, en la apartigitan ĉambron, numero 43, strato Ĝelna, dua etaĝo, maldekstre, loĝejo dekunu, inter la sepa kaj deka ĉiuvespere, krom vendredo. Mi volas ankaŭ diri, ke Via konduto rilate al mi ne estas tre bela. Homo kiel Vi, povas permesi al si konduton iomete pli delikatan kaj kvietigi sian voluptemon !

Mi scias ke Via amo al mi estas nur korpa kaj ne intelekta kaj tio abomenigas min.

Kun saluto Rozenharc.“

Traleginte tiun ĉi leteron, mi forĵetis ĝin kun granda kolero, elkraĉis kelkfoje, esprimis mian esperon, ke ŝin baldaŭ surveturos aŭtomobilo; aŭ ŝi mortos kun natura morto — al la diablo !

Denove pasis kelkaj tagoj, mi estis okupita per mia laboro kaj jam tute forgesis pri mia rozkora fraŭlino, kiam unufoje . . .

Estis ĉirkaŭ la dekunua nokte, mi sidis en mia ĉambreto, vestite en miaj dormvestoj, kaj mi fumis mian pipon, kiam subite, *tre* subite, pli subitege ol *tio*, malfermiĝis la pordo kaj envenis mia fraŭlino Rozenharc.

Ŝi al mi : Bonan vesperon :

Mi al ŝi : Bonan jaron.

— Kion mi povas fari por vi ?

Tiam ŝi al mi kolerete : Vi por mi nenion povas fari. Kontraŭe, ju malpli vi faros por mi, despli sane estos por ni ambaŭ.

Mi demandas ŝin : Kion signifas ĉi tio ?

Ŝi respondas al mi : Vi permesos ke mi ŝidiĝu fari. Kontraŭe, ju malpli vi faros por mi, despli sane estos por ni ambaŭ.

Mi demandas ŝin : Kion signifas ĉi tio ?

Ŝi respondas al mi : Vi permesos ke mi ŝidiĝu sur via lito. Ĉi tio signifas tre simple ke mi volas havi kun vi neniajn rilatojn, ĉar vin mi ne amas. Mia koro ne tiras min al vi. Mi scias — diras ŝi — ke de mia flanko estas kruele tiel paroli. Sed mi ne povas helpi. Mi ne volas, ke iu havu pri mi vanajn esperojn. Mi nepre devas al vi diri — ŝi ĉirkaŭprenis min per ambaŭ manoj kaj komencis plori kiel dum konfeso — mi nepre devas diri al vi, ke de la unua tago en kiu mi vin ekvidis, vi ne plaĉis al mi. Mi venis al vi diri, ke en miaj sentoj al vi estas io tia — diris ŝi kaj premis min forte al si — tia, tia, kio forpuŝas. Kio ne estas simpatia. Kaj pro tio mi estas kontraŭ vi indiferenta, malvarma kaj . . .

Monologfino : Ho, virinoj, kiu povas vin kompreni ? Kiu povas vin taksi ? Kiu povas imagi viajn vojojn ? Ho, Dio !  
El la juda : M. Tuler

# LET ER K E S T O

(Alsendaĵajn manuskriptojn ni ne redonas.)

J. B. Sub la pseŭdonimo *Kopar* sin kaŝas K. de Kalocsay. Li sciligas vin, ke li serioze konsideros vian bonvolan konsilon. Ĉar „la esperantistaro povas facile rezigni la „kolorvaloron“ kaj „esprimkapablon“ de li alportatan“, li eble serĉos „naci-lingvon por li pli taŭgan.“

Detalan respondon pri viaj kritikaj, diskutaj, riproĉaj kaj konsilaj rimarkoj li mem donos al vi en la tujposta numero.

„La revolvero“ ne taŭgas.

P. D. Vi demandas nin, kial ni uzas en la revuo la virinajn nomojn *Maria, Renata, Klara* ktp., ili ja estas substantivoj, do devas finiĝi per la litero „o“.

Ni estas dankaj, ke per via demando vi donas al ni okazon paroli pri ĉi tiu afero.

La problemoj de la virinaj nomoj estas tute ne solvita en nia lingvo. Ĉe Zamenhof ni legas: *Johanino, Antoniino, Ludovikino* ktp., do, por derivi virinan nomon el vira, estas uzata la sufikso „ino“. Sed same li uzas ankaŭ la nomon „Marta“, kaj, laŭ nia opinio, en ĉi tiu a finajo kaŝas sin la solvo de la problemoj.

Vere, la sufikso „ino“ ne taŭgas tie ĉi. Vortoj, kiel *Antoniino, Kristianino, Ludovikino, Konstantenino* ktp. estas terure longaj, pezaj, tute ne taŭgaj signifi ĉarman kuabinan estajon. „*Mariino*“ estas tute ne ebla, nerekoncible, dum „*Mario*“ ĉe la italoj estas ofte uzata vira nomo. Same: *Berto, Diano, Emilio, Ireneo*, ktp.

Ankaŭ la sufikso „io“, proponita de Meazzini en lia *Esperanta-Itala vortaro*, ne estas akceptebla solvo. „*Antonio*“, „*Emilio*“, „*Oktavio*“, „*Viktorio*“ estis uzataj ĝis nun kiel viraj nomoj, malfacile estus de nun uzi ilin kiel virinajn. Krome ĉi tiu solvo devigus nin uzi la terurajn, nenaturajn vortojn: *Aleksandrio* (nomo de urbo), *Augustio, Bernardio, Bertio, Diano, Renatio, Elvirio, Fernando, Franciskio, Johanio, Jozefio, Paulio, Paulinio, Vestio*, troveblajn en neniuj lingvoj de la mondo. Certe prefere *Vilhelmino, Johanino, Jozefino*, ol la ĉi supraj senformaj formoj.

Sed ni revenu al la vorto „Marta“. Ĝin naskis neceso. „*Marto*“ estus ja monato, „*Martino*“ ŝajnus vira nomo, „*Martenino*“ estus vortomonstro. La genio de Zamenhof elektis el kvar malbonaĵoj la malplej malbonan. Ni danku ĉi tiun elekton, ĉar ĝi montras al ni vojon solvi 90% procentojn de nia problemoj.

Ĉi tiun solvon mi konigas nun en du reguloj. La unua regulo, pli facilta, servas por la komuna uzado, la dua, pli komplikita, por la gramatikistoj, pruvante ke ĉi tiu regulo ne rompas la Fundamenton.

1. Ĉiu virina nomo finiĝas per litero „a“. Virinan nomon el vira nomo ni faras tiamaniere, ke ĝian finaĵon „o“ ni ŝanĝas je finaĵo „a“.

2. Ĉiu virina nomo estas rigardata kiel adjektivo rilatanta al la (ellasita) vorto „ino“. [Do: *Johana* (ino), *Jozefa* (ino).] Ĝi do konsistas el adjektivigita vira homo, kaj el la muta „ino“. Ĉe tiuj virinaj nomoj, kiuj ne havas konforman vironomon, ni supozas tian.\*

Per ĉi tiu regulo ni do ne rompas la Fundamenton, kaj ni ricevas nomojn kiuj estas plej similaj al la respektivaj nomoj uzataj en naciaj lingvoj. Jen ekzemploj: *Maria, Marta, Berta, Ida, Ada, Cecilia, Emilia, Baba, Henrieta, Anna, Agata, Angelika, Antonia, Augusta, Barbara, Bernarda, Karola, Debora, Diana, Dorotea, Eleonora, Eliza, Elizabeta, Elvira, Eugenia, Eva, Flora, Emma, Franciska, Gabriela, Genoveva, Georga, Getruda, Helena, Irena, Izabela, Izidora, Johana, Jozefa, Julia, Kamila, Katerina, Klara, Klotilda, Kristina, Laura, Lidia, Livia, Lucia, Luiza, Ludovika, Margareta, Mariana, Matilda, Monika, Natalia, Ofelia, Olimpia, Rebeka, Olivia, Paŭla, Paŭlina, Pia, Priska, Regina, Renata, Roza, Rozalia, Rokšana, Sibila, Santa, Sara, Serafina, Serena, Severa, Silvia, Simona, Sofia, Stefania, Suzana, Tekla, Teodora, Terezia, Valeria, Veronika, Viktoria, Vilhelma, Viola, Virginia, Zaira, Zenobia, Zita*, ktp.

Estas kelkaj nomoj, kiuj malfacile eltenas ĉi tiun metodon. Ni citu: *Adel, Alice, Beatrice, Judit, Agnes, Ester, Dolores, Rahel, Karmen, Neomi, Niobe, Salome, Rut, Zoe, Abigail*. Ili povas resti sensangaj, kaj aparteni al la kategorio de naciaj nomoj. Ĉar kompreneble ne ĉiun nomon oni devas esperantigi. Nomoj kiel „*Jacques*“, aŭ „*Jack*“ ne ĉiam estas tradukeblaj per „*Jakobo*“. Multfoje la originala vortformo apartenas al la „loka koloro“, kaj domaĝe estus difekti ĝin per traduko. Ankaŭ „*Björnsterne Björnson*“ ne estas „*Ursostelaro Björnson*“.

Ĉi tiu demando apartenas al tiu ĝena flanko de lingvo, kiun nenia artefarita lingvo povus iam solvi per siaj propraj reguloj, per sia propra logiko. Ĝuste la rigora altrudo de ĉi tiuj reguloj ne permesis solvi ĝis nun la demandon. Sed, laŭ nia opinio, la supre proponita solvo, krom sia natureco kaj bonaj rezultoj

\*Ĉi tio ne estas malpli akceptebla ol la supozo, de la vorto „*fraŭlo*“, el la vorto „*fraŭlino*“.

havas ankaŭ tiun avantaĝon, ke ĝi, per la apliko de la artifiko de l'dua regulo, malpleje rompas tiujn regulojn kaj tiun logikecon.

S. S. Vi ne estas la sola, kiu havas dubojn pri la uzo de la artikolo. En la Fundamento oni ne trovas certan regulon pri ĝi kaj ankaŭ la plej multaj lernolibroj preterglitas ĉi tiun aferon. Okaze de via demando ni klopodos doni iom pli detalan klarigon.

Oni uzas la artikolon:

1. *se temas pri io jam konata, difinita, jam priparolita*. Ekzemple: „*Mi ricevis leteron de U. E. A.*“ (ian ajn, neatenditan). „*Mi ricevis la leteron de U. E. A.*“ (tiun certan, pri kiu vi scias, ke mi atendis ĝin). Mi rakontas al mia amiko: „*Mi renkontis homon irantan kun ses hundoj.*“ Ni iom parolas pri ĉi tiu stranga kutimo. Kelkajn tagojn poste mi denove vidas tiun homon. Renkontinte poste mian amikon, mi diras: „*Mi vidis la homon irantan kun ses hundoj.*“

2. *se temas pri io kiel pri reprezentanto de sia klaso, kategorio*. Ekzemple: „*La homo* (ĉiu estaĵo apartenanta al la kategorio: homo) estas dupieda, senpluma besto.“ Same, se, en *multenombro*, temas *pri la tuta klaso, generale*, aŭ pli malvaste. Ekzemple: *La hundoj* estas fidelaj bestoj. Oni elhakis la arbojn apud la vojo. (Ĉiujn arbojn kiuj estis apud la vojo). Sed: „*Oni elhakis arbojn* (kelkajn, plurajn) apud la vojo.

3. *se temas pri io ununura, sola en sia speco*. (*La ĉielo, la firmamento, la suno, la Tero*.) Servisto enkuras kaj krias: *mortis ĉevalo*. Tio estas: *mortis iu nedifinita el la ĉevaloj*. Sed se li krias: „*Mortis la ĉevalo*“, tio signifas ke *mortis tiu certa ĉevalo*, pri kies malsano oni scias, aŭ *mortis la sola ĉevalo*, kiun oni havis.

Resume: oni uzu la artikolon, se al la resp. vorto estas antaŭmeteblaj, sen la ŝango de la senco, la jenaj vortetoj: *tiu, tiu certa, ĉiu, ĉiuj, ambau, sola, ununura, unika*.

Oni ne uzu la artikolon, se estas antaŭmeteblaj: *ia, iu, iu certa, kelka, kelkaj, peco da, multa, multaj, pluraj*.

Per ĉi tiu sinkontrolo oni bone povas sin helpi okaze de dubo.

Ekzemploj: folio de arbo = arbfolio (iu, laŭplaĉa), folio de la arbo = iu, okaze trafata, laŭplaĉa folio de certa, difinita arbo, la folio de arbo = certa, difinita arbfolio, la folio de la arbo = certa difinita folio de certa difinita arbo; aŭ folio de tiu arbo generale. (Ekz.: la folio de ĉi tiu arbo estas dentumita.) folioj de arbo = kelkaj aŭ multaj arbfolioj, folioj de la arbo = kelkaj aŭ multaj folioj de certa, difinita arbo, la folioj de arbo = certaj, difinitaj arbfolioj, la folioj de la arbo = ĉiuj folioj de certa arbo.

Ankoraŭ kelkaj reguloj.

La personaj nomoj kaj „*Dio*“ estas sen artikolo. Same la land- kaj urbnoj. La river- kaj montonomoj havas artikolon.

Se la epiteto de persona nomo, landnomo, urbno estas adjektivo, ĝin antaŭas artikolo. Se ĝi estas substantivo, la artikolo mankas. (La bona Dio. La perfida Eŭfaltes. La kuraga Petro. Johano la Brava. Rikardo la Leonkora. Johano la Sentera. Reĝo Filipo. Imperiestro Rudolfo. La brila Parizo. La potenco Britujo. Malsaĝulo Peĉjo. Sinjorino X. Dro Zamenhof. La du fratoj van Buck.) Escepto: Sankta Johano. Beata Angelika, ktp.

Atentu: Johano estas la Herkulo de la vilaĝo. Abstraktaj vortoj kaj vortoj de *materiale* estas sen artikolo, se ili staras solaj. Ekz.: fero estas mineralo. Amo estas donaco de Dio. Sed: la fero de Germanujo. La amo de P' filo.

Se la adjektivo estas uzata anstataŭ substantivo, ĝi havas artikolon. (La plej multaj jam foriris. Ĝi estas la mia. La Ĉiopova.) Antaŭ plej ni uzas artikolon, escepte se ĝi rilatas al *adverbo*. (Estus plej bone.)

Jen la misteroj de la artikolo. Se vi havas ankoraŭ ian dubon, bonvolu skribi, ni volonte estos, publike, je via dispono.

M. T. Bedaŭrinde honorarion ni ne povas pagi al niaj kunlaborantoj. Ni tre dezirus esti en tia situacio ke ni povu rekompenci ilin, sed ĝis nun ankaŭ la redaktantoj devis oferi monon por la revuo. Vi do devas kontentiĝi per honorekzempleroj. Ni konscias, ke vera gazeto rekompencas siajn kunlaborantojn, sed vera gazeto ne havas deficiton. Ho se ni povus fariĝi fine vera gazeto. Helpu nin por tio. Cetere ni notos nian ŝuldon al vi kaj pagos ĝin post la akiro de la dumila abono. Kaj tiam ni pagos al la aliaj. Kaj tiam la revuo ŝanĝiĝis nerekoncible. Kaj tiam ni estos proksime al tio, kion ni promesis en la unua numero de la unua jaro. Ĝis tiam, paciencon. Cetere ĉi tiu paciencon estas pli turmenta por ni, ol por vi, sed bedaŭrinde ĝin eminente eltenas la plejparto de la esperantistaro.

La bildoj troveblaj en la jena numero estas reproduktitaj, en arta kolora preso, de Arleldona A. S. Könyves Kálmán Budapest, kaj tie mendeblaj.



UNU DEMANDO: kial vi ne abonas nian plej belan gazeton?  
 UNU RESPONDO: la kaŭzo estas nur, ke vi ne konas ĝin!  
 UNU SUPOZO: se vi konus, vi tute certe tuj abonus ĝin!  
 UNU INFORMO: ĝi enhavas literaturon, muziknotojn, bildojn.  
 UNU SEKRETO: LM. estas la plej malkara esperantogazeto.  
 UNU ESPERO: vi abonos, abonigos LM-n, vi verkos por LM  
 UNU KONSILIO: sendu tuj 144 mil hung. Kr.-ojn (2—2.10 dol.) al  
 UNU ADRESO: Hung. Esp.- Instituto Budapeŝt, Eötvös u. 3

ĈU VI JAM KONAS

la monatan gazeton

# »INFORMOJ«

„DE ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO“?

Domage, se ne. Ĉar ĝi estas la sola esperantlingva perioda eldonaĵo *speciale* dediĉita por la vigligo de la Esperanto-societa vivo kaj kreo de esp-ista spirito de solidareco. *Konstantaj fakoj*: Debatejo esp-ista; lingvajaj recenzoj; korespondadreso; kroniko k. t. p. — *Kunlaboras*: la plej spertaj estonaj s-anoj, lingvokomitatoj. Büemann, Rob. Kreuz k. aliaj. *Specimenoj* sendotaj kontraŭ 1 respondukuponon. *Abono*: 1 jaro — 3 Sv. fr. 1/4 — 0.75 Sv. fr. *Anoncoj*: 5 Sv. cent. por 1 kvadr. cm. *Administrejo*: Tallinn, Estonio — poŝtk. 6.

“Informoj” aperas jam trian jaron!

## INTERNACIA MEDICINA

**REVUO** REDARTEJO KAJ ADMINISTREJO  
 BUDAPEST VI, TERÉZ-KÖRÜT 4  
**OFICIALA ORGANO DE T. E. K. A.**

Esperantistaj kuracistoj nepre abonu ĝin!

## Jus aperis Bulgara Antologio

(prozo kaj poezio) 257 paĝa ampleksa verko kun portretoj.  
Prezo: 5 fr. sv. au egalvaloro. — Mendebla che la aŭtoro:

Ivan Krestanoff, Pirdop, (Bulgarujo)

APERIS EN NIA ELDONO

## »EXPORT CATALOG«

kaj ĝiaj du „SUPLEMENT“ - aĵoj kun proksimume 500 figuroj pri tiuj artbildoj, kiuj en arta fabriko estas publikitaj de la suba artaj-eldona societo kaj estas aĉeteblaj en ĉiuj pli grandaj artaj - ven dejoj. La prezo de la katalogo estas 4 50 fr. sv.

**KÖNYVES KÁLMÁN MAGYAR MŰKiadó R-T**  
 BUDAPEST VI, NAGYMEZŐ-UTCA 37/39



**KIU ESTAS LA PLEJ BELA LIBRO EN ESPERANTO?**

LA ĜUSTE-  
 SOLVINTOJ RICEVOS PREMION  
 LA REZULTO ESTOS  
 PUBLIKIGATA

# ENIGMO

SENDU VIAN SOLVON ĜIS 31-A DE MARTO AL:  
**HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO**  
 BUDAPEST, VI. KERÜLET, EÖTVÖS-UTCA 3. SZÁM

# Literatura Mondo



Mediumdesegnaĵo

REDAKTA KOMITATO: JULIO BAGHY, PAULO BALKÁNYI, KARLO BODÓ,  
KOLOMANO DE KALOCSAY, P. DE LENGYEL, DR<sup>o</sup> V. TÓTH, P. VARSÁNYI,  
RESPONDA REDAKTORO: DR<sup>o</sup> BÉLA RÁCZ DE KOVESD L. K.

APRILLO 1925

IV. JARO 4. NO.

ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST, EÖTVÖS-UTCA 3



# NIA KUNLABORANTARO

LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CANAS (BARCELONA), HELMI & HILDA DRESEN (TALLINN), NIKOLAO HOHLOV (VARSOVIO), IVAN H. KRESTANOFF (PIRDOP), A. MAZZOLISI (FERMO), JAN VAN SCHOOR (ANTWERPEN), TIBERIO MORARIU (BUCURESTI), PAUL NYLÉN (STOCKHOLM), EMMA L. OSMOND (LONDON), PETRO STOJAN (CHISINAU), M. SOLOVJEV (NOVI SAD), DRO LEONO ZAMENHOF (VARSOVIO), RAYMOND SCHWARTZ (PARIS), J. JURYSTA (CZENSTOCHOVA), STANISLAW BRAUN (LODZ), HENRIKO SEPPIK (TALLINN), DANIELEYQUEM (PARIS), ZANONI.

## KRUCENIGMO

ĈIO NECESA ESTAS EKSCIEBLA EN LA ANTAŬA NUMERO.

### HORIZONTALE

- 1) Granda rabbirdo\*
- 2) Speco de greka kolono\*
- 3) Internacia esprimo por „besto“
- 4) Legomo\*
- 5) Dio antaŭ miljaroj

\* radiko

1		7	2		8
3					
6			4		
5					

### VERTIKALE

- 1) Eleganta kunvenejo
- 4) Frukto\*
- 6) Duono de l'homaro
- 7) Internacia esprimo por „nova“
- 8) Faraono

\* radiko

### PREMIOJ:

- 1) Duonjara abono. 2)—3) Karinty-Kalocsay: Morgaŭ Matene.  
Limdato: la 15 a de Majo.

## ANONCOJ: MALGRANDAJ: PO DU ENPRESOJ LA PREZO DE UNU NUMERO!

1 PAĜO  
1.200.000. H. KR.

R. T. P.

1/2 PAĜO  
600.000. H. KR.

## FILATELISTOJ! POŝTMARKKOMERCISTOJ!

Ĉiaspacajn poŝtmarkojn, precipe hungarajn ni donos interŝange kontraŭ popeca aŭ grandkvanta sendaĵo. Sendu nur sendifektajn, purajn (uzitajn aŭ neuzitajn) poŝtmarkojn.

HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO  
Budapest, VI., Eötvös-utca 3. (Hungarlando)

## GRAVA AVIZO RADIO GRAVA AVIZO

La potenco radia stacio W C C O (Duobla Vo, Co, Co, O), ĉe Minneapolis kaj Sankta Paŭlo, Usono, dissendos Esperantan Programon de la 23a ĝis la 24a horo, centra tempo (90a meridiano), vendredon, la 24an de Aprilo. Sur la meridiano de Greenwich estos de la 5a ĝis la 6a horo, sabato, la 25an de Aprilo, la potenco estos kvin kilovatoj kaj la ondlongeco 417 metroj, la programo estos koncerto kun anconoj esperantaj, parolado esperanta kaj esperantaj kantoj.

Ĉiun esperantiston, kiu legas tiun ĉi avizon, oni urĝe petas plenumi tri devojn:

Unue ke li penu, aŭ per sia ricevarato aŭ per ricevarato de amiko, ricevi la programon kaj nepre skribu al: Gold Medal Station WCCO, Minneapolis, Minn., Usono, pri sia sukceso aŭ malsukceso, priskribante la tipon de ricevilo;

Due: ke li petegu al la lokaj kaj landaj ĵurnaloj esperantaj ke ili represu tiun ĉi avizon;

Trie: ke li influu la tagĵurnalojn kaj precipe la radiajn ĵurnalojn ke ili donu kiel eble plej grandan publikecon al la tuimonda penado.

## NOMBRO DE ABONANTOJ LAŬ LANDOJ

Aŭstrio: . . . 8 (23)	Danujo: . . . . . 1	Hispanujo: . . . 30	Latvuj: . . . . . 8 (4)	Polujo: . . . . . 22 (4)
Aŭstralio: . . . . 2	Estonujo: . . . 18 (6)	Hungarujo: . . . 50 (85)	Litovujo: . . . . 15	Rusujo: . . . . . —
Belgujo: . . . . . 29	Finnlando: . . . 1	Italujo: . . . . . 8	Meksikujo: . . . —	Rumanujo: . . . 25
Britujo: . . . . . 11	Franco: . . . . . 13	Japanujo: . . . . 11	Nederlando: . . 3	Svedujo: . . . . . 4
Bulgarujo: . . . . 22	Germanujo: 39 (20)	Jugoslavio: . . 2 (45)	Norvegujo: . . . 2	Svisujo: . . . . . 9
Ĉeĥoslovakio: 4 (51)	Hindujo: . . . . . 2	Kosta-Riko: . . . 1	Persujo: . . . . . 1	Usono: . . . . . 5
Ĉinujo: . . . . . 1				Sume: . . . 346 (238)

PARENTEZE: OFE VENDITAJ

ankaŭ helpos vin trovi la resanigilon por mia aflikto.“ Oraetes leviĝis ĝojege. Li foriris, en spirito almenaŭ okdek jarojn pli juna ol kiam li venis.

#### IV.

„Parolu!“ diris Oraetes al Menopha, en la palaco de Memfis.

Kaj Menopha respondis. „Via reĝa moŝto, se vi estus juna, mi ne respondus, ĉar la vivo ankoraŭ plaĉas al mi; sed, ĉar vi estas multaĝa, mi diros, ke la reĝino, simile al kiu ajn alia mortemulo, devas pagi la punon de krimo.“

„Krimo?“ ekkriis Oraetes kolere.

Menopha humile klinis la kapon. „Jes; al ŝi mem.“

„Mi ne estas en humoro por enigmoj,“ diris la reĝo.

„Tio, kion mi diras, ne estas enigmo. Ne-ne-hofra kreskis sub mia zorgo, kaj ŝi konfidis al mi ĉiun okazaĵon de sia vivo, inter aliaj, ke ŝi amas la filon de la ĉefĝardenisto de via patro, Barbec estas lia nomo.“

La brovsulkoj de Oraetes grade malaperis.

„Kun tiu amo en sia koro ŝi venis al vi, ho reĝo; pro tiu amo ŝi mortos.“



Mediumdesegnaĵo

„Kie estas la filo de la ĝardenisto nun?“ demandis Oraetes.

„En Essouan.“

La reĝo foriris kaj donis du ordonojn. Al unu kortegano, Oeris, li diris: „Iru al Essouan kaj konduku ĉi tien la junulon nomitan Barbec. Vi lin trovos en la ĝardeno de la patro de l' reĝo; al alia: „Kunvenigu laboristojn kaj bovojn kaj ilojn, kaj konstruu por mi en la lago Ĉemmis insulon kiu, kvankam ŝarĝita de templo, palaco, kaj ĝardeno, kaj diversspecaj fruktoj, kaj vinberejo nepre, devos flosi tien ĉi kaj tien, laŭ la plezuro de la ventoj. Konstruu la insulon kaj atentu, ke ĝi pretiĝu je la malkresko de la luno.“

Tiam al la reĝino li diris: „Estu ĝoja. Mi scias ĉion, kaj mi sendis por Barbec.“

Ne-ne-hofra kisis liajn manojn.

„Vi povas havi lin por vi, kaj li vin por si, kaj mi ordonos, ke neniu ĝenu vin dum unu jaro.“

Ŝi kisis liajn piedojn; li ŝin levis, kaj kisis; kaj la rozoj revenis al ŝiaj vangoj, la skarlatato al ŝiaj lipoj kaj la rido al ŝia koro.

#### V.

Dum unu jaro Ne-ne-hofra kaj Barbec, la ĝardenisto, naĝis tien ĉi kaj tien, laŭ la blovo de l' ventoj, sur la insulo de Ĉemmis, kiu fariĝis unu el la mirindaĵoj de la mondo; neniam ekzistis pli bela hejmo de amo. Dum unu jaro, ili vidis neniun kaj vivis por neniu krom si. Tiam ŝi revenis pompe al la palaco en Memfis.

„Nun, kiun vi amas plej multe?“ demandis la reĝo.

Ŝi kisis lian vangon kaj diris:

„Reprenu min, ho bona reĝo, ĉar mi resaniĝas.“

Oraetes ridis, ne pli malbone, en tiu momento, malgraŭ siaj cent kaj dek jaroj.

„Do, estas vere, kiel diris Menopha: ha, ha, ha! la resanigilo de amo estas amo.“

„Mi tiel kredas, ho bona faraono,“ ŝi respondis.

Subite lia maniero ŝanĝiĝis, kaj lia rigardo fariĝis terura.

Mi ne tiel kredas,“ li diris.

Ŝi ekstremis, kaj kuntiriĝis.

„Kulpulino,“ li diris. „Vian ofendon al la homo Oraetes li pardonas; sed via ofendo al la reĝo Oraetes devas havi sian punon.“

Ŝi sin ĵetis al liaj piedoj plorante.

„Kulpulino,“ li diris. „Vian ofendon al la homo Oraetes li pardonas; sed via ofendo al la reĝo Oraetes devas havi sian punon.“

Ŝi sin ĵetis al liaj piedoj plorante.

„Silentu!“ li ekkriis. „Vi estas mortinta!“

Li kunfrapis la manojn, kaj terura procesio envenis, procesio de enbalzamigistoj, ĉiu kun ia ilo aŭ materialo de sia abomeninda profesio.

La reĝo montris al Ne-ne-hofra. „Ŝi estas mortinta. Faru vian laboron bone.“

#### VI.

Post sepdek du tagoj oni portis Ne-ne-hofran, la belulinon, al la kripto elektita por ŝia lasta ripozejo, kaj metis ŝin al ŝiaj reĝinaj antaŭulinoj; tamen nenia procesio je ŝia honoro sekvis ŝin trans la sanktan lagon. (Originale)



# V I K T I M O J

ROMANO EL LA VIVO DE SIBERIAJ MILITKAPTITOJ

JULIO BAGHY

## KVINA ĈAPITRO.

La vagonaro ekmoviĝis. En la kupeo estis malvarme kaj la petrolampo palpebrumante lumigis la kadukan internon. Dika glaciornamaĵo kovris la fenestrojn de la vagono.

Johano, tirinte sin en anguleton, senvorte rigardis la rustan anson de la interkupea pordeto. La virino, por varmiĝi, premis sin forte al li.

Kontraŭ ili sidis korpulenta kamparano, ronkante.

— Johano Juroviĉ, faru ion, ke li ĉesu ronki. — diris ŝi nerve. — Mi ne povas elteni la ronkadon.

Johano mallaŭte ekfajfis. La ronkado iom mallaŭtiĝis. La virino ekridis.

— Vi estas tre lerta, Johano Juroviĉ. Mi uzos ĉi tiun rimecdon ĉe mia edzo. Li terure ronkas.

Johano mallaŭte rimarkis.

— Kion vi farus en nia ĉambro? Precipe, kiam Varga ronkas. Li ŝajnas senfeligi vulpon dum la dormo.

La konduktoro venis kun kontrolanta milicano.

— Dokumentojn, gesinjoroj! Dokumentojn!

Johano montris sian pasporton. Ĝi kaj la biletoj estis en ordo.

Nun la milicano ekskuis la dormantan vilaganon.

— He! Vekiĝu! Montru la dokumenton!

La kamparano dormeme elpoŝigis eluzitan kartonon kaj transdonis ĝin. Dum la milicano ĝin rigardis, la kamparano denove ekdormis kaj ekronkis terure.

La virino ŝtopis la orelojn per la fingroj. La milicano kaj la konduktoro ridegis.

— La bileton, sinjoro! La bileton! — skuis lin la konduktoro.

— Nu! Kion?

— La bileton, sinjoro!

— Aha! Tuj... tuj... ..

La kamparano post longa penado trovis la bileton en iu interna poŝo de sia vesto, kle li gardis ankaŭ sian monon. — Unu kaj trirublaĵ bankbiletoj falis el la poŝo. Johano prenis kaj donis ilin en la manon de la dormema kamparano.

— Nu! Kion vi volas? — demandis la kamparano kaj senkomprene rigardis la monbiletojn.

— Via mono! Vi faligis ilin, — klarigis Johano.

— Jes??... Mia mono?... Nu bone! — kaj li ŝovis ilin en la poŝon de sia pantalone.

La milicano kaj la konduktoro ridante foriris.

La kamparano tuj ekdormis kaj post iom denove komenciĝis la ronkado.

Johano fajfetis. La ronkado ĉesis, sed nur por momentoj. La virino nervoziĝis.

Tiel estis dum la tuta, duonhora vojaĝo.

La vagonaro haltis antaŭ la stacidometo. La virino rapidis antaŭen kaj Johano estis sekvonta ŝin, kiam ies mano lin retenis.

Johano turnis sin kaj la kamparano singarde ĉirkaŭrigardante fustris hungarlingve al li.

— Kamarado! Ne iru hodiaŭ en la urbon!

— Kial?

— Mi ne povas diri pli. Eĉ tio, kion mi diris, estas rapidis antaŭen kaj Johano estis sekvonta ŝin, kiam ies mano lin retenis.

Johano turnis sin kaj la kamparano singarde ĉirkaŭrigardante fustris hungarlingve al li.

— Kamarado! Ne iru hodiaŭ en la urbon!

— Kial?

— Mi ne povas diri pli. Eĉ tio, kion mi diris, estas jam tro multa.

— Mi devas akompani tiun ĉi sinjorinon en la urbon.

— Ĉu ŝi estas via amatino?

— Ne!

La kamparano eklevis la ŝultrojn.

— Faru kion vi volas! Mi nur bonintence avertis vin, samlandano.

Ekstere la virino atendis.

— Sinjoro Bardy! Rapidu! Estas froste, — ŝi vokis Johanon.

Johano atente rigardis la vizaĝon de la nekonato.

— Kiu vi estas?

La kamparano senresponde disbutonumis sian mantelon kaj montris ruĝan rubandeton sur sia brusto. Momenton li retenis Johanon kaj subite li elvagoniĝis kontraŭflanke kaj kurante tra la reloj malaperis en la apudan arbaron.

Johano surprizite kaj konjektante malbonon sekvis lin per rigardo.

— Sinjoro Bardy, kio estas al vi? — interesiĝis la virino kiu intertempe denove envagoniĝis.

— Nenio grava! — respondis distrite Johano.

La virino esploris la seriozan mienon de Johano.

— Ĉu io okazis?

— Jes! Io okazis kaj mi ne scias kion fari?

— Kio?

— Hodiaŭ nokte io okazos en la urbo. Verŝajne ŝanĝo de reĝimo.

— Kiel do?

— Mi ne scias, sed tiu ĉi kamparano havis la insignon de bolŝevikoj.

— Nu, tion multaj havas kaj nenio.

— Sed li avertis min, ke mi ne iru en la urbon.

— Kaj vi ektimis! — diris la virino kaj al Johano ŝajnis iom da malrespekto en ŝia voĉo.

— Mi ne timas, sed eviti malagrablaĵojn estas pli prudente ol kuri kun la kapo al muro.

— Vi do ne volas min akompani hejmen?

— Tion mi ne diris. Kio ajn okazos, mi devas akompani vin. Vi ja estas hodiaŭ sub mia gardo.

Ili elvagoniĝis kaj ekiris al la urbo.

La nokto silentis. Ĝiaj malgrandaj lampetoj palpebrumis dormeme inter la blankaj nuboj.



Mediumdesegnaĵo

Johano kaj la virino rapidis tra la senhomaj stratoj kaj stratoj. Kelkfoje aŭdiĝis longe tirata bojado.

— La hundoj maltrankviliĝas, — rimarkis mallaŭte Johano.

— Ĉiunokte ili maltrankviliĝas, — kaj moketo aperis en siaj okuloj.

— Ne ĉiunokte. Mi jam centfoje vagadis nokte en la urbo, sed neniam estis tiel mortŝajna la urbo... Rigardu tiun dometon. Tie loĝas Medvedjuk, la tigro. Tiu domo fruespere ĉiam estis luma. Nun la fenestroj dormas. La tigro antaŭsentas danĝeron. Mi kuraĝus veti, ke li jam ne estas en la urbo.

— Kial vi nomas sinjoron Medvedjuk „tigro“?

— Ĉar li estas vera tigro. La rusaj soldatoj donis al li ĉi tiun nomon. Ni militkaptitoj nur transprenis la trafan epiteton. Pli kruelan homon mi neniam konis. Li estas kruela kaj sangavida.

— Sed la tigro havas tre ĉarman edzineton kaj beletan fileton. Lia edzino tre plaĉas al via amiko. Doŝky tre simpatias kun ŝi.

— Doŝky? Li nur kompatas la malfeliĉan virineton kaj la knabeton. Tiu ĉi kompatato naskiĝis en li, kiam la tigro loĝis kun sia familio en nia militkaptitejo kiel komandanto. Post la vizito de la svisa Ruĝa Kruco oni translokis lin en la urbon per subita ukazo.

— Jes mi rememoras. Oni multe parolis pri tio en la urbo.

— Pro diversaj kruelaĵoj li devis forlasi sian postenon. Lia plej abomena kruelaĵo estis, kiam dek barakojn plenajn de militkaptitoj li ordonis ekbruligi. En ili estis pli ol tri mil malfeliĉuloj, suferantaj je ekzantema tifo. Ili ĉiuj mortis kaj li eĉ fanfaronis, ke jen estas la plej efika rimedo por haltigi la epidemion. La virino ektremis.

— Ĉu al vi estas malvarme? — demandis Johano.

— Ne!... Mi vidas antaŭ mi tiujn malfeliĉulojn, kiuj post la najlitaj pordoj pereis en la flamoj... Ni rapidu!

Ili ekrapidis. La domo de la prokuroro estis preskaŭ ĉe la alia ekstremo de la urbo kaj ili apenaŭ faris la duonon de la distanco.

El iu apuda strato subite rusa patrolo el dek soldatoj kaj unu subotiro venis renkonte al ili.

— Ĉu vi vidas, sinjorino moŝto, la patrolo estas pli granda el ordinare?

— Jes! — respondis la virino kaj en ŝia voĉo oni povis rimarki malagraban surprizon.

La patrolo haltis, ĉia komandanto alparolis ilin.

— Dokumentojn!

Johano montris sian pasporton. La komandanto rigardis kaj redonis ĝin. Nun li rigardis la vizagon de la virino, lumigante ĝin per la manlanterno.

— Nu, bone!

Li salutis la virinon kaj mallaŭte komandis al la patrolo.

— Maar-ŝul!

La patrolo ekmarŝis, sed la komandanto ankoraŭ postrestis minuton kaj flustre diris al ili:

— Rapidu kaj ŝlosu forte la pordojn. Kiu ajn bruus, frapus, ne malfermu.

— Ĉu okazos io? — demandis la virino, ne povante kaŝi sian timon.

— Kontraŭrevolucio!... Ankoraŭ ne certaĵo, sed spionoj raportis, ke bolŝevikaj bandoj cirkulas ĉirkaŭ la urbo kaj volas ataki la urbon. Ĉu la sinjoro prokuroro estas hejme?

— Ne! Li vojaĝis ankoraŭ frumatene al Tockoesavsk.

— Kontraŭrevolucio!... Ankoraŭ ne certaĵo, sed spionoj raportis, ke bolŝevikaj bandoj cirkulas ĉirkaŭ la urbo kaj volas ataki la urbon. Ĉu la sinjoro prokuroro estas hejme?

— Ne! Li vojaĝis ankoraŭ frumatene al Tockoesavsk.

— Hm! Domaĝe, ĉar la bandoj venas el tiu direkto.

La virino ektremis. La subotiro rapidis al siaj subuloj.

— Johano Juroviĉ, mi timas.

— Ne timu! Li diris, ke ankoraŭ ne estas certe... Ni rapidu!

— Jes!... Ni rapidu!

Preskaŭ kurante ili atingis la longan straton, ĉe kies fino jam vidiĝis la belaspekta domo de la prokuroro. Apenaŭ ili faris kelkajn paŝojn, el la malproksimo aŭdiĝis paŝado.

— Jen! Ĝi jam komenĉiĝas, — flustris la virino kaj forte premis sin al Johano.

— Eble ĝi estas nur senkaŭza alarmo — Johano provis trankviligi sin.

Ili atingis la domon. Johano mallaŭte la pordegon kaj transdonis la ŝlosilon al la virino.

— Zorge ŝlosu la pordegon! — li diris kaj premis ŝian manon por adiaŭo.

La virino forte ekkaptis lian manon.

— Kion vi volas?

— Mi iras hejmen.

— En tia danĝera tempo?

— Ne grave! Vi opiniis antaŭ nelonge, ke mi estas malkuraĝa. Mi nur vin avertis pri la danĝero, mi timis nur pro vi. Adiaŭ!

— Ne, ne, ne! Vi devas resti! En tia tempo devas esti viro en la domo.

— La bone ŝlosita pordego pli bone defendos vin, ol mi sen armilo.

Subite aŭdiĝis bruo de veturilo kaj la paŝado estis pli laŭta kaj ofta. Ĉe la fino de la strato aperis armita trupo.

— Je la amo de Dio! Venu! — kriis la virino kaj tiris Johanon en la korton.

La paŝoj de la trupo pliproksimiĝis. Johano ŝlosis la pordegon. Ankaŭ la riglilon kaj la fermstangon li prizorgis atente. Dume la virino frapis la pordon de la vestiblo.

Post kelkaj minutoj interne aŭdiĝis dormemaj paŝoj.

— Kiu? — demandis rauka virina voĉo.

— Malfermu, Marusa, malfermu! Mi estas, — ŝi respondis tenante Johanon ĉe la mano.

La pordo malfermiĝis, ili enrapidis.

— Zorge ŝlosu la pordon, Marusa!

La pelton ŝi ĵetis de si.

— Ĉu la fenestro-fermiloj estas fiksitaj, Marusa?

— Jes! — murmuris la knabino.

Johano pendigis sian kaj ŝian peltojn sur vestpendilon.

— Ĉu vi pretigis la samovaron?

— Jam de longe!

— Nu bone. Portu ĝin en la ĉambrom.

La servistino iris en la kuirejon kaj ili paŝis en la ĉambrom. Agrabla varmo akceptis ilin.

La virino turnis la butonon de la elektra lampo. Johano staris en mezo de la ĉambro kaj lia unua rigardo renkontis la grandan portreton de la edzo, kiu ŝajnis riproĉe rigardi lin.

Ŝi ekĝemis, kvazaŭ liberiginte de peza ŝarĝo.

— Dank' al Dio! Ni estas ekster danĝero.

Johano nenion diris. Li estis profundiginta en la observado de la portreto.

— Kion vi rigardas?

— Vian edzon.

— Kie? — ŝi demandis kun pretera ekstremo.

— Tie. Sur la muro... Vidu kiel riproĉe li rigardas nin!

— Vi havas vigan fantazion.

La servistino venis en la ĉambrom kun la samovaro. Ŝi metis ĝin sur la tablon kaj atendis pluajn ordonojn.

— Kion vi volas, Marusa?

— Mi volis demandi, ĉu vi deziras ion?

— Nenion, Marusa, nenion. Vi povas foriri.

La servistino ekiris al la pordo, sed la virino haltigis ŝin — Marusa! Kiel faras la bubeto?

— Li estis iom maltrankvila, sed antaŭ unu horo li ekdormis.

— Vi povas foriri por dormi.

— Jes!

La servistino restis senmova kaj rigardis sian sinjorinon kvazaŭ havante ion por diri.

— Ĉu vi volas ion, Marusa?

— Nenion!... Mi nur havis malbonan songon... Mi vidis la sinjoron tute sanga en mia songo kaj tio ne signifas ion bonan... Ankaŭ vin mi vidis en blanka kitelo kaj vi...

— Mi ne estas scivo'a pri viaj songoj, — interrompis ŝin la virino.

— Bone, — la knabino levis la ŝultrojn kaj murmuris kvazaŭ al si, — sanga korpo kaj blanka kitelo signifas malfeliĉon...

— Mi ne estas scivo'a pri viaj songoj, — interrompis ŝin la virino.

— Bone, — la knabino levis la ŝultrojn kaj murmuris kvazaŭ al si, — sanga korpo kaj blanka kitelo signifas malfeliĉon... Mia avino estas jam tre maljuna kaj ŝi ĉiam diris, ke la songoj antaŭmontras la sorton... Mi nur volis diri...

Ŝi forlasis la ĉambrom.

Johano ankoraŭ staris en mezo de la ĉambro kaj superstiĉaj sentoj vekigis en li. La virino, kvazaŭ instinkte diveninta ilin, iris al Johano kaj milde ĉirkaŭprenis lin.

Johano per delikata protesta gesto liberigis sin el la ĉirkaŭplektantaj brakoj.

— Via edzo estas en danĝero. Mi sentas tion... Oni persekutas lin. Mi sentas tion... Ĉu vi ne sentas?

La virino staris momenton, kvazaŭ kaptite de ia terura sugesto, sed poste nerve ekridante ŝi iris al la tablo por pretigi la teon.

— Malvarme estas al mi, mi deziras glaseton da teo. Ĉu vi deziras ĝin kun lakto?

Johano nenion respondis. Li sidigis apatie kaj rigardis la ornamojn de la tablotuko. Ili estis broditaj rozoj, grandaj ruĝaj rozoj, sed pro la ofta lavado ili ŝajnis nur grandaj sangmakuloj. Almenaŭ la fantazio de Johano vidis ilin tian.

La virino metis glason da vaporanta teo antaŭ Johanon kaj ektuŝis lin por veki el la apatio.

— Jen la teo!

Johano levis la kapon, sed lia rigardo renkontis tiun de

la edza portreto. La virino, kun subita decido, iris al la muro kaj turnis la bildon al flanken.

— Nu! Ĉu bone?

— Kial vi turnis ĝin? Kial vi turnis ĝin? — demandis Johano kaj lia voĉo esprimis teruran timon. — Oni kutimas turni la bildojn de la mortintoj...

— Johano! — ŝi ekkriis.

— Returnu ĝin! Returnu ĝin!

La virino, sub la sugesto de ĉi tiu nerve kaj krude ripetata ordono, jam etendis sian manon al la bildo, kiam iu forte ekfrapis la pordegon.

Ŝi rigidigis pro ektimo.

La brua frapado sur la pordego ripetigis. Post momento aŭdigis rapidaj paŝoj sub la fenestro kaj iu kun freneza obstino frapadis la eksteran fenestrotabulon.

— Malfermu la pordon! — kriis Johano kaj li salte levigis de la tablo. — Marusa! Marusa! Malfermu la pordegon!

Marusa ektiminte kuris en la ĉambron. Johano kriis.

— Marusa, venu kun mi malfermi la pordon.

— Vi frenezigis, Johano! Vi frenezigis. Ĉu vi forgesis, kion diris la patrolkomandanto? Al neniu ni malfermu la pordon dum tiu ĉi nokto!

— Al neniu jes, sed al via edzo ni devas ĝin malfermi. Marusa, portu la ŝlosilojn!

La knabino kuris en la vestiblon. La virino haltigis ŝin.

— Marusa! Marusa! Ne kuraĝu malfermi!

La ekstera bruo sonis kaj sonis, ankoraŭ pli forte, pli mal-spere.

Johano krude puŝis la knabinojn en la vestiblon kaj eliris la keston de la skribotablo. Li serĉis revolveron.

Ekstere ĉesis la frapado, sed eksonis krioj. Laŭtaj sovaĝaj krioj.

Johano fine trovis la revolveron, ekkuris al la pordo, sed la virino jetis sin al lia kolo.

— Johano! Kion vi volas fari? Vi volas, ke oni mortigu nin! Ili estas sovaĝaj, brutaj kamparanoj!!... Johano! Marusa, ne lasu lin! Dio mia!

— Lasu! Lasu min! Via edzo staras antaŭ la pordego kaj oni persekutas lin! Mi sentas tion. Mi antaŭsentas tion! Marusa la ŝlosilojn! Lasu!

Marusa staris tremante kun la ŝlosiloj en la mano kaj ekploris.

— Kion fari? Kion fari? — ŝi ĝemis.

— Eh! Lasu! — kriis Johano kaj per ĉiuj fortoj li puŝis de si la virinon. Ŝi falis sur la kanapon.

En tiu momento ekstere ektondris pafo. La bruo ĉesis momenton, por poste eksplodi pli furioze.

En la ĉambro aŭdigis krako kaj bruo de rompiĝanta vitro. La edza portreto falis de la muro kaj ĝia vitro rompiĝis en cent pecojn.

Johano rigardis tien kaj ekkriis terurite.

— Vi mortigis vian edzon! Vi mortigis vian edzon!

La superstiĉo kaptis ambaŭ virinojn. Marusa, genuante antaŭ la sankta lampeto, plore ĝemadis. La virino, baraktante sur la kanapo, ŝiradis siajn harojn. El la tria ĉambro eksonis infanploro. Johano kun miemo de frenezulo rigide rigardis la portreton de la edzo, kiu kap-al-tere, kvazaŭ masko de mortinto, kuŝis apud la muro.

Ekstere la bruo fartiĝis tute freneza. Raŭkaj ridegoj eĥis tra la stratoj kaj oni povis klare aŭdi voĉon:

— Lasu lin, kamaradoj! Ĉu vi ne vidas, li ne povas veni plu? — Laŭ la tria ĉambro eksonis infanploro.

Johano kun miemo de frenezulo rigide rigardis la portreton de la edzo, kiu kap-al-tere, kvazaŭ masko de mortinto, kuŝis apud la muro.

Ekstere la bruo fartiĝis tute freneza. Raŭkaj ridegoj eĥis tra la stratoj kaj oni povis klare aŭdi voĉon:

— Lasu lin, kamaradoj! Ĉu vi ne vidas, li ne povas veni plu? — Johano rekonsciigis kaj iris al la vestiblo por malfermi la pordon. Marusa sekvis lin. La virino kuris en la trian ĉambron al sia ploranta fileto.

Johano malfermis la pordon de la vestiblo kaj aŭskultis.

Sur la strato estis laŭta disputo.

— Li devas veni kun ni!

— Ĉu vi ne vidas, kamarado, ke li ne povas?

— Sed li devas, mi diras... Dum la nokto de la libereco ĉiu devas veni kun ni.

Nun raŭke oni ekkantis.

Fine falis en polvon la idol'

Venkas ĉion la volo de l'popol'

Fine falos de trono ĉiu reĝ'

Kaj triumfos egaleco de la leĝ'

Ĉe la fino de la kanto ektondris pafo.

— Lasu, mi diras! — diris akra voĉo kaj iu forte frapis la pordegon per kalkanumo. — Ni iru!

La ekstera trupo ekiris kun laŭta ridego kaj sonis la kan-

Kamaradoj, alvenis venka hor,  
Kaj tagiĝo purpuras en la kor,  
Nia ruĝa standardo flirtas nun  
Kaj la burĝoj tremimas pro la pun'...

La kantado pli malproksimiĝis. Johano iris al la pordego. Marusa sekvis lin.

— La ŝlosilojn, Marusa!

La knabino donis la ŝlosilojn. Ŝi premis siajn orelojn al la pordego.

— Aŭskultu, Johano Juroviĉ! — ŝi diris kun tremanta voĉo — Li stertoras, kvazaŭ li sputus sangon el la gorgo... Aŭskultu!

Johano singarde malfermis la pordegon kaj en la sama momento vira korpo, kvazaŭ senvive, falis al lia brusto. Johano preskaŭ perdis la ekvilibron.

Kun la helpo de Marusa li trenis la stertorantan viron en la korton. La luno eklumigis la vizaĝon de la viro kaj Marusa ekkriis.

— Ivan Nikolaeviĉ!

— Kiu? — demandis Johano surprizite.

— Ivan Nikolaeviĉ Radĉenko! La servisto ĉe la tribunalo. Hodiaŭ frumatene li portis la sinjoron per ĝlitveturilo al Tockoesavsk.

— Ĉu li estas vundita? — demandis Johano kaj dume li reŝlosis la pordegon.

Marusa ekridis.

— Ne, tute ne! Li estas ebria... Kiel porko li estas ebria.

— Kie estas la sinjoro? Demandu lin, Marusa! Tockoesavsk estas tritaga vojo de ni kaj li jam revenis... Demandu lin!

Marusa ekskuis la senpovan viron, kiu kuŝis sur la tero kaj mallacile, kvazaŭ stertorante spiradis, kraĉadis ĉiumomente.

— Ivan Nikolaeviĉ!... Ĉu vi aŭdas!... Ivan Nikolaeviĉ!

La viro malfermis la okulojn kaj mucide ridetis.

— Kamaradoj, alvenis venka hor'... — li komencis kanti, sed liaj lastaj vortoj jam dronis en dormo.

— Ni nepre devas ekscii, kie li lasis la sinjoron prokuron, — diris Johano kaj ankaŭ li ekskuis la ebruilon. — Ivan Nikolaeviĉ! Ĉu vi aŭdas?... Rekonsciigu!

— Je... s! — singultis la ebruilo.

— Kie estas via sinjoro?

— Kaj tagiĝo... fine polvo... n la idol'... — kantis plu Radĉenko.

Johano per sia tuta forto ekskuis la ebruilon kaj krie ripetis la demandon.

— Ivan Nikolaeviĉ! Kie vi forlasis la sinjoron prokuroron?

Radĉenko ekridis.

— Li estas bona homo... Li estas bona... na hoomo!

— Bone! Bone! Mi scias, sed kie vi lasis lin?... Homo, parolu!

Radĉenko viŝis la vizaĝon per sia neĝkovrita mano. Marusa kelkfoje vangfrapis lin. Johano konstante skuis kaj penis levi lin de la tero.

— Ivan Nikolaeviĉ! Ĉu ne honte al vi?! — riproĉis lin Marusa. — Porko vi estas, vera porko!

— Homo! Parolu je la amo de Dio! Kie estas via sinjoro?

Radĉenko, kun videbla penado, klopodis ordigi siajn pensojn.

— La sin... joro... Eh!... Mi ne sci... as. — kaj la ofta singultado apenaŭ lasis lin paroli.

— Kie li loĝas? — demandis Johano la knabinon

— Ĉi tie, en la ĝardeno dometo.

— Ĉu li havas edzinon?

— Homo! Parolu je la amo de Dio! Kie estas via sinjoro?

Radĉenko, kun videbla penado, klopodis ordigi siajn pensojn.

— La sin... joro... Eh!... Mi ne sci... as. — kaj la ofta singultado apenaŭ lasis lin paroli.

— Kie li loĝas? — demandis Johano la knabinon

— Ĉi tie, en la ĝardeno dometo.

— Ĉu li havas edzinon?

— Jes.

— Voku ŝin tuj!

Marusa ekiris al la ĝardeno. Sur la sojlo de la vestiblo aperis la sinjorino kun knabeto dulara sur sia brako.

— Kio estas, Johano Juroviĉ? — ŝi demandis.

— Ivano Nikolaeviĉ venis hejmen tute ebrie...

— Ah!... Ivan Nikolaeviĉ?... Kaj kion li diras?

— Eĉ unu saĝan vorton ni ne povis ekscii de li... Li estas kvazaŭ porko.

Radĉenko komencis kanti.

— Kama... radoj... maradoj... doj... doj... doj... — kaj li ekkridigis.

La sinjorino reiris internen por gardi la knabeton de malvarmumo kaj post minuto ŝi revenis sola.

Radĉenko ankoraŭ kantis.

— Fine falis... ĉar vere falis... ĉar deviiis fa... li la... idol. La sinjorino ekkuturis al la ebruilo.

— Ivan!... Ivan Nikolaeviĉ!

— Ivan Nikolaeviĉ... Hehe! — komencis mediti la ebria viro — Kiu estas Ivan Nikolaeviĉ? Kiu?... Kiiuu?... Kiiuu?... Kiiuu... Kiiuu...

Mi ne po... vas eldiri... Hehe! Mi estas... mi essss sss  
.. sss... Silentu!... Si... lentu!

La virino skuis lin.

— Ivan! Kie vi forlasis mian edzon?... Ĉu vi aŭdas?

Radĉenko larĝe malfermis la okulojn, kvazaŭ montri, ke li estas en tute sobra stato.

— Nat... nature mi aŭdas! Kial ne aŭdi?... Mi hav... as orelojn. Mi aŭdas, vi aŭdas kaj ili... Jes!

— Ivan! — daŭrigis la demandadon la virino. — Ĉu oni mortigis mian edzon?

— Kial mortigi?... Kial mort... i... gi?

— Ĉar li ne revenis kun vi.

— Li ne venis, ĉar li ne volis, — kaj li kantante daŭrigis laŭ la melodio de la marselejo. — Li ne venis, ĉar li iris for... tramtratan... ta... tam ta tam.

— Ĉu li ne diris ion al vi?

Radĉenko daŭrigis la kantadon.

— Kaj li diiris jen leteero, donu tion al edzin'...

— Ĉu li donis leteron al vi?

— Jes li donis leteron tra tra ra...

— Kie? Kie estas la letero?

Radĉenko kun larĝaj gestoj daŭrigis la kantadon.

— En la pooŝ' de l' mantel', ta tara ta...

Johano traserĉis la poŝojn de la ebrulo kaj trovinte la leteron transdonis ĝin al la virino. Ŝi kuris kun ĝi en la domon vokante Johanon post si.

— Venu! Venu!... Lasu tiun porkon. Lia edzino jam venas por li.

Johano ekiris al la vestiblo. La edzino de Ivan Nikolaevič venis kun laŭta blasfemado tra la ĝardeno.

Johano estis jam sur la sojlo, kiam li aŭdis la bruon de la abundaj vangofrapoj, per kiuj la edzino regalas sian edzon.

Radĉenko plenkulme kantis.

— Fine falis en polvon la idol'...

— Falis vi en polvon, vi, ebria porko, ke Dio sekigu vian gorgon! Vi, fava porko!

Johano iris en la ĉambron.

La virino sidis sur la kanapo kaj legis la leteron. Apud ŝi sidis ŝia fileto. Johano haltis atende antaŭ ŝi.

Fininte la legadon ŝi senvorte transdonis la leteron al Johano. Li komencis legi la disĵetitajn liniojn.

#### Amata edzino!

Terura situacio devigis min forlasi la hejmon. Mi men. sogis al vi, dirante, ke oficialaĵoj vokas min al Tockoesavsk Ne pro tio mi forliris. La menŝevika reĝimo falis kaj mi, kun kelkaj, devas min savi per kuro. Kiam vi legos tiun ĉi leteron mi jam estos malproksime de la urbo. Mi savas min por vi. Post la paso de la uragano, espereble baldaŭ, mi revenos al vi.

Mi rifuĝas kune kun sinjoro Medvedjuk, kies spionoj ankoraŭ ĝustatempe avertis nin pri la danĝero. Kien ni irass, mi ankoraŭ ne scias, sed eĉ se mi scius, mi ne kuraĝu- sciigi vin nun pri tio.

Mi estas plena de timo pri vi, sed mi esperas, ke la virinojn indulgos la nova reĝimo kaj ĝi ne venĝos la forkurintojn je iliaj senkulpaj parencoj.

Ĉion vi trovas en ordo en mia skribotablo. La dokumen- tojn, transdonu al tiuj, kiuj venas en la nomo de la nova registaro kaj penu akiri ilian favoron por vi. Turnu vin por defendo al sinjoro Bardy, kies samlandano estas unu el la ĉefuloj de la ruĝa armeo. Li verŝajne ne rifuzos sian helpon al vi kaj al nia malgranda Fedja. Li estis al mi ĉiam bona amiko, kiu havas koron por la malfeliĉuloj. Mi ne estos sendanka al li post mia reveno.

Ne maltrankviligu pro mi, ĉar, kiel eble plej baldaŭ, ni revidos unu la alian. Ĉiutage kisu anstataŭ mi la malgrandan Fedja! Ĉiam kun ama koro rememoras pri vi via malfeliĉa edzo.

Fedja.

Dum la legado la virino atente rigardis la mienon de Johano. Ĝi jen esprimis doloran surprizon, jen ekflamis pro subita koler.

Nun li redonis la leteron. Senvorte. Estis silento dum kelkaj minutoj.

La virino levigis de la kanapo kaj iris al la skribotablo kaj fermis la leteron en la firkeston.

— Nu! Kion vi opinias? — ŝi komencis.

Johano ne respondis. Turmentaj pensoj atakis lin. Kion diri aŭ kion fari? Terura situacio. Lasi virinon al la duba protek- tado de militkaptito, kiu mem estas sen defendantoj. Kiamaniere li povus gardi ŝin kaj ŝian fileton kontraŭ tiuj, kiuj venos en la

nomo de la nova reĝimo? Li estas ja fremdulo en tiu ĉi lando, kiu ne havas civitajn rajtojn. Kial pensis ĝuste pri li la for- kurinto?

— Ĉu vi ne havas opinion, Johano Juroviĉ, aŭ via opinio estas tiel profunde ofenda, ke vi ne kuraĝas ĝin diri?

— Ne!

— Kial vi ne diras do?

— Ĉar mi ne scias, kion diri kaj kion fari.

— Vi estas prava. En via situacio ankaŭ mi ne povus tuj decidi. Mi eĉ ne indignas pro tio. Sed mi devas rimarki ion. Mia edzo forlasis nin je la duba favoro de vandaloj. Tion mi ne bedaŭras, ĉar, se ĝi estas puno, mi meritas ĝin. Mi neniam amis lin, naŭze mi turnis min ĉiam de li. Sed li trudis al vi neel- porteblan respondecon per sia peto kaj tio ĉi estas tre ĝena kaj tre hontiga afero por mi. Mi vidas, ke vi ne volonte akceptas la protektadon. Mi komprenas vin. La sola argumento, kiun mia edzo havas por senkulpigi sin estas, ke inter la soldatoj kaj gvidantoj de la nova reĝimo estas ankaŭ viaj samlandanoj.

— Sinjorina moŝto...

— Ankoraŭ mi ne finis... Mallonge: mi devas konfesi, ke mia edzo konas mian neestingeblan amon al vi.

— Katja!

— Ne timu! Mi mem diris tion al li. Mi mem!

— Kaj li.

— Li silentis, ĉar li ne havas rajton fari riproĉojn al mi. Mi levis lin al tiu pozicio, kiun li okupis ĝis nun.

— Mi ne komprenas vin.

— Estas malfacile kompreni tion, ĉar la plena konfeso eble detruus nian amikecon. Eĉ tiun atoman estimon, kiun vi sentas al mi, mi perdis per la sciigo de la vero.

— Vi devas esti pli sincera.

— Ne postulu tion, Johano Juroviĉ! Ne postulu tion!

La virino kun petega mieno staris antaŭ Johano. Li ek- kompatis ŝin.

— Vi estas prava, Katja. Mi ne havas rajton demandi vin.

La virino iris tute proksimen al li kaj diris kun certeco en sia voĉo.

— Nur vi havas rajton, Johano, kaj neniu krom vi. Mia edzo jetis min al vi. Mi apartenas de nun al vi. Nur al vi.

Ŝi karese ĉirkaŭbrakis Johanon.

Johano staris senmove. Liaj pensoj vagadis tre malproksime. Li vidis antaŭ si siajn proprajn. La infano sur la kanapo, la virino, flustranta amajn vortojn, kiel iam lia edzino, la intima varmo de la hejmo fremda, kiu senĉese mistifikas lin, la tuŝo

## AMKANTO

SAPPHO

Ho, feliĉa vir', egalanta diojn,  
Kiu en proksim' de vi povas sidi  
Kaj aŭskulti vin, la parolon freŝan  
Ridon arĝentan!  
Kiu en proksim' de vi povas sidi  
Kaj aŭskulti vin, la parolon freŝan  
Ridon arĝentan!

Kaptas min korprem', se mi vin ekvidas.  
Via vizaĝet' se aperas brile,  
Lamas mia lang', ne kapablas lipoj  
Vorton eldiri.

Palas mia vang', tra la haŭt' fajreroj  
Kuras, brulas mi de sopir' sovaĝa,  
Turnas min la kap', mia vido vibras,  
Muĝas oreloj.

Ŝvit' malvarma sur la tremanta korpo  
Gutas. Mia vang' jam ekvelkas kiel  
Herb' aŭtuna. Kaj pro dolor' sufoka  
Svene mi falas.

K. de Kalocsay

de karesantaj manoj, ĉio ĉi dum momento ŝajnis belega sonĝo, kiu katenis lin.

— Johano, mi estas via. Mi estas via rajta posedaĵo. Li donis min al vi, ankaŭ li donis min al vi . . . Kaj mi amas vin, Johano, tiel sincere, tiel sindone, kiel ankoraŭ neniu amis vin . . .

La virino, sentante sian superecon, premis sin al la brusto de Johano. Johano ne kontraŭstaris. Li ne sciis, kion diri?

— Johano! Ankaŭ vi amas min! — ŝi flustris. — Vi ne povas tion nei plu. Ankaŭ vi amas min, Johano. Vi, mia kara, mia sola konsolo!

Kaj ŝi etendis siajn lipojn por kiso. Johano prenis sian blondan kapon inter siajn manojn kaj senvorte rigardis al ŝiaj brilantaj okuloj.

— Kisu min! — spiris la virino apenaŭ aŭdeble.

Johano jam forgesis pri ĉio. Li vidis nur la ridetantan tenton antaŭ si. Li sentis la varmegan spiron de la soifaj lipoj. Lian animon sklavigis la potenca sugesto de la flamantaj okuloj kaj lin kaptis neretenebla sopiro.

— Katja! . . . Katja! — li flustris sinforgese kaj liaj lipoj jam estis tuŝantaj la ŝiajn.

— Al paĉjo! . . . Al paĉjo! — ekploris la infano sur la kanapo.

Johano subite rekonsciigis. Al li ŝajnis, kvazaŭ lia propra infano estus lin avertinta. Flamruĝo de honto kaj kolero ekbrulis sur liaj vangoj. La virinon li forpuŝis de si kaj ekkriis plengorge.

— Marusa! . . . Marusa!

La virino, terurite de lia mieno, tremante rigardis min.

— Kio estas al vi? . . . Kio okazis?

— Nenio okazis! Nenio! Dank' al Dio! . . . Dio intervenis. Li avertis min per la buŝeto de via infano . . . Kvazaŭ mia infano estus kriinta.

Histerie ekridis la virino. Johano kriadis.

— Marusa! . . . Marusa!

— Kion vi volas? — ŝi demandis kun subita konsterniĝo.

— Mi volas foriri el tiu ĉi domo . . . Mi volas foriri tuj, por neniam reveni . . .

— Johano!

La virino falis antaŭ li kaj spasme ĉirkaŭprenante liajn kruojn ŝi petegis

— Johano! Ne foriru! . . . Ne forlasu min! . . . Kompatu min! . . . Johano, kompatu min!

Johano penis liberigi sin de la virino, kiu en malespera barakto tenis lin preme.

— Marusa! . . . — kriis Johano, kaj senpacience li rigardis al la pordo.

La mano de la virino tuŝis la revolveron, forgesitan en la poŝo de Johano. Kun subita decido ŝi elpoŝigis ĝin kaj saltlevigis.

— Iru! Iru, sed en la sama momento, kiam vi transpaŝos la sojlon, mi estos mortinta . . . Iru do!

Johano saltis al la virino kaj penis forpreni la danĝeran ilon el ŝia mano. La infano krie ploris. La pordo malferniĝis kaj Marusa kuris en la ĉambro kun hirtaj haroj, dormema vizaĝo. Ekvidinte la revolveron en la mano de ŝia sinjorino. ŝi terurite ekkriis.

— Jesuo mia! Sinjorino!

Johano eltordis la revolveron kaj ĵetis ĝin en angulon de la ĉambro. La virino silente ekploris kaj fale sidigis sur la kanapon. Ŝi ĉirkaŭprenis sian fileton kaj kisadis lin freneze, senhalte.

Marusa staris senkonsile kaj rigardis jen al ŝia sinjorino, jen al Johano, kiu rompita pro la tumultaj okazaĵoj falis teren antaŭ la virino kaj klinis sian kapon sur ŝiajn genuojn.

Longa silento. Marusa piedpinte iris al la angulo kaj levis la forĵetitan revolveron.

— Dio mia! Dio mia! — ŝi ĝemadis mallaŭte. — Sanga korpo, blanka kitelo ne signifas bonon . . . Mi diris ja . . . Dio mia!

La mano de la virino moviĝis kaj karese palpatis la taŭz-itajn harojn de Johano.

— Johano Juroviĉ! . . . Ĉu vi povus pardoni min . . . Johano Juroviĉ . . .

Ŝi denove ekploregis. Johano haltigis la karesantan manon kaj kisadis ĝin.

Marusa milde ekpuŝis Johanon kaj mallaŭte demandis.

— Ĉu la sinjoro prokuroro mortis?

Johano rezigne respondis.

— Jes! . . . Li mortis por ĉiam . . .

## P E N S O P R I L A E T E R N O

J A N K O L E S K O V A R



En la vilaĝo Druškovaĉ vivis instruisto Djuro Martiĉ. Oni opiniis, ke li estas malsana, sed efektive, tion li ne sentis, sed tamen li ne fartis plu kiel iam, antaŭe. Nun tre elmontriĝis liaj bluaj vejnoj, kiuj delikate disvastiĝis ĉirkaŭ la okuloj kaj pilongiĝis tra la frunto. Ankaŭ liaj lipoj iel velkis kaj la oreloj maldikiĝis, paliĝis; sed tamen li ankoraŭ ne tusetas, kaj sian oficon ĉiam akurate li plenumas. Krom tio, la lerneja instruisto elmontriĝis liaj bluaj vejnoj, kiuj delikate disvastiĝis ĉirkaŭ la okuloj kaj pilongiĝis tra la frunto. Ankaŭ liaj lipoj iel velkis kaj la oreloj maldikiĝis, paliĝis; sed tamen li ankoraŭ ne tusetas, kaj sian oficon ĉiam akurate li plenumas. Krom tio, la lerneja inspektoro estas pri li tute kontenta.

Kontraŭ la infanoj li estis bona, sed ofte lin kaptis ia enuo, de kiu nek la kaŭzon nek la nomon li povis trovi, kaj tiun ĉi enuon li ne povis forigi dum la tuta instruado. Se li rajtus, plej bone estus tiam sendi la infanojn hejmen, sed tion oni ne rajtas.

En tia stato li ne sciis gardi pri sia trankvileco en la lernejo, li estis malpacienca, ekscitiĝema, kaj nomis iun infanon azeno, malsaĝulo — aŭ kaptis iun ĉe la orelo aŭ hararo.

Post kiam tiu ĉi senkonscio linforlasis, li bedaŭris ĝin kaj decidis: neniam plu, sed baldaŭ li denove same eraris.

Tio okazis ĉe li verŝajne pro la tro granda penado.

Li estis sola en la lernejo, kun duontaga instruado, kaj por tio li devis ankoraŭ instrui kelkajn horojn pli — kaj vintre eĉ ne sufiĉis la tago. Tamen ankoraŭ

ripozi, io ĉiam devigis lin mediti — mediti sen ripozo, ĝis fine lin kaptis kapdoloro. Tiam liaj nervoj komencis sur la palpebroj tremi, la vejnoj sur la tempioj danceti kaj li tute lacigite sin ĵetis sur la liton. Lia servisto Daŝa lin petis, ke li stariĝu, ke li sin senvestigu, por ke li pretigu la liton — li aŭdis tion, sed longe, longe li ne moviĝis, kaj eĉ vorton ne diris, kvankam ankaŭ li mem deziris la dormon.

Li senmezure sopiris je la noktoj, ĉar ili al li kaj al liaj lacigite sin ĵetis sur la liton. Lia servisto Daŝa lin petis, ke li stariĝu, ke li sin senvestigu, por ke li pretigu la liton — li aŭdis tion, sed longe, longe li ne moviĝis, kaj eĉ vorton ne diris, kvankam ankaŭ li mem deziris la dormon.

Li senmezure sopiris je la noktoj, ĉar ili al li alportadis sonĝojn, kaj al la sonĝoj li donis signifon alian ol lin iam instruis lia instruisto de pedagogio en la instruista lernejo. Kiom li memoris, liaj sonĝoj de lia infanaĝo havis ian signifon, sed li ankoraŭ longe tenis la teorion, kiun li lernis en la instruista lernejo.

Sed antaŭ kvar jaroj okazis rompo kaj li disigiĝis de la instruo de l' Herbart'anoj. Iun vesperon li kuŝiĝis kiel ordinare kaj ekdormis. Ĉu li vere dormis, tion li tute ne povus certe diri; li estis maldorma, tiel al li ŝajnis. La nokto estas malluma; li ekvidas sian patron revenantan hejmen kun lumigilo en la mano. Li venas al rivereto, kiu pligrandiĝis pro l'aŭtuna pluvo. Li ekiras sur la trabon kaj preskaŭ li jam transiris, sed jen, lia piedo forglitas kaj li malaperas en la mallklara, kotplena akvo . . . En lia koro estiĝis malvarme kaj li ekkuŝiĝis. Li palpatis sian frunton, kaj sur ĝi — malvarma

La sekvintan tagon, kiam la infanoj ĵus eliris el la lernejo, li ekvidis homon venantan, vestitan per la vesto de lia regiono. Lin traigis timotremoj. La homo alvenis kaj li fikse ekrigardis lian vizaĝon.

— Mi scias, mi scias, — li diris mallaŭte — kaj kie vi eliris lin?

— Iom pli malproksime de la trabo, li alkröçigis ĉe la maljuna saliko.

De tiu tempo Djuro Martič sin donis tute al la nokto, kiu portis al li en sia sino ian misteran vivon. Liaj songoj estis tiel vivaj, efektivaj, ke li ofte konfuziĝis, kio efektive estas songo, kio la vivo. Unu songo, sufiĉe eksterordinara, ofte al li revenadis.

Li kunvenis kun mortintoj.

Ili estis liaj kunuloj: unu kiu dum tri jaroj ĉiutage po unu fojo kun li manĝis en popola kuirejo; li mortis ankoraŭ en la tria klaso, (oni ne sciis pro kio); al la dua vermetoj elmanĝis la pulmon, kaj la tria — nu, tiu povus ankoraŭ nun vivi, se li ne estus sin mortiginta. Kun tiuj tri — nun ili plu ne estis tiel malgrasaj — li ofte kunvenis. Komence li kvazaŭ sciis, ke li songas, kaj li diris al ili: — „Amikoj, ĝi estas songo, ne estas eble, vi estas mortintaj.“ — Sed ili komencis lin konvinki, ke ĝi ne estas songo, ke ĝi estas la vivo, efektiva vivo. — Kio ja venas en vian kapon? — ili diris, — ni ja estas ĉi tie, jen al vi la mano! — Kaj al li ŝajnis, ke ĝi estas efektiva vero, kaj kiam li foje post tia songo vekigis, tiel li konfuziĝis, ke li ne sciis, ĝis kie disvastiĝas la songo, ĝis kie la vivo. Al li estis, kvazaŭ li estus ie songinta ke liaj amikoj mortis kaj kvazaŭ en songo li estus leginta tiun sciigon en sia pedagogia gazeto. Tamen, li ekserĉis tiun numeron de pedagogia gazeto, sed li ĝin ne trovis. Tiam li komencis revenigi diversajn rememorojn, sed tio lin ankoraŭ pli multe konfuzis kaj tiam li sidiĝis kaj skribis leteron al la patro de Ivan en Fiume, en kiu li petas lin pri la sciigo: kio estas al Ivan, ĉu li vivas aŭ li mortis. Kaj jam li volis sendi leteron, kiam denove komencis al li rememoraĵoj viciĝi, ideoj klariĝi.

— Jes, mortintaj ili estas, mortintaj!

Sed ne estis ĉiam tiel; li havis ankaŭ belajn tagojn. Tiam li estis kvazaŭ renaskiĝinta: li enspiris profunde la freŝan aeron de Zagorje, la naztruoj al li larĝiĝis, la brusto pleniĝis, kaj kun intereso li ĉirkaŭrigardis la ĉarmegan naturon kaj tiam vidiĝis rideto sur liaj maldikaj lipoj.

## II.

Estis iu sabato de monato decembro kaj malfrue posttagmeze. Jam antaŭ dek kvar tagoj multe neĝis kaj la neĝo restis, kaj la vetero tre malvarmiĝis. La firmamento estis mirinde serena, kaj la suno ankoraŭ ĉe la horizonto, kaj ĝiaj oraj radioj rebrilis sur la neĝa blankaĵo.

Djuro Martič estis en sia ĉambro, kaj kantetis ion. Estas jam la tria tago, ke lin ne forlasas bonhumoro. Jaŭdon li estis invitita al tagmanĝo al najbara bienposedanto; la societo lin serenigis kaj ĝin poste li eĉ amuzis. Sed komence li estis malserena. Ĉiuj estis diketaj, nur li malgrasa, flava. Ĝis nun pri tio li ne pensis, sed tie unuafoje montriĝis al li pli videble lia propra persono. Kaj liaj okuloj senĉese ekrigardis siajn maldikajn piedojn kaj malgrasajn manojn, sur kiuj vidiĝis ĉiu vejneto, kaj tiam li ŝtelrigardis ankaŭ siajn najbarojn: kaj kiajn plenajn manojn kaj fortajn femurojn ili havis!

Li malsereniĝis.

Sed kiam li aŭdis la sinjorojn paroli kun granda intereso pri manĝaĵoj, kiam li aŭdis esprimojn: pikante, freŝe, dia odoro, — komencis lin forlasi la malbonhumoro. Jen „pikante, freŝe, odoro“ — jen estas tio, jen... kaj pri tio li antaŭe eĉ ne pensis; nu, kaj lia Daŝa tiel eĉ ne scias.

La societo, kaj tiu „pikante, freŝe, odoro“ rapide lin bunhumorigis, kaj rideto komencis naskiĝi sur lia vizaĝo.

Kontraŭ li sidis juna instruistino el najbara vilaĝo. Ili ofte sin ekrigardis, kaj li sentis, kiel io lin vigligas. Post la tagmanĝo ili parolis longe, longe. Ŝi diris, ke je la sekvanta dimanĉo ŝi venos kun sia amikino al meso en lian vilaĝon. Tio al li estis agrabla, kaj verŝajne tio estis ankaŭ ties kaŭzo, ke lin de post jaŭdo ne forlasis la bonhumoro.

Ŝi do alvenis! Ili instigis, ke li morgaŭ eminentu en la preĝejo. Li ekserĉis notojn kaj sidiĝis ĉe la malnova fortepiano. Ankoraŭ li vidis siajn maldikajn piedojn, malgrasajn manojn, sed jam ĉe la unuaj akordoj li komencis forgesi sin kaj la morgaŭan tagon, kaj kiam li komencis ludi la D-duran fantazion de Volkmar, li tute perdiĝis; jam ce la unuaj akordoj li komencis forgesi sin kaj la morgaŭan tagon, kaj kiam li komencis ludi

la D-duran fantazion de Volkmar, li tute perdiĝis; la grandioza fino, kvankam li ne nun aŭdis ĝin unuafoje, lin tute konfuzis. Ankoraŭ du, tri fojojn li ripetis la samon, kaj tiam li ekrigardis fikse ien malproksimen, malproksimen.

Antaŭ li malaperis eĉ la pintaj genuoj kaj malgrasaj manoj, la ĉambro kaj tiuj montetoj ekstere; li estis en la universa malpleno, en kiu ankoraŭ longe, longe resonis la lasta akordo, malproksimiĝante pli kaj pli, ĝis fine, ie malproksime, malproksime, ĝi malaperis.

En lia animo estiĝis malica, senkonsola malpleno. Do ĉu por ĉiam ĝi malaperis? ne estas eble; li aŭdis, sentis, kiel ĝi forflugis ien malproksimen, malproksimen, ĝi tie devas ankoraŭ esti, tie...

Li rekonsciigis.

Ree li ekvidis siajn malgrasajn manojn, maldikajn piedojn, kaj tra l' fenestro li ekvidis la sunon jam subirantan. Ĝi jam tuŝis la neĝan pinton de l' Kuna-monto.



Mediumdesegnaĵo

pli multe konfuzis kaj la D-duran fantazion de Volkmar, li tute perdiĝis; jam ce la unuaj akordoj li komencis forgesi sin kaj la morgaŭan tagon, kaj kiam li komencis ludi

Mediumdesegnaĵo



Li stariĝis kaj denove fikse ekrigardis.

Ah, ĝi estas nur vizio. La suno, jam de ok minutoj kaj duono, devas esti malantaŭ la horizonto; tiom ĝia lumo bezonas por veni al ni. De la norda stelo ĝis ni, la lumo bezonas tridek jarojn. Tridek, tridek, ah, jen, tridek jarojn bezonas ankaŭ la lumo de nia tero por veni al la norda stelo. Jen, jen, laŭ tio ĉi sur la norda stelo post tridek jaroj vidiĝus la hodiaŭa tago.

La hodiaŭa tago do nenien malaperis, pereis, ah, post tridek jaroj ĝi vidiĝos sur la norda stelo, post kvin miloj da jaroj en la laktovojo; pli malproksimen, pli kaj pli en la universon, pli kaj pli malproksimen sen fino, falos hela bildo de la tero de l' hodiaŭa tago.

Oh, Dio, Dio, nenio malaperas, pereas; ĉio, ĉio estas eterna. Ah, kial min ja tiom doloras la kapo... Kiam mi mortos, eble mia animo, kiel la pensoj, flugos de stelo al stelo! Ah rave, ĝi sciiĝos pri pasinto de ĉiuj epokoj; ĉio, ĉio ĉi estas notita en la universo, nenio pereis; la hela bildo de ĉiu momento de l' ekzistado estas signita en la universo...

— Sinjoro, jen la lumigilo! — diris Daŝa.

— Bone, bone!

— Kaj kion vi vespermanĝos?

— Nenion, nenion, lasu min!

### III.

Djuro Martiĉ ree sidiĝis sur seĝo antaŭ la malnovan fortepianon. Per la kubutoj li sin apogis sur la genuoj, kaj la kapon mallevis kaj apogis sur la manoj. Liaj okuloj estis fermitaj, la spirado mallongiĝis. — Unu ĉarma tago kaj ĝi estas ie en la universo.

Sur la tero kuŝas la ora brilo de l' suno. Verda faga arbareto tie kontraŭe estas tiel belega; kaj plaĉa valetto, kiun trafluas rivereto, estas tiel ĉarma, ĉarma. Li revenis el la lernejo, sola li estas en la ĉambro, ĉiuj estas ie ekstere, ili laboras. En la ĉambron falas la brila lumo de l' suno tra malgrandaj fenestroj. En ombro, en angulo pendas krucifikso. Nedireble facile estis al li en la koro. La suna brilo kaj verda arbareto kaj plaĉa valetto, ĉio estis nepriskribeble ĉarmega; li ne scias kial, sed estis ia sento de ĉasteco.

Kaj iam estis multaj tiaj tagoj, ĝis kiam iun aŭtunan matenon lia patro lin forveturigis al Zagreb, por ke li fariĝu sinjoro; al li estos bone poste.

Kaj en Zagreb la suno brilis, sed sen ĉarmo; alie ĝi brilas sur la naskobuloj.

Malrapide pasadis la tagoj, pasis ankaŭ jaroj. Kaj iun printempan tagon li sidis en malvasta ĉambreto supre, subtegmente, en X strato. La kubutojn li mallevigis sur la tablon, kaj per la manoj li apogis la frunton, kaj li estis kvazaŭ sen pensoj, kvazaŭ sen sento.

Kaj en Zagreb la suno brilis, sed sen ĉarmo; alie ĝi brilas sur la naskobuloj.

Malrapide pasadis la tagoj, pasis ankaŭ jaroj. Kaj iun printempan tagon li sidis en malvasta ĉambreto supre, subtegmente, en X strato. La kubutojn li mallevigis sur la tablon, kaj per la manoj li apogis la frunton, kaj li estis kvazaŭ sen pensoj, kvazaŭ sen sento.

Malrapide la pordo malfermiĝis, kaj en ĝi aperis la filino de la mastro. Ŝi ekstremis kaj volis reiri, sed ŝi ne povis. Malkuraĝe, hezitante ŝi eniris.

Li ne levis la kapon, sed ĉion li aŭdis kaj sentis, ŝiajn facilajn paŝojn, susuron de vestoj, kaj eĉ spiradon. Ŝi tremis, kliniĝis kaj genufleksis.

— Pardonu, mi estas ĉi tie, pardonu, mi ne povas plu...

Al li post tio ekfluis la larmoj kaj li laŭte eksingultis, genufleksis apud ŝi, karesis ŝiajn brakojn, vizaĝon, frunton, harojn; ŝi viŝis al li la larmojn, kaj al ŝi mem ili gutis de la vizaĝo. Kaj la Zagreba suno longe brilis ĉarme kaj milde.

— Ah, kial vi de mi kuras, kial vi rifuĝas de mi?

Li silentis.

Ŝi stariĝis.

— Ne faru tion, ne, — vekriis ŝi malespere. —

Ĉion vi prenis de mi, ĉion, ĉion, ĉion...

Kaj ree li ne havis vortojn por ŝin konsoli.

— Ah, mi komprenas. Mi estas al vi abomena, nemorala, malbonigita. Ah, mi scias, sed vi vidos. Vi vidos...

Ŝi rapide malproksimiĝis, li ekiris post ŝi, li volis ŝin revenigi, sed ŝi jam malaperis.

Li prenis ĉapelon kaj foriris, kaj nur vespere li revenis.

La pordo de ŝia ĉambro estis malfermita, homoj eniradis kaj eliradis. Okazis malfeliĉo.

Li eniris senkonscie.

Antaŭ li ŝi kuŝis mortinta, ŝprucita de sango...

Li ekstremis kaj stariĝis de la malnova fortepiano.

— Oh, Dio, Dio, ankaŭ tiu tago estas en la universo, ankaŭ kun ĝi mi renkontiĝos supre.

Kaj ŝia vesto estis sur la brusto malfermita (post la pafado oni alkuris kaj serĉis vundon), vidiĝis la nuda brusto, en la kavo inter la mamoj estas nigra vundo, ĉio ŝprucita de sango. Ŝiaj nigraj okuloj estas malfermitaj kaj rigardas lin vitre...

En la turo de l' vilaĝa preĝejo batis la dekdua horo; li ĝin ne aŭdis.

Lin priverŝis ŝvito.

— Oh, Dio, Dio, ankaŭ tio estas notita en la universo. Ĉu tion mi denove devos rigardi?

Jes, rigardi en la eterno! La kulpuloj, kulpuloj vidos tie nenion; ili rigardos nur sian malbonfaraĵon, sian viktimon dum la tuta tempo...

Lin komencis skui malvarmo. Vestita li ĵetis sin sur la liton senkonscie.

Li denove ekvidis la malfermitajn nigrajn okulojn, mortintan palan haŭton, ŝprucitan de sango... Li fikserigardis kaj fikserigardis, kaj tiu bildo plu ne moviĝis for de li. Kaj li kvazaŭ pereis de la supraĵo de l' tero — nenie iu, nenie io... nur ŝi, mortinta, kuŝas antaŭ li, ŝi, ŝprucita de sango. Li fikserigardas ŝiajn mortintajn, vitrajn okulojn kaj tiel dronas en la universo...

### IV.

La postan tagon vere alvenis la juna instruistino.

Ŝi jam multe aŭdis pri tiu instruisto, kiu vivas sola kun sia servisto, kaj neniam estas gaja, kaj neniam aŭ tro malmulte parolas.

Kiam ŝi tiam, jaŭde, unufoje lin vidis, ŝin kaptis ia eksterordinara sento. Al ŝi estis iel agrable, kiam

La postan tagon vere alvenis la juna instruistino.

Ŝi jam multe aŭdis pri tiu instruisto, kiu vivas sola kun sia servisto, kaj neniam estas gaja, kaj neniam aŭ tro malmulte parolas.

Kiam ŝi tiam, jaŭde, unufoje lin vidis, ŝin kaptis ia eksterordinara sento. Al ŝi estis iel agrable, kiam ŝi ekpensis, kiel ŝi lin karesus kaj sereniĝus per ĉarma interparolo. Kaj kiel ŝi estis feliĉa, kiam ŝi vidis, ke li jam la unuan tagon tiom sereniĝis apud ŝi.

Hodiaŭ io intensa ŝin pelis al Druŝkovac kaj ŝi iel antaŭsentis: okazos io.

Ŝi tuj ekiris en la preĝejon.

La orgeno ekmuzikis, sed jam dum la unuaj akordoj ŝin kaptis malĝojo kaj ia timo. La muziko estis stranga, eksterordinara, kaj kiam li supre kun la orgeno ekkantis, en la preĝejo estiĝis konfuzo, moviĝado. Ŝi afliktiĝis kaj larmoj de kompatato ekfluis el ŝiaj okuloj.

Estis advento, kaj la instruisto kantis la paskan kanton: Haleluja.

# ARTO KAJ ARTISTOJ

PAULO VARSÁNYI: PRI LA ARTO DE SPIRITOJ.



En ĉi tiu numero ni prezentas al niaj legantoj desegnaĵojn de spiritista mediumo. Oni povus demandi, ĉu ili rajte estas komentariitaj inter la kadroj de nia arta rubriko, ĉu ilia deveno havas ion komunan al la internaj principoj de la arta kreado? Ĉi tiujn demandojn ni provas respondi sube, akcentante ke ni ne intencas elĉerpi — kiel oni eble opinius laŭ la supra titolo — la transcendan flankon de ĉi tiu arta sfero.

\*

Rigardante la bildojn oni tuj povas rimarki ke ili kreigiĝis en eksterordinara stato de l' menso. En ili oni povas vidi specialajn signojn, kiuj neniam estas retroveblaj en aliaj, kutimaj kreaĵoj. Mankas el ili la formoj de la efektiva vivo; ili do estas abstraktaĵoj, ekster la spertebla bildo de l'mondo. Laŭ supraĵa konsidero ni povus ilin rigardi produktaĵoj de ornama arta, kiu estas komplekso de ĉefe abstraktaj elementoj; ni povus opinii, ke ili estas kelkaj tre rafinitaj pecoj de ĉi tiu arta sfero, montrantaj elementojn parencajn al la supermodernaj artaj rezultoj. Sed ĉu ni estus pravaj? Ĉu ili estas sole dekorativaj fantaziaĵoj kiuj montras ekskluzive ornamajn tendencojn? Eble iajn ekstremajn konsekvencojn de la principo *l'art pour l'art*?

Ne. Ĉi tiuj folioj montras certan sistemecon, kiu atentigas nin pri fontoj pli profundaj de la krea procedo. Antaŭ ĉio, ili ne estas sole dekorativaj paperplenigaĵoj. Sola ekrigardo konvinkas nin, ke ili ne estas rezultoj de spekulativa kre-metodo, kiel la dekorativaj artaĵoj, sed tujaj manifestiĝoj de la kreanta intelekto. Tion atestas la admirinde svinghava liniokonduko, kiu montras nenian interrompiĝon, kaj per kiu la interna imago esprimiĝas kun truda subiteco, kvazaŭ dum milono da minuto. Konsiderante do la egan rapidecon de la krea procedo, krome la tre karakterizan prezentmanieron, la akompanajn elementojn, kiuj senĉese ripetigiĝas en ĉiuj bildoj, ni rekonos en ili senperajn elspegulaĵojn de konstanta komplekso, kiun — volante nin esprimi abstrakte — ni povus nomi „komplekso de spiritaĵ substancoj.“ Ĉi tiu psika kunmetaĵo donas al ili individuajn trajtojn. Ne mirige: ilin ja faris la sama mano. Ĉu tiu de la mediumo, aŭ tiu de la spirito perita de ŝi — por ni estas indiferece.

Kiel ni vidis, ĉi tiuj sovaĝe kuriozaj fantaziaĵoj de abstrakta menso portas en si leĝojn de anima laborejo, komplekso de spiritaĵ substancoj.“ Ĉi tiu psika kunmetaĵo donas al ili individuajn trajtojn. Ne mirige: ilin ja faris la sama mano. Ĉu tiu de la mediumo, aŭ tiu de la spirito perita de ŝi — por ni estas indiferece.

Kiel ni vidis, ĉi tiuj sovaĝe kuriozaj fantaziaĵoj de abstrakta menso portas en si leĝojn de anima laborejo, kiuj kunligas ilin, dependaĵojn de la sama interna mondo. Ili ripetigiĝas montras al ni, trans la dekorativaj tendencoj, pli intensan interrilaton de la artisto kaj artaĵo: la sinserĉon de la krea spirito — do klopodojn al konstantaj kaj definitivaj formoj, en kiuj tiu spirito povas sin plene esprimi.

La artisto, la artaĵoj de la mediumo, do volas diri al ni ion: tion, kion ili ripetis. Kaj tio estas grava, kion ili ripetis. Tio estas ja ilia senco. Nun ni alvenis al la esploro de ilia celo. Sed kian celon ili havas? Pri ilia estetika valoro ne povas esti dubo. Kio estas do interne de la estetika tendenco?

\*

Kant diras ie, ke ni konstruas la mondon el la formoj de nia menso. La imago de l'mondo do estas en ni antaŭe kaj ĉerpiĝas laŭ la formoj de nia

mojn, nur tiujn, kiujn ni enhavas. Ekster ili por ni ekzistas nenio krom misteraĵoj. La animo baraktas antaŭ la granda sekreto: kio estas do trans la mondo konstruita el la formoj de nia menso? Sed nia homa intelekto estas malforta kaj ne povas doni respondon. Pri tiu mondo ni do faras mistikan koncepton por plenigi la grandegan malplenan nin terurantan.

La sama vero validas ankaŭ pri la arta, kiu finrezulte egalas je la formoj de la kreanta spirito, aŭ — kio estas la sama — je la artisto. Kaj ĉi tiuj bildoj estas solveblaj nur ĉi maniere: la linio kiel linio estas kunligebla al la formoj de nia menso, sed la liniokomplekso de la mediumdesegnaĵoj jam montras nepercepteblan mondon, al kiuj ni tamen donas senco por trankviligi la neplenigitan animon. Ni neniam povas ricevi la veran respondon, la absolutan, ĉar ŝlosilon ni havas nur al nia propra animo. El nia animo, el nia propra mondo do ni prenas laŭeble respondon por trankviligi nin. Kaj — ĉi tio koncernas ĉian meditado ankaŭ pri alispecaj artaĵoj — ni renkontas nur nin mem, ĉar la formoj de nia menso regas super ĉio.

\*

Kiamaniere doni do respondon pri ilia celo? Ĉiuj artaĵoj ja havas ilian celon en la efiko kiu impresas nin: min, vin aŭ lin. Do, volante difini ilian celon, mi certe venos al rezulto, kiu dependas de la formoj de nur mia menso.

Min precipe impresas la dua bildo. Ĝi inspiras kosmajn sentojn. Ni rigardas kvazaŭ en la misteran haoson de l'Kreo, en kiu ĵus naskiĝas la Mondo. Gigantaj fortoj unuiĝas kun teruregaj tondroj kaj fulmoj en la lumo de ĉiel-atingaj flamolangoj. Kaj inter ĉi tiuj sovaĝaj atakoj de l'elementoj ekiras la ĝermado de l'vivo. Ĉio ribelas, ondas, svarmas en kapturna rondflugo, kvazaŭ la ĵus ekĝerminta vivo volus ĝojegi pri la libereco kaj multoblighi sin mem.

Sed ĉi tiu difino pri la celo de la bildo devenas el la impresoj, kiuj ĝi faris al mi, ĝi do devenas same el mia animo, kiel el la bildo mem. Certe, en aliuloj ĝi vekas aliajn impresojn. Ekzemple: ĉu ĝi ne povus esti komplekso de ĉiuj imagoj, kiujn vekas en ni la vorto Revolucio? Certe. Finrezulte: ĝi donas al ni movimpresojn — jen en kio ni ĉiuj povos konsenti. Komprenible, ĉi tiu impresoj transformiĝas en tutajn, el mia animo, kiel el la bildo mem. Certe, en aliuloj ĝi vekas aliajn impresojn. Ekzemple: ĉu ĝi ne povus esti komplekso de ĉiuj imagoj, kiujn vekas en ni la vorto Revolucio? Certe. Finrezulte: ĝi donas al ni movimpresojn — jen en kio ni ĉiuj povos konsenti. Komprenible, ĉi tiu impresoj transformiĝas en tutajn, kaj ĉe diversaj homoj diversajn, seriojn de imagoj, kiuj poste sugestias al ni ian temon. Ĉi tie estas la punkto, kiu montras ion komunan inter la mediumdesegnaĵoj kaj la supermodernaj art-direktoj (ekspresionismo, futurismo.)

\*

Ni preskaŭ elĉerpis la temon. Restas nur kelkaj demandoj, la transcendaĵ, pri kiuj ni ne sentas nin kompententaj. Por ĉi-rilata valora pritrakto ni volonte donus lokon en iu sekvanta numero.



# LA COLOSSEUM KAJ LA SANKTA PETRO EN ROMO

L A M A R T I N E

... Traserĉante en mia memoro ĉiujn impresojn miajn pri Romo, mi trovas nur du el ili kiuj forviŝas, aŭ almenaŭ superregas ĉiun alian: la Colosseum, ĉi verkon de l' Roma popolo; la Sanktan Petron, ĉi ĉefverkon de l' Katolikismo.

La Colosseum estas giganta postsigno de superhoma popolo, stariginta, por sia fierego kaj siaj kruelegaj plezuroj, monumentojn kapablajn enteni tutan nacion; ĝi estas monumento rivalanta, per sia amaso kaj sia daŭro, la verkojn de l' Naturo mem. La Tevero estos jam elsekiĝinta tra siaj ŝlimaj bordoj kaj la Colosseum ankoraŭ elstaros!

La Sankta Petro estas verko de unu penso, de unu religio, de l' tuta Homaro je unu epoko de l' mondo. Ĝi ne estas plu konstruaĵo destinita por enteno de humilega popolo; ĝi estas templo destinita por enteni tutan filozofion, ĉiujn preĝojn, la tutan grandecon, la tutan penson de l' Homo.

Ŝajnas ke la muroj suprenleviĝas kaj grandiĝas ne plu laŭ la proporcio de l' popolo, sed laŭ tiu de Dio. Nur Miĥael-Angelo komprenis la Katolikismon kaj donis pri ĝi, per la Sankta Petro, sian plej kompletan esprimon. La Sankta Petro estas vere la perŝtona apoteozo, la monumenta alifiguriĝo de la religio de Kristo.

La arĥitektoj de la gotikaj katedraloj estis altegaj barbaroj. Sole Miĥael-Angelo estis filozofo en sia koncepto. La Sankta Petro estas la filozofia Kristanismo, de kie la dia arĥitekto forpelas la Mallumon, en kiun li enigis la Spacon, la Belon, la Simetron, la Lumon en ne elĉerpeblaj ondoj.

La senkompara beleco de la Sankta Petro en

Romo konsistas en tio: ke ĝi estas Templo, laŭ ŝajno, destinita por vesti la ideon de Dio per sia tuta brileco.

La Kristanismo povus pereji kaj la Sankta Petro restus ankoraŭ universala, eterna, racia Templo de ia ajn religio kiu postvenus la kulton de Kristo, kondiĉe ke ĉi religio estu inda de l' Homaro kaj de Dio. Ĝi estas la Templo plej abstrakta kiun iam, la homa genio, inspirita de l' dia ideo, konstruis ĉi sube! Enirante ĝin oni ne scias ĉu oni eniras antikvan aŭ modernan templon: neniu detalo ĝenas la okulon, neniu simbolo distras la penson: homoj de ĉiu kulto tien eniras samrespekte. Oni sentas ke ĝi estas templo kiu povas enteni nur la ideon de Dio, ke neniu alia ideo povus ĝin pleni. Ŝanĝu la pastron, formetu l' altaron, elprenu la pentraĵojn, forportu la statuojn, nenio ŝanĝiĝos, ĝi estos ĉiam la domo de Dio! Pli ĝuste: la Sankta Petro estas per si mem granda simbolo de ĉi eterna Kristanismo, kiu posedante ĝerme, en sia moralo kaj sankteco, la sinsekvajn disvolviĝojn de l' religia penso de ĉiuj jarcentoj kaj de ĉiuj homoj, malfermiĝas al la racio tiamezure kiel Dio ĝin heliĝas, rilatiĝas kun Dio en la lumo, klariĝas, plilargiĝas kaj suprenleviĝas laŭproporcio de l' homa spirito senĉese grandiĝante kaj kiu, kunforĝante ĉiujn popolojn en la unuecon de l' adoro, el ĉiuj diaj formoj faras unu solan Dion, el ĉiuj kredoj solan kulton, el ĉiuj popoloj solan homaron!

Miĥael-Angelo estas la Moseo de l' monumenta Katolikismo, kia oni iam ĝin komprenos. Li faris la nepereigeblan arkeon de l' estontaj tempoj, la Panttheon'on de l' diŝita racio.

El la franca: Teo H. Rok'.

## MONDLITERATURA OBSERVO

### GRAZIA DELEDDA.

**V**ladislav Reymont ricevis ĉi jare la Nobel-premion, sed la Stockholma Akademio komence intencis premi la italan verkistinon *Grazia Deledda*, kies populareco ja ne atingas tiun de D' Annunzio kaj kies romanoj ja ne havas tiom legantojn, kiom la romanoj de Guido Da Verona, sed kiu nun, en sia kvindeka jaro tamen pleje proksimas al Fogazzaro kaj Verga: la du grandaj klasikuloj de la itala romano.

**V**ladislav Reymont ricevis ĉi jare la Nobel-premion, sed la Stockholma Akademio komence intencis premi la italan verkistinon *Grazia Deledda*, kies populareco ja ne atingas tiun de D' Annunzio kaj kies romanoj ja ne havas tiom legantojn, kiom la romanoj de Guido Da Verona, sed kiu nun, en sia kvindeka jaro tamen pleje proksimas al Fogazzaro kaj Verga: la du grandaj klasikuloj de la itala romano. Per Sardiniaj popolromanoj komencis *Grazia Deledda* sian konstante leviĝantan karieron, poste senĉese ŝi pli kaj pli riĉiĝis je forto kaj profundo, ĉiam pli kaj pli ŝi trovis la manieron: desegni homojn kaj animojn; kaj la vojon tien, kie antaŭ la verkisto malfermiĝas la misteroj de la interna homo.

Sia nova, ĵus aperinta romano, *Danco por la koliero*, ne estas tro komplika, ne enhavas kuraĝajn fantaziaĵojn, sed ĝuste en sia simpleco ĝi estas interesa, ĉar homa kaj vera.

En la plej nova parto de antaŭurbo de sennoma urbo vivas du virinoj: onklino kaj kuzino. Ili havas la saman nomon: *Maria Baldi*. Iun tagon, sur la pordo de ilia vilao frapas fremdulo, grafo Giovanni Delys, kun la preteksto, ke li interesiĝas pri la najbara bieno, kiu laŭdire estas la posedaĵo de fraŭlino Baldi kaj vendota. Sed, fakte, li serĉas la riĉan Maria Baldi, per kies riĉa mano li esperas reakiri siajn antaŭajn ĝojojn kaj socian pozicion, rekonstrui sian ruiniĝintan vivon. Lin akceptas la kuzino, juna kaj tre bela, kaj laŭ ŝiaj respondoj la grafo kredas ke li parolas kun la riĉa sinjorino. Ĉi tio tre ĝojigas lin, ĉar kion deziri pli ol riĉan knabinon, kaj eĉ belan. Sed ĝojas ankaŭ Maria

*scias vivi*... Ĉe la ŝojto de la vilao ili, je l' unua renkonto, jam longe interbabilas kaj kvankam ili ne diras amajn vortojn, jam sub ĉiu ilia vorto kaj frazo sin kaŝas amo. Ili jam malfermis sian animon por enfermi unu la alian, kaj Maria Baldi multe, multe parolas pri si.

Ŝin, filinon de orkestrestro, la riĉa patro antaŭ sia morto konfidis al la zorgoj de ŝia onklino (Maria Baldi pli maljuna). Samtempe li transdonis ankaŭ altvaloran perlan, kolieron (kiu restis ĉe li garantiata), dirante ke, se la posedanto ne anoncos longe interbabilas kaj kvankam ili ne diras amajn vortojn, jam sub ĉiu ilia vorto kaj frazo sin kaŝas amo. Ili jam malfermis sian animon por enfermi unu la alian, kaj Maria Baldi multe, multe parolas pri si.

Ŝin, filinon de orkestrestro, la riĉa patro antaŭ sia morto konfidis al la zorgoj de ŝia onklino (Maria Baldi pli maljuna). Samtempe li transdonis ankaŭ altvaloran perlan, kolieron (kiu restis ĉe li garantiata), dirante ke, se la posedanto ne anoncos sin dum certa tempo, ĝi apartenu al lia filino. Ŝi do nun vivas ĉe la onklino, sed ili nek amas, nek malamas unu la alian, ili toleras sin, malvarme, kaj propre sole la koliero kuntenas ilin. Ne, ĉar eble ĉiu el ili volus ĝin havi por si, sed, ĉar la knabino scivolos, ĉu la onklino transdonos la trezoron, se ŝi foje bezonos ĝin, kaj la onklino scivolos ĉu la knabino postulos la trezoron antaŭ ol ekiri en la „alian vivon“?

Ĉi tion rakontas Maria Baldi al la grafo — sed Maria Baldi, en sia junaĝa facilanimo, kaj por fari sin interesa, nur mensogis tie, ĉe la vilapordego al la fremdulo, nur mensogis pro vanteo kaj mensogis — pro amo. Ŝi mensogis, ĉar ŝi timis ke la fremdulo ne multe atentus ŝin, ke li simple forlasos ŝin, se li ekscios ke la onklino estas riĉa, ke la historio de la koliero estas vera, sed ĝin heredis la alia Maria Baldi, kies patro estis riĉa entreprenisto, dum la ŝia — nur malriĉa muzikisto, malproksima parenco. Kaj, ke la alia Maria Baldi gardas en sia ŝranko la trezoron, kiu signifos feliĉon kaj riĉon por la ricevonto.

kaj la patrino de Giovanni devis ĝin deponi garantiaĵe, kiam la filo, pro siaj facilanime amasigitaj ŝuldoj, minacis per sinmortigo. La filo nur poste eksciis, ke ankaŭ la valoran klenodion englutis liaj ebriaj plezuroj kaj kapricaj pasioj. Nun, kiam li nenion havas plu, li decidis reakiri la kolieron, kiu signifos kaj alportos riĉon. Tial li intencis nepre ekkoni kaj nepre edzinigi Marian Baldi kaj tial li jubilis pri tio, ke la knabino estas ne nur riĉa, sed ankaŭ bela, nura sereno, viveco, bonhumoro.

Teksigas la belaj revoj. Sed — subite ili disŝirigas ĉiuj. Giovanni ekscias la veron: evidentigas ke la juna Maria Baldi mensogis, ke la trezoro apartenas al ŝia onklino. Giovanni Delys konsternigas, sed nur por momento: *la mensogo lin logas pli ol la realo*, li amas la mensogon de Maria, kiu mensogis por akiri lin. Li amas ŝin. Ĉi tiu amo estas en li pli forta ol ĉiu alia konsidero.

Sed ankaŭ la sorto de la alia Maria Baldi kroĉigas en la mensogojn de l' romano. Ankaŭ ŝi esperis, ke foje venos tiu, por kiu la koliero estas pli valora ol ĉio — kaj kiu prenos ankaŭ ŝin, ĉar alle ŝi ne donos la trezoron. Kaj ŝi sentis sin kvazaŭ unuiginta kun la koliero, ĉiujn aliajn revojn ŝi disŝiris, ne edzinigis, atendis la fremdujon. Kaj la fremdulo alvenis, sed — ne ŝin li elektas, sed la alian, la junan kaj belan. En ŝia dolora trompiĝo ŝi nun alkroĉigas al la riĉeco, kiun solan ŝi rigardas valora. Post la geedziĝo ŝi fermas la pordon antaŭ Maria kaj eĉ, akre ŝi kriacas, ke neniam ili esperu la ricevon de l' koliero aŭ de io ajn el ŝia riĉo.

Longan tempon vivas nun solece kaj riĉe la pli maljuna Maria Baldi. Sed kiam al la juna paro naskiĝis infano, ŝi ne povas rifuzi la inviton de Giovanni, vizitas ilin en la sol-ĉambra, malriĉa loĝejo. Tie, antaŭ la lulilo, ŝi eksentas ke la vivo havas ankaŭ aliajn belajn krom la riĉo kaj repaciĝinte ŝi metas la kolieron sur la kolon de la infano. Kaj kiam ŝi dolore vidas, ke la infano ne ridetas, ne kaptas la brilajn perlojn — ŝi rimarkas, ke la infano estas blinda, kaj neniam ĝi vidos la diamanton, nek la perlojn.

Nebula kaj dolora romano kun multe da malĝojo kaj amaro. Grazia Deledda volas montri la luktojn kaj dolorojn de l' vivo. Kaj ŝi volas montri la homon tia, kia li estas. Pri ŝiaj homoj oni neniam scias, kiam ili estas sinceraĵ kaj kiam ili mensogas. Kaj neniam oni scias, ĉu iun alian ili volas trompi, aŭ ili mem trompiĝas. La vivo estas kruda kaj la vivo estas senindulga kaj Grazia Deledda diras ke *la homoj multe pli volus esti bonaj kaj ŝajni bonaj, ol kiom ili kapablas esti bonaj kaj agi bone.* lc.

## ANTONIO BRUCKNER 1824—1896.

**L**a aŭtunon de l' pasinta jaro, la mondo muzika festis la centjaran datrevenon de l' naskiĝo de Bruckner. Ĉi tiu okazo instigas nun, revivigi antaŭ ni la silueton de l' artisto, kiu ne estas ankoraŭ laŭmerite konata. Li — ido de vilaĝanoj simplegaj — naskiĝis en Ansfeld (Aŭstrio). Lia juneco estis malgaja, eĉ mizera. Komence, li estis subinstruisto en eta vilaĝaĉo, perlaborinte sian panon per ludado de dancmuziko en la drinkejo malhela. La sorto lin ŝetadis tien kaj tien, sed nur la nomoj de la lokoj ŝanĝiĝis, la kerno restis la sama: mizero, soleco ekstere, haoso de sentoj kaj kredo forta interne. Dume: konstanta, persistema laboro, studado de la muzikteorio kaj de l' malnovaj majstroj. (Bach, Beethoven). La ludadon de orgeno li eklernis parte kiel aŭtodidakto.

En 1855 li transloĝiĝas al Linz, kie li trovis postenenon organcmuziko en ia drinkejo manĉa. La sorto lin ĵetadis tien kaj tien, sed nur la nomoj de la lokoj ŝanĝiĝis, la kerno restis la sama: mizero, soleco ekstere, haoso de sentoj kaj kredo forta interne. Dume: konstanta, persistema laboro, studado de la muzikteorio kaj de l' malnovaj majstroj. (Bach, Beethoven). La ludadon de orgeno li eklernis parte kiel aŭtodidakto.

En 1855 li transloĝiĝas al Linz, kie li trovis postenenon orgenistan. La nun sekvantaj jaroj estis gravegaj por lia evolucio. En la kulturita kaj muzikema urbo, lia genio eksvingis siajn flugilojn. La unuan fojon li aŭdas verkojn de Wagner, kies vira, fortimpresa arto ankaŭ lin ekkaptas kaj por li malfermas ĝis tiam nekonatan, fabelan mondon de sonoj.

La unuaj komponicioj pretiĝas, inter ili la unua simfonio. La rezultato: nekompreneble, sed tamen bonvola kritiko. Sed post lia transloĝiĝo en Vienon (1868) la batalo ĉirkaŭ li iĝas laŭta, poste kruda, fine malpura fiparolado. Li neniam partoprenis en ĝi.

Li — homo naiva, bonkora, simpla kaj pura, venanta el la silentaj urbetoj de provinco — nun troviĝis en la bruego de grandurbo, inter malnoblaj homoj intrigemaj, senreligiaj. Inter tiaj ĉirkonstancoj li iĝis ĉiam pli kaj pli soleca, fine izolita, sen amikoj, sen parencoj, sen edzino. Sola kun Dio kaj si mem. Kaj nun, en la senfina dezerto de l' vivo ekfloris en li mistera vivo, majesta kaj pura. Kvazaŭ roko altega li staris en la diluvo de malamo kaj indiferenteco, batalante nur kontraŭ la plej granda malamiko: la senesperigo. Tra la nigraj nebuloj de lia animo nur unu lumo brilis: lia senkondiĉa, superhoma kredo je Dio.

La lumo de l' paco, harmonio kaj amo.

La pinto de l' vivo estis atingita.

Li staris tie, altege, kie jam la bruoj de l' mondo ne aŭdiĝas. Li komponis sian lastan verkon, la IX-an simfonion. Estis lia adiaŭo de l' vivo, kion li nun verkis. Ankoraŭ unufoje li volis ĉirkaŭbraki la universon, kanti al la homaro la eternan melodion pri la homa sufero kaj feliĉo, pri la dia kaj homa boneco. La morto lin malhelpis fini la verkon; ĝi estas nun torso giganta. (Mankas al ĝi la finalo.) — Vere, pri Bruckner oni rajte povas diri, ke nur lia korpo mortis, ĉar lia animo tute kunfandiĝis kun liaj verkoj. Pri ĉi tiuj mi nun devus paroli. Tamen kiamaniere? Kiel oni povus karakterizi per vortoj — eĉ per la plej delikataj — la ecojn de la kreanta animo? Kiel oni ekkaptu la netuŝeblajn songojn senkorpajn, la suferojn kaj ĝojojn de la soleca artisto? Kiel priskribi en kelkaj mallongaj frazoj unuigon gigantan de dikredo, naturo kaj homa grandeco? Kiamaniere konigi la verkojn de la plej transcenda arto? Oni vere nur menciigi povas ilin.

La verkaro de Bruckner konsistas el tri partoj: el verkoj ekleziaj, simfonioj kaj malgrandaj verkoj diversaj.

La ekleziaj verkoj kun plena rajto okupas la unuan lokon, ĉar en ili montriĝas la fundamenta karaktero de la komponisto kaj la leĝo de lia arto. La fundamenta trajto estas: Dikredo. Kredo libera, forta kaj pura. Ĝi estis por Bruckner malproksima stelo en la mallumo, direktilo netrompebla en la haoso de l' suferoj.

La leĝo, aŭ per aliaj vortoj: la formo de liaj verkoj estas la svelta formo de l' katedraloj mezepokaj: la gotika arko, en kies altega pinto staras la kvinteseneco de ĉiu muziko: la adaĝo absoluta.

La vicon de la verkoj malfermis du mesoj, preparinte la vojon al la tria, la tiel nomata „Granda meso en F;“ ĝi estas la plej bela meso depost la „Meso solena“ de Beethoven. La teksto — kies vortojn li de l' petego de *Kyrie* ĝis la „*dona nobis pacem*“ trasantis, ĉar travivis — eligis belegan muzikon el lia koro. Tiam, la vico de l' simfonioj komenciĝis kaj nur post jardeko li turnis sin denove al Dio, plenkore, kun fieraj ĝojoj dankante ĉiujn absentitajn ĝojojn, dolorojn en du dankhimnoj: la „*Tedeum*“ kaj la 150-a psalmo. („Ĉiuj animoj laŭdu la Sinjoron!“)

La dua parto konsistas el la simfonioj. Krom la unuaj provoj juneaj li komponis naŭ. Inter ili ĉiu havas apartan vizaĝon, individuecon. La internan batalon de l' artisto respegulas la unua; la konflikto inter la „Mi“ kaj la mondo estas pentrita per pasioj Michelangelaj. La pacon, la harmonion li unue trovis en la naturo (IV-a simf.).

La unuan kulminacion de sia arto li atingis en la V-a simfonio, kies finalo estas instrumenta dankanto al la Ĉiopova.

Depost tiu ĉi tempo li ĉiam pli kaj pli malproksimiĝis de la Tero: la anima vivo venkis, superis la teran. La lasta okazaĵo tera, kiun li ankoraŭ rimarkis, estis la morto de la junaĝa idealo, Wagner, kies memoron per grandioza muziko funebra li honoris en sia VII-a. Ĉi tio estas samtempe la plej populara inter liaj verkoj, estante la plej facile komprenebla. La lasta simfonio — la nefinita — estas jam voĉo el la transa mondo, aro de kristalaj, eteraj sonoj. Ne estis hazardo, ke ĉi tiun li dediĉis — kun fieraj ĝojoj kaj humila danko — „al la kara Dio“.

El la diversaj verkoj mi mencias la kvinteton por arĉinstrumentoj: ĝi estas vera simfonieto! La aliaj estas ĥorkantaĵoj, parte religiaj, parte mondaj („*Helgoland*“, „*Germanenzug*“). Ĉiuj uaj verkoj, estante la plej facile kompreneblaj. La lasta simfonio — la nefinita — estas jam voĉo el la transa mondo, aro de kristalaj, eteraj sonoj. Ne estis hazardo, ke ĉi tiun li dediĉis — kun fieraj ĝojoj kaj humila danko — „al la kara Dio“.

El la diversaj verkoj mi mencias la kvinteton por arĉinstrumentoj: ĝi estas vera simfonieto! La aliaj estas ĥorkantaĵoj, parte religiaj, parte mondaj („*Helgoland*“, „*Germanenzug*“). Ĉiuj surhavas la signon de l' genio; ili estas fajreroj eligitaj de giganta fajro, kiu lumis en la animo de Bruckner.

Nun kelkajn vortojn ankoraŭ pri lia loko en la muzikhistorio. Lia arto estas bazita sur la du kolonoj: Bach kaj Beethoven. Ĝi estas parenco de la serena muzo kvieta de Schubert; komuna eco illa estas la adorado de l' naturo, de la gepatra tero aŭstria kaj la plena okupiĝo pri la dancmuziko de l' vilaĝanoj.

Sendube, Bruckner estis la plej forta talento simfonia de post Beethoven; pro ĉi tio oni kelkfoje ilin komparas. Inter ili estas tamen fundamenta diferenco: Bruckner neniam dubas esti vera filo de Dio, en li ne troviĝas la titana volo de Beethoven, per volo kaj amo akiri la kredon en li. Por tiel diri: Beethoven estas liberpensulo, Bruckner — vera mistikulo, ido malfrua de Angelus Silezus. Kaj pro ĉi tio lia arto ne imitas aŭ daŭrigas la verkadon de Beethoven, sed ĝin kompletigas. Ĝi estas la plej granda monumento de la senkonscia, mezepoka dikredo mistika, kiu en ĝi — per stranga ludo de l' hazardo — nur tre malfrue ricevis sian eternan esprimon muzikan. Bruckner montris la alian flankon de la ĵanus-vizaĝo de la homa animo: la senkondiĉa, superhoma kredo je Dio.

# LET ER KE ST O

(Alsenditajn manuskriptojn ni ne redonas.)

J. B. Kara Samideano. Unue ni dankas vian interesigon pri nia revuo. Certe, kritiko, eĉ mallaŭda, estas por ni pli valora, ol indiferenteco.

Ni neniam diris, ke ni estas kontentaj pri la revuo. Eĉ, multfoje kaj insiste ni asertis la malon. En la nuna ĉagrena formo ĝi servas nur por la konservo de l' kontinueco, ni emfaze protestas ke oni ĝin rigardu atingita, plenumita celo. La abonantoj kreskis en la lasta tempo tiagrade, ke la revuo en la nuna formo kun 50 pliaj abonantoj ne havos plu deficiton. Sed se ni ne esperas la eblon de 24-kaj poste 32-paĝa revuo, eĉ unu strekon ni ne farus plu.

Ĉar la nuna amplekso estas ankoraŭ pli malagrabia por la redaktanto, ol por la legantoj. Kредu ke ne estas facile trovi valorajn literaturajn tiel mallongajn, kiajn publiki devigas nin la nuna stato.

Sed speciale pri la du kondamnitaj noveloj mi havas malan opinion, ili al mi ŝajnas „salaj“. Precipe en ilia stilo mi trovas kvalitojn, kiujn meritis ke la noveloj estu publikitaj. Kaj — ĉar eble mi ne havas ian tute kuriozan guston — mi opiniis ke eble ankaŭ aliaj legantoj trovos en ili ion interesan. Rilate al vi, mi eraris. Eble ankaŭ rilate al kelkaj aliaj. Sed ankaŭ vi eraris pri la „Revolvero“, rilate al mi kaj certe ankaŭ al multaj aliaj. Erari estas home.

Mi tralegis mian artikolon pri la neologismoj (1925. I. Letterkesto), sed mi ne trovas la lokon, „kie per unu piedo mi for-lasas la Fundamenton.“ Mi diras ke la ekzistantan lingvomaterialon mi rigardas definitiva, ĝian ŝanĝon sencela kaj danĝera. Sed ĉi tiun materialon mi diras ne tute sufiĉa, koncerne nuancojn kaj koncerne mallongecon kaj koncizecon. Tial mi ne kondamnas la uzon de certaj novaj vortoj en la poezio, akcentante, ke la ordinara lingvo ne bezonas tiajn vortojn, por ĝi do sufiĉas, eĉ troas, la nunaj oficialaj vortoj.

Mi aludis pri la neologismoj de Zamenhof. Ĉi tion vi diras ridinda, ĉar „antaŭ li estis la nenio“. Nu, jen Zamenhofaj — ne Fundamentaj — vortoj: *abismo, abrupta, aflikti, stulta, fato, ferio, festono, fiasko, giganto, humana, kabano, kalva, kanono, karambolo, angoro, auroro, sino*. Oni same tiel bone povas ilin esprimi per: profundegaĵo, malglatega, malĝojigi, malsprita, neevitebla sorto, libertempo, florpaktaĵo, malsukceso, grandegulo, homeca, domaĉo, senhara, pafiligo, kunpuŝigo, korpremiteco, tagiĝo, korpanaŭdo, kiel la vortojn *stumbli, langoro, nupto, pruda, svelta*, per: falpuŝigi, animmalstreĉiĝo, geiĝo, ĉastafekta, gracialia. Ankaŭ la pli suprajn vortojn, kiujn vi nun uzas senskrupule, ne naskis absoluta manko de alia esprimmaniero, sed sole tiu malbenita „kolorvaloro“ kaj „esprimkapablo“. Kaj ĝuste la Zamenhofaj *amara, aflikti, stulta* kaj la Grabovskiaj *aperti, disipi, ekskuzi, humida* konjektigis al mi la tendencon por la malpliigo de la mal-vortoj.

Pri *fora* mi ne diris ke ĝi estas ideala vorto, sed ke ĝi estas uzata, (en manko de mallonga vorto pli bona). Cetere oni tute bone povas diri: „La patro estas for, sed ne tre fore.“ — Vi ŝercas pri „malsovaĝa vespero“. Nu, se vi volas esti pure Fundamenta, tamen tiel vi devas paroli, ĉar *milda* troviĝas nur en la dua oficiala aldono. Kaj al mi estas same stranga „mal-mola koro“. Prefere mi diras „kruda koro“, se mi ne povas diri „dura“. Pri „prohibi“ mi dankas.

Jen viaj vervaj vortoj pri la „poezia fakvortaro“: „Do estontaj esperantistoj devos lerni: a) vortaron por la ĉiutaga uzo; b) por la poezio (por kompreni la eterajn pensojn de „mondforaj“ poetoj kaj c) plej-malplie teknikan. Vivu la simpleco! — Esprimoj uzablaj nur en poezio ne posedas viv-raĵon en nia lingvo. Ili estas balasto forjetinda. Esperanto estas same taŭga por poezio kaj prozo sen tiuj aristokrataj vortoj, kiuj, plenblovitaj de ridiga fiereco, ne volas sin miksi inter la ĉiutagajn kunulojn. Poemo ne fariĝas poemo pro iaj vortoj elprenitaj el poezia fakvortaro, sed pro la enaj profundaj pensoj. Ju pli senpretenda (kio ne signifas senarta) la lingvaĵo, des pli efika la enhavo. Komparu la Zamenhofajn! Poetoj al kiuj la nuancoj de Esp. ne sufiĉas, kiuj inter cent nepre bezonas la centunuan, serĉu naci-lingvon por ili pli taŭgan. Nia afero povas facile rezigni la de ili alportatan „kolorvaloron“, la „esprimkapablecon“ „divinan“!“

Do, mi respondas. Eĉ la plej profunda penso ne estas poezio, eĉ la plej malprofunda povas esti poezia. Ĉio dependas de la maniero, per kiu ili estas esprimitaj. Certe ankaŭ la plej „poezifakaj“ vortoj ne faras poezion. Ja ne pro tio, nek pro ilia aristokrateco oni bezonas ilin, sed, ĉar ilia ekvivalento ekzistas en la plejmulto de la naciaj lingvoj, kaj ne estas bona tradukanto, kiu evitas ilin, kaj per tio senfortigas la tekston. Oni povus ilin anstataŭigi per longaj vortkunmetoj, sed tio faras la

lingvaĵon peza, kaj rimarkigas ke oni legas en artefarita lingvo. Krome tio forturnas la atenton de la verko mem. Antaŭ longe mi legis tradukon: „Sherlock Holmes en la servo de la hispana trono“. La nomon de la tradukinto mi ne memoras. Ĉi tiu traduko estis plena de artifikaj — kaj tre spritaj — vortkunmetoj, en ĉiu frazo troviĝis unu aŭ du. Kun granda plezuro mi analizis ilin tra la tuta verko — kaj je la fino mi rimarkis, ke — mi apenŭ scias, pri kio en ĝi temis. La aŭtoro certe ne dankus eksciinte, ke lian verkon la tradukinto kvazaŭ kaŝis sub sia vortĵongla arto. Mi asertas ke dum lego pli ĝenas tia vortkunmeto, ol nekonata vorto, kies sencon oni divenas el la kunteksto.

Aliparte tiajn nuancvortojn tute ne bezonas tiu, kiu volas Esperante nur paroli, korespondi, skribi komercajn leterojn. Ju povas flue paroli la germanan lingvon kaj tamen ne kompreni multajn vortojn de Faŭst. Same estas pri la Shakespeare-verkoj, aŭ pri la Komedio de Dante. Ĉu do ĉiu, scianta Esp.-on sufiĉe por siaj privataj aferoj, komprenu ĉiujn vortojn de ilia traduko? Ho, tiu traduko estos nur ilia simpligita, senspiciĝita varianto.

Cetere ankaŭ la Akademio diferencigis inter la vortoj necesaj por la lingvo kaj la vortoj necesaj por ĉiu episto. La lastajn ĝi presigis per starantaj, la ceterajn per kurzivaj literoj en la lasta eldono de la Oficiala Vortaro. Tia konsekvenca diferencigo donus eblon por sendanĝera pliriĉiĝo kaj samtempe por la senbalastigo de la vulgara vorttrezoro.

Komprenoble ĉi tiu pliriĉiĝo devas esti bridita. Unua regulo: ĉiu ekzistanta oficiala radiko estas neŝanĝebla! Dua regulo: novajn vortojn enkonduku nur tiu, kiu funde konas Esperanton, scias lingvojn krom la sia, havas viglan lingvosenton kaj senton pri la gusto de Esperanto. Kaj tia enkonduko neniam okazu facilanime sed ĉiam post la konsulto de ĉiuj bonaj vortaroj, kaj, kun plena sento pri respondeco. Tiamaniere tre multaj intencitaj novaj vortoj pruviĝos superflujaj.

Sed tute malpermesi neologismon estas: malhelpi la evoluon riĉigon, taŭgigon de la poezia lingvo. La evoluo okazas ja nur per la verkistoj. Kaj eble ilia laboro rezultigas kelkfoje fruktojn nedezirindajn — sed la mosto ja ne estas pura, rigardu la vinon. Liberon al la verkistoj, severan kritikon al la Akademio, — la rezulto estos la lingvo kiun ni volas.

Vi montras al mi la pordon de Esperantujo. Sed pripensu, mi ne estas sola. Grabovski, la patro de nia poezio, estis ankaŭ patro de tre multaj novaj vortoj. Ĉu ankaŭ lin vi metas ekster la pordon? Nu, se kun li kaj mi venos ĉiuj, kiuj same pensas kiel li kaj mi, ne tro multan ĝojon vi havos el la poezio, kiu restos post la elfeto de ĉi tiuj „mondforaj poetoj“.

Resume. Aŭ oni tute forigas la poezion el Esperantujo, kiel endanĝerigon por la lingvo de l'propagandistoj, aŭ oni permesas al la poetoj liberan manon.

Kaj kiuj neniam traluktis grandan verkon, penante ĝin traduki *perfekte* kaj *komplete*, ne kontentigante pri la prezento de ĝia griza enhavo — tiuj ne parolu pri la Esp. literatura lingvo. Kaj tiuj kredu al mi, ke malantaŭ ĉiu mia nova vorto sin kaŝas — krom kelkfoja tento pri la evito de l'esprimo — longaj hezitoj, kamprompaj meditoj, ŝvitaj provoj. Kaj plej ofte — la vorto eĉ ne estas nova, ĝi estas jam uzita de bonaj aŭtoroj post similiaj rigoraj konsideroj.

Mi finis. Sed — ankoraŭ ion. Via stilo estas tiel viva, ke mi petas vin por kunlaboro. La hispana literaturo apenaŭ estas reprezentata ĉe ni. Observoj tute mankas. Sendu do ion, valon-an kaj interesan kaj helpu, „salumi“ la revuon. Kun salutoj:

Kopar.

**Nepublikotaj manuskriptoj:** Prozo: Mortiganto pro amo. La luno rakontas. Pereigis sin. La vojo. Fragmento el la „Vesperaj horoj“. La rompstelisto. El la araba „Mil kaj unu noktoj“. Fortulo kaj mallfortulo. La revolvero. Pri la verkoj de la zenitista movado. El taglibro de frenezulo. La siringo. La vitraj serpentoj. La nova malsanulo. La bukedo de laktukoj. Arele. Pri printempa laceco. Por Sextus Roscius. Euforio kaj aforio. Pri nova nobelaro. Kiam la ĉerizoj estas maturaj. Sfinkso. La batalo apud Arbelo kaj Gaugamela. Johannes Wegleiter. La forlasita infano. Li kaj Si (preludo). Ĉe fakiro. La skulptisto. Prometeo. La mirinda birdo. Judaj okuloj. Aventuroj de Tom Sawyer (tro konata). La Pastro de Kahlenberg. Izabelo en pigmelando. Kial sankta Klauz ne plu venas nun. En la ruĝan sunlumon. Antaŭ Kristnasko. *Poemoj:* Kanto sen titolo (Lahezis, Klotho, Atropos). Batalrekviemo. Unu tre ordinara historio. Malgaja historio. Melankolio. Kial. Ĝoju, ĝoju. Haveto. Konsilo. Eksterlande. Patrujo. Balado. Sin disdonanta koro. Portreto de batalanto. De poemoj de Nikolao Lenau. La virino. La pluvo. El malnova kvartalo.

Pri la ceteraj manuskriptoj, ankaŭ pri la publikotaj, ni raportos en la sekvanta numero.

# UNUA LABORISTA OLIMPIADO FRANKFURT A/M.

21-28 JULIO 1925.

## SPORTULOJ

## ALVOKO

## ESPERANTISTAJ

La diversaj olimpikomisionoj jam funkcias. Ili kalkulas je pli ol 250.000 partoprenontoj (anoncitaj, ĝis la unua de marto, 87.000 aktivaj konkurantoj, el ĉiuj anguloj de l' terlobo).

La ĉi tiea Laborista-Esperanto-Ligo bezonas urĝe sciigojn, precize kiom da eksterlandaj sportuloj vizitos la olimpion?

Ĉiu eksterlanda kamarado venonta al la olimpion (24-28. julio 25) Frankfurton sendu tuj sain intencion, por kadrigi niajn entreprenojn. Faciliĝas la frankfurta restado en esperanta rondo nur por tiuj kiuj anoncis sin ankaŭ ĉe ni ĝis la unua de junio 1925.

Krome ni petas ĉiujn eksterlandajn olimpianojn esperantiste tuj sendi sain alvenon al oficiale olimpia oficejo: *Geschäftsstelle der Olympia in Frankfurt Main, Allerheiligenstrasse 51*. La ĉi tieaj komisionoj preskaŭ senescepte klarigas nian movadon ne sufiĉe grava, la funkciuloj de la sportmovado rigardas nian laboron nur bonega propagando por Esperanto kaj vole ne vole ni jam devas konfesi ke

Ĉu vi volas kunhelpi? Certe jes!

Internacia Esperanto Sportularo Laborista

**ADOLF WENDT**

Leteradreso: Karl Naber, Eckenheimerlandstrasse 97. Frankfurt am Main, (Germanujo).

**LA ESPERANTO-GAZETARO TUTMONDA ESTAS PETATA REPRESI!**

ili pravas, ĉar vi eksterlandanoj faris nenion ĝis nun por forlavi ĉi riproĉon gravan. Se vi mem ne interesiĝas pri sporto aŭ spektakloj, vi estas esperantisto kaj tio trudas al vi la devon interesiĝi vialandajn instituciojn pri rolo kiam ludos E-o dum ĉi olimpion. Jam depost multaj jaroj akceptis la „Unio internacia por fizika eduko“ (2-a kongreso) E-on kiel sian internacian korespondlingvon kaj decidis praktike uzi ĝin dum la unua laborista olimpion en *Frankfurt am Main*.

Membroj el la Frankfurta grupo oficiale deĵoras en la loĝeja, trafika, kaj akcepta komisionoj. Sed la laboro de tiuj Kdoj estas treege malfaciligata pro la kaŭzoj aluditaj, ĉar la eksterlanda korespondlingvo estas — strange — germanlingva.

Klopodu okupi la olimpionkomitatojn per demandoj esperantlingve skribitaj, plu postulu dum la olimpion mem ĉiuloke esperantlingvan interpretiston, via olimpion lingvo estu nepre E-o, por ke ni pruvu do la gravecon de Espo al la spektikuloj.

L. E. A. Loka grupo Ffm. Olympia-Esperanto-Fako

**KARL NABER**

## INTERNACIA MEDICINA REVUO

Redaktejo kaj administrejo:  
Budapest, VI., Teréz-körut No. 6.

Oficiala Organo de T. E. K. A.

Esperantistaj kuracistoj nepre abonu ĝin!

## LEGU BONAJN VERKOJN:

<i>Madách</i> : La tragedio de l' homo (simpla)	68.000	h-Kronoj
(luksa)	102.000	" "
(bibliofila, lede bindita, kun ora rando kaj surpriso, jam nur 15 ekzempleroj imponaj volumoj...)	660.000	" "
simpla bindita	120.000	" "
luksa tole bind.	190.000	" "
<i>Jarkolektoj de L. M. binditaj kun ora surpriso 1922-23</i>	350.000	" "
1924	210.000	" "
<i>Dr. Vámbéry</i> : Kriminologio (El serio: „Kulturo kaj Scienco“.)	25.500	" "
<i>Karinthy</i> : Morgaŭ matene	17.000	" "

Al la prezoj aldonu poŝtelpezojn.

**HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO**  
BUDAPEST, VI., EÖTVÖS-UTCA 3.



**KIU ESTAS LA PLEJ BELA LIBRO  
EN ESPERANTO?**

MADÁCH-KALOCSAY:

## LA TRAGEDIO DE L'HOMO

Iaŭ la plimulto de voĉdonintoj pri nia enigmo. Konvinkigu kaj mendinte la verkon sendu vian opinion al

**HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO**  
BUDAPEST, VI., EÖTVÖS-UTCA 3. SZÁM

Prezoj sen afranko:

Simpla: 63.000 Hung. Kr. Luksa: 102.000 Hung. Kr. Bibliofila: 660.000 Hung. Kr.

**SOLVO**